

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO

ESPERANTISTA DOKUMENTARO

PRI LA OFICIALAJ, HISTORIAJ, BIBLIOGRAFIAJ KAJ STATISTIKAJ AFEROJ

Kajero tridek-tria

(Marto 1922)

I.

OFICIALA PARTO

SEKCIO A : KONGRESOJ

14

DEKTRIA UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO

Praha, 31 Julio-6 Aŭgusto 1921

Prezo : 3 fr.

PARIS
ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO

51, RUE DE CLICHY, 51

1922

C. O. 393

ESPERANTISTA DOKUMENTARO

PRI LA OFICIALAJ, HISTORIAJ, BIBLIOGRAFIAJ KAJ STATISTIKAJ AFEROJ

I. — KLASIFIKO LAŬ LA TEMOJ.

I. — Oficiala Parto.

Sekcio A. Kongresoj. Oficialaj Raportoj. [412 (063) (∞)]

Tiuj ĉi gravaj verkoj enhavas, pri ĉiu Kongreso, la Oficialan Protokolon, la preparajn dokumentojn, nomaron de la Kongresanoj, paroladojn de Zamenhof, raportojn pri la specialistaj kunsidoj, festoj, ekskursoj, k. t. p.

1. Unua Kongreso universala de Esperanto (Boulogne-s.-Mer, 1905).	1 50
2. Dua Kongreso universala de Esperanto (Genève, 1906)	2 50
3. Tria Kongreso universala de Esperanto (Cambridge, 1907)	2 50
4. Fundamentaj dokumentoj pri la Konstanta Komitato de la Kongresoj.	0 25
5. Kvara Kongreso universala de Esperanto (Dresden, 1908)	3 »
6. Kvina Kongreso universala de Esperanto (Barcelona, 1909)	3 »
7. Sesa Kongreso universala de Esperanto (Washington, 1910)	1 50
8. Sepa Kongreso universala de Esperanto (Anvers, 1911)	3 »
9. Oka Kongreso universala de Esperanto (Krakow, 1912)	3 »
10. Naŭa Kongreso universala de Esperanto (Berne, 1913)	3 »
11. Deka Kongreso universala de Esperanto (Paris, 1914)	3 50
12. Dekunua Kongreso universala de Esperanto (San Francisco, 1915)	2 »
13. Dekdua Kongreso universala de Esperanto (Hago, 1920)	3 »

Sekcio B. Lingva Komitato [412 (062.12)].

1. Vortoj elĉerpitaj el Hamlet kaj ne troveblaj en Universala Vortaro. Kolekto farita de S-roj Ellis, Millidge, Wackrill, kaj F-ino Ŝefer	0 10
2. Pri la preparo de plenigita eldono de Universala Vortaro. Raportoj de la prezidanto de la L. K.	0 10
3. Pri la participa sufikso antaŭ verba finiĝo. Dokumentoj kaj plena raporto pri kurioza propono farita al la L. K.	0 25
4. Alfred E. Wackrill. Zamenhofaj Vortoj ne troveblaj en la Universala Vortaro, tiritaj el Hamleto, Fundamenta Krestomatio, La Revizoro kaj la Rabistoj, kun citaĵoj.	1 50
5. Fundamentaj Dokumentoj pri la Lingva Komitato. Regularo, decidoj pri organizo kaj labormetodo, nomaro de anoj.	0 25
6. Th. Cart. Unua Oficiala Aldono al Universala Vortaro. Tiu gravega verko, kiun devas nepre posedi ĉiu Esperantisto, enhavas la nomaron de la ĉiuj vortoj oficiale enkondukitaj en la lingvon, por plenigi la Universalan Vortaron. La vortoj estas tradukitaj francen, anglen, germanen, rusen kaj polen.	1 »
7. G. Moch. Pri la transskribo de la propraj nomoj. Interesege studo pri tiu grava demando, kaj listo de propraj nomoj geografiaj, historiaj kaj personaj proponitaj de S-roj Bein, Moch kaj Schröder	
8. L.-L. Zamenhof Lingvaj Respondoj II ^a serio (elĉerpita)	0
9. Th. Cart. Dua Oficiala Aldono al Universala Vortaro.	1

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO

ESPERANTISTA DOKUMENTARO :

PRI LA OFICIALAJ, HISTORIAJ, BIBLIOGRAFIAJ KAJ STATISTIKAJ AFEROJ

Kajero tridek-tria

(Marto 1922)

Maneco

(2 eny 33)

I.

OFICIALA PARTO

SEKCIO A : KONGRESOJ

14

13

DEKTRIA UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO

Praha, 31 Julio-6 Aŭgusto 1921

Prezo : 3 fr.

PARIS

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO

51, RUE DE CLICHY, 51

1922

C. O. 393



B 121597

II

D38/111/92

Bibl. Jagiell

1994 KZ

1320/6

DEKTRIA UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO

(Prahá, 31 Julio-6 Aŭgusto 1921)

I. — PREPARAJ DOKUMENTOJ

1. KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ

Prezidanto :

Generalo SEBERT, 14, rue Brémontier, *Paris*.

Generala Sekretario :

Gabriel CHAVET, 51, rue de Clichy, *Paris*.

Kuratoroj de la Kongresa Kaso :

Ď-ro MYBS, 68, Marktstrasse, *Altona* (Germanujo).

Generalo SEBERT, 14, rue Brémontier, *Paris*.

J. Mabon WARDEN, 28, St Andrew Square, *Edinburgo* (Skotlando).

Anoj por la Dekunua Kongreso :

PARRISH, *Niagara Falls* (Kanado).

VINZENT, 400, California street, *San Francisco* (Cal. Usono).

Anoj por la Dekdua Kongreso :

Jr.-L. BRUIJN, Daguerrestraat, 158, *Hago* (Nederlando).

J.-R.-G. ISBRUCKER, v. Beverningkstraat, 10, *Hago* (Nederlando).

Anoj por la Dektria Kongreso :

Augustin PITLIK, 40, Nerudova, *Praha III*.

Ď-ro Stanislas KAMARYT, *Bratislava* (Ĉekoslovakujo).

2. LOKA ORGANIZA KOMITATO

Prezidanto : J. EISELT, r. konsilanto kaj eksgimnaziestro;

Vicprezidantoj : V. KRAUS, urba eksoficejestro; Fino J. SUPICHOVA, instruistino;

Honora Ĝenerala Sekretario : A. PITLIK, ĉefkomisario ĉe la ĉs. Komerc-ministerio;

Honora sekretario : F-ino DLOUHÁ, oficistino de ŝtataj fervojoj;

Sekretario : V. CIMR;

Honora Kasisto : F. NOVÁK, horloĝisto;

Reprezentanto de la germana Klubo « Verda Stelo » : MUDro A. BIRSCHITZKY;

Sekciestroj : 1. Propaganda : F. SILHA, landa oficialo; 2. Presa : B. WEINER, redaktoro; 3. Loĝiga : F-ino M. MOUDRÁ, instruistino; 4. Por distraĵoj kaj festoj : F-ino K. HLAVÁČOVÁ, instruistino; 5. Aranga : M. LUKÁŠ, universitata studento.

Revizoroj : JUDro F. KOHOUT, landa ĉefkonsilanto kaj V. VONDRUSKA, landa revidento.

3. OFICIALAJ APOGOJ

1. *Protektanto* :

Ĉeĥoslovaka registaro (ministraro).

2. *Honoraj prezidantoj* :

Generalo H. SEBERT, membro de la Franca Instituto;

Ph Dro Josef ŠUSTA, ĉs. ministro por instruado kaj nacia klereco;

Inĝeniero Josef RÖTNAGL, vicurbestro de *Praha*.

3. *Honora komitato* :

JUDro Jan ČERNÝ, prezidanto de la ĉs. ministraro;

Ph Dro Eduard BENEŠ, ĉs. ministro por eksterlandaj aferoj;

Ph Dro Josef ŠUSTA, ĉs. ministro por instruado kaj nacia klereco;

Generalo Otakar HUSÁK, ĉs. ministro por nacia defendo;

Gustav HABRMAN, ĉs. eksministro por instruado kaj nacia klereco. parlamentano;

JUDro Karel BAXA, urbestro de *Praha*;

Ph Dro František DRTINA, ŝtata sekretario de la ĉs. ministerio por instruado kaj nacia klereco, universitata profesoro;

Ph Dro František KREJČI, senatano kaj universitata profesoro;

Ph Dro Václav TILLE, univ. prof.;
MUDRo Rob. W. RAUDNITZ, univ. prof.;
Th Dro Josef HANUS, univ. prof.;
S-ino Františka PLAMINKOVÁ, membrino de la urberstraro de *Praha*;
S-ino Pavla MOUDRÁ, verkistino;
Otakar DOKUPIL, sekcia ĉefo de la ĉs. komercministerio;
JUDro Hanuš VOVES, sekcia ĉefo de la ĉs. komercministerio;
Ph Dro Jirí GUTH-JARCOVSKÝ, ministeria konsilanto, prezidanto de la
Ĉs. turista klubo;
Ladislav KOVÁR, ministeria konsilanto de la ĉs. komercministerio.
JUDro Eugen PŠTROSS, advokato kaj prezidanto de la Ĉs. Asocioj por
fremdula kaj turisma movado.

4. *Oficialaj delegitoj de registaroj, ministerioj kaj internaciaj institucioj :*

- a) *Ligo de Nacioj* : Dro NITOBE, vicsekretario; *Internacia Laboroficejo en Genève* : A. BLUMEL; *Ruĝa Kruco en Genève* : R. HORNER.
b) *Hispana registaro* : J. MANGADA-ROSENÖRN; *Urugvajna r.* : E. LEGRAND.
c) *Belga ministerio por sciencoj kaj artoj* : F. SCHOOF; *Finnlanda m. p. instruado* : V. SETÄLÄ; *Itala m. p. maraferoj* : A. ALESSIO, *Litova m. p. financoj, komerco kaj industrio* : P. MEDEM; *Nederlanda m. p. instruado, artoj kaj sciencoj* : J. W. SEVENHUIJSEN; *Pola komisiono en Cieszyn* : F. BOCK; *Saksa m. p. ekonomio* : Dro F. WICKE; *Ukraina misio en Praha* : Dro H. BOCHKOWSKI.

5. *Aliaj reprezentitaj institucioj :*

1. *Neesperantaj* : Kancelario de la prezidanto de la ĉs. respubliko. — Ĉs. ministerio por publika higieno kaj korpa eduko. — Jugoslava ambasadorejo en *Praha*. — Ĉs. Nacia konsilantaro. — Urboj : *Milano, Praha, Plzen, Reading, Zatec* (Saaz). — Foiroj : *Frankfurt a. M., Liberec (Reichenberg), Padova, Praha*. — Internacia Sekretariejo de la Eksmilitintoj kaj de la Militviktimoj (*Paris*). — Germana Asocio por Ligo de la Nacioj (*Berlin*). — Germana societo por paco (*Dresden*). — Dresdena Grupo de la Asocio de la Germanaj Muzikinstruistinoj.

6. *Telegramoj kaj salutleteroj :*

- a) *El Ĉeĥoslovakujo* : Respondo de la prezidanto de la Ĉeĥoslovaka respubliko Dro T. G. MASARYK je la salut-telegramo de la XIIIa;

— Dro E. BENEŠ, ĉs. ministro por eksterlandaj aferoj; — Dro F. DRINA, ŝtata sekretario; — Rektoroj de la teknikaj altlernejoj en *Praha* kaj *Brno* inĝ. KOLAR kaj Dro BABOROVSKY; — Dro VISKOVSKY, prez. de la ŝtata Terkultura oficejo; — Dro HAUSSMANN, prez. de landa ĉeftribunalo; — Dro SCHWARZENBERG, prez. de la Agrikultura konsilantaro; — Turisma kaj fremdula Asocio en *Praha*; — Klubo de la Ĉeĥoslovakaj turistoj; — Porpaca societo de *Chelĉický*; — J. PICHL, urbestro de *Vinohrady*; — Redakcio de « Ĉeske slovo ».

b) Germana ambasadoro en *Praha* prof. SAENGER; — Komerca kaj industria ĉambro en *Cluj* (Rumanio); — Grafo Gustav K. MAJLATH de *Srĉkhely*, episkopo de Transilvanio (Alba Julia); — Diplomata misio ukraina en *Praha*; — Urugvaja konsulo en *Praha*; — Parlamentano Binotti CLODOALDO (*Genova*); — Universita populare Genovese; — Camera del Lavoro (*Genova*); Ufficio tecnico di Assistenza e Coordinamento del Movimento Operacio (*Genova*).

4. KOMUNIKOJ DE LA LOKA KOMITATO

Gesamideanoj :

Laŭ la decido de la XIIa en *Haag* la XIIIa Universala Kongreso de Esperanto okazos en aŭgusto 1924 en *Praha*.

Ĉeĥoslovakaj gesperantistoj goje salutante tiun ĉi decidon plezurege faros ĉion eblan por la plena sukceso de la manifestacio de Esperanto en la Ĉeĥoslovaka respubliko.

La ĵus konstituiginta loka komitato jam komencis siajn preparajn laboron esperante, ke ĝi trovos kunhelpon de la tutmonda esperantistaro por provi brile plenumi sian grandan honoran taskon.

Ni petas ĉiujn niajn geamikojn jam de nun fari ĉion necesan, por povi partopreni la XIIIan, kaj instigi la aliajn por kunesti. Disvatigu la konon pri la naturaj belaĵoj de la venonta kongresurbo *Praha* kaj Ĉeĥoslovakujo, kie la esperantista movado estas de longe tiel vigla.

Invitante Vin sincere en la belegan historian ĉefurbon de nia renovigita ŝtato, ni esperas ke Vi grandnombre partoprenos la kongreson kaj estos kontentigitaj per nia laboro.

Ĝis la revido en *Praha*!

Loka kongresa komitato.

Unua Komuniko.

La 29an de septembro 1920 en la komitata kunveno de la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Asocio, Esperantista klubo kaj Rondeto de Esperantistinoj oni elektis jenan lokan porkongresan komitaton :

Prezidanto : EISELT, eksĝimnaziestro; *vicprezidanto* : 1. KRAUS, magistrata oficestro, 2. F-ino ŠUPICHOVÁ, instruistino; *ĝenerala sekretario* : PITLÍK, komercministeria komisario, *sekretariino* : F-ino DLOUHÁ, oficistino de ŝtataj fervojoj; *kasisto* : NOVÁK, horloĝisto. Por la *Verda Stelo* estis elektita MUDR BISCHITZKY.

Sekciestroj : *Financa* : HROMADA, oficisto, 2. *propaganda* : BOUŠKA, urba oficisto, 3. *presa* : WEINER, redaktoro, 4. *loĝija* : F-ino MOUDRÁ, instruistino, 5. *por distraĵoj* : F-ino HLAVÁČOVÁ, instruistino, 6. *aranĝa* : LUKÁŠ, studento de la universitato. *Revisoroj* : D-ro KOHOUT, landa ĉefkonsilanto kaj VONDRUŠKA, landa revidento.

Ĉiun korespondadon kaj aliĝojn oni sendu (por respondo respondkuponon aŭ afrankon en naciaj poŝtmarkoj) al : Augustin PITLÍK, *Praha III.* — Nerudova ul. 40.

2^a Komuniko.

Por ke la fakaj kunvenoj, okazontaj dum la kongreso, havu sukcesan rezultaton, estis de la loka kongresa komitato komisiitaj jenaj organizantoj, kiuj kun la intersemuloj jam de nun prizorgados la programon de la fakaj kunvenoj eventuale prilaboros la proponon pri la tiurilataj fakaj vortaroj : por *blinduloj* : St. STEJSKAL; *fervojis oĵ* : F-ino S. DLOUHÁ; *instruistoj* : F-ino SUPICHOVA; *ĵurnalistoj* : (verkistoj) : B. WEINER; *kuracistoj* : D-ro A. BISCHITZKY; *laboristoj* : J. SÍDLO; *liberpensuloj* : R. HROMADA; *pacifistoj* : F-ino M. MOUDRÁ; *poŝtoficistoj* : Fino M. HEMEROVA; *ruĝa kruco* : V. KRAUS; *skoltoj* : A. PITLÍK ; *studentoj* : M. LUKÁŠ. Por la aliaj fakoj estas la organizantoj ankoraŭ fiksotaj.

La kongreso okazos en aŭgusto. La preciza dato kaj la kotizaĵo ne estas ankoraŭ fiksitaj. Komitatano estis elektita D-ro St. KAMARYT, profesoro de ŝtata reallernejo en *Bratislava*.

Dum la kongreso oni aranĝos operon en la Nacia Teatro, esperantan teatran presentadon, akademion, internacian balon en naciaj kostumoj (Ĉeĥoslovakujo estas lando de la plej abundaj gis nun portataj naciaj kostumoj), kaj ekskursojn al la unuarangaj vidindaĵoj.

Por gajni monrimedojn aranĝos L. K. K. publikajn teatrajn prezen-

tadojn. La unua okazos la 19. XI. 1920. — Greka katolika pastro Stefan VARZALY el *Lansfort* (Pensylvania, Usono), donacis 100 Kĉ. por la kongresa kaso.

En la konkurso de Esperanto organizata de S-ro DELIGNY en majo 1921 por la lernantoj en la liceo de *Saint-Omer* (Francujo) estas unua premio : « Vojaĝo al la XIIIa en *Praha* kaj rekompenco de ĉiuj elspezoj dum la kongressemajno ». *Vivant sequentes!*

3^a Komuniko.

Dato. — La XIIIa okazos de la 31^a de julio ĝis la 6^a de aŭgusto 1921.

Komitato. — D-ro St. KAMARYT kaj Aug. PITLÍK estis elektitaj anoj de K. K. K. por la XIIIa en *Praha*.

Kongresejo. — Solena malferma kunsido okazos en la « Smetana » halo de la Reprezentanta domo, laboraj kongreskunsidoj kaj akceptejo troviĝos en la Kazino, sur insulo « Zofin ».

Subkongreso. — Sub protektorato de S-ro Th. CART okazos samtempe subkongreso de la blindaj esperantistoj. En la programo estas paroladoj pri la socia vivo kaj organizado de la blinduloj kaj internacia koncerto de la blindaj viztuojoj kaj kantistoj.

Fakaj kunvenoj. — Katolikoj-organizanto S-ro ZELENKA; kristanoj kaj vegetaranoj; S-ro TUTSCH; hebreaj nacioj : S-ro HELLER.

Kotizaĵo. — La sumo kaj la maniero de la monego estas baldaŭ komunikotaj.

Garantia fundo. — Enskriboj por 100 ĉekoslovakaj kronoj. La garantiantoj pagos laŭproporcie nur, se la kongreso pruviĝus ŝe la kongresaj elspezoj superus la enspezojn. Garantiu precipe gesamideanoj el landoj kun pli bona valuto !

Deponado de lo mono en Praha. — Eksterlandaj geesperantistoj intencantaj deponi en *Praha* monon, sendu pere de kiu ajn kanko al la banko « *Bohemia* » en *Praha* je la konto de la XIIIa Universala Kongreso de Esperanto sian sumon en ĉekoslovaka valuto. La kongresa monegaĵo elpagos al Vi ĝin en ĉekoslovakaj kronoj (laŭ la kurzo de la tago de la monakcepto) kun procentoj. Pri la monego sciigu ĉiam samtempe la ĝeneralan sekretarion de la Loka K. K.

4^a Komuniko.

Komitato. — Propaganda sekcio estas dividita en la sekciojn : por eksterlanda propagando; Sekciestro : S-ro ŠILHA, landa asistanto kaj landa propagando : S-ro BOUŠKA.

Subkongreso. — I^a Kongreso de Liberiga Stelo, internacia asocio de antaŭenemaj esperantistoj.

Fakaj Kunvenoj. — Por *Sportistoj*, aranĝas Universala Sportligo : sekretario S-ro PEDRAZZINI en *Locarno*, Svisujo ; *Komercistoj* : D-ro UNGER, redaktoro de *Internacia Komerca Revuo* en *Zürich*, Centra poŝt-fako 6104; *Psikistoj-spiritualistoj* : S-ro SKLENČKA, delegito de U. E. A. en *Kadec Kràlové*, Ĉekoslovakujo; *Anoj de malgrandaj nacioj* : prof. FRIDRICH en *Prostějov*, Ĉekoslovakujo; *Framasonoj* S-ro FAULHABER, sekretario de *Universala Framasona Ligo*, *Amsterdam*, Borgerstraat 103, Nederlando.

Garantia fundo. — Samideanoj precipe el landoj kun bona valuto enskribu almenaŭ unu enskribon po 100 ĉekoslovakaj kronoj!

Deponado de la mono en Praha. — Oni sendu pere de kiu ajn banko al la banko « Bohemia » en *Praha* je la konto de la XIII-a Universala Kongreso de Esperanto le deponotan sumon, aŭ en sia nacia valuto, kiun elpagos al Vi la kongresa monŝanĝejo en ĉekoslovakaj kronoj laŭ la kurzo de la tago de la monakcepto, aŭ en ĉekoslovakaj kronoj, kiuj estos elpagotaj kun procentoj. *Pri la monsendo sciigu ĉiam samtempe la ĝeneralan sekretarion de L. K.*

Donacoj. — S-ro VAN HEEK el *Hengelo* (Nederlando) 30 G. N. Kursanoj de S-ro D-ro SOUSEK el *Prelouč...* : 57 K.

Vojaĝaferoj. — Biletojn, transporton de la valizoj, informojn ĉiurilatajn prizorgadas al la kongresanoj : *Cestovni* a *dopravni* kancelar Vojaĝ-kaj transportoficejo, fondita de la ministerioj por komerco kaj fervojoj en *Praha II*, *Miknlandská 7*.

Rimarkigo. — *La redakcioj estas petataj sendadi regule unu ekzempleron de sia gazeto al la Loka Kongresa Komitato en Praha.*

Adreso por nur prikongresaj korespondaĵoj kaj oficialaj aligoj : S-ro Aug. PITLIK, komisario ĉe komercministerio, ĝenerala sekretario de L. K. *Praha III*, *Nerudova 40*.

Aliĝoj. — Necesaj precizaj informoj pri la kotizaĵo kaj maniero sendi ĝin estos baldaŭ komunikotaj.

5^a Komunikio.

Teatra prezentado. — Oni ludos Esperantlingve tradukitan klasikan ĉehan komedion « *Noc na Karlštejně* » (Nokto en Karlštejn) de Jaroslav Vrchlicky, ĉefa ĉeĥa poeto kaj verkisto.

Faka kunveno. — Por sciencistoj organizas D-ro KAMARYT, Profesoro

en *Bratislava*, Têlocvična 3. La interesuloj pri la fakaj kunvenoj sin turnu al la ĝis nun publikigitaj organizantoj !

Kotizaĵo. — 25 frankoj-oro (antaŭmilita valoro) ... 5 dolaroj, 12 nederlandaj guldenoj, 20 ŝilingoj, skandinavaj kronoj, germanaj markoj, 25 frankoj, liroj, dinaroj, drakmoj, pesetoj, ĉeĥoslovakaj kronoj, aŭstriaĵ kaj kungaraj kronoj, polaj kaj finnaj markoj k. t. p. *Pluaj samfamilianoj pagas nur 60 % de la kotizaĵo. Post la 1 junio 1921 altiĝos la kotizaĵoj je 50 %.*

Ĉiu pagas en sia ŝtata valuto ! La sumon sendu pere de kiu ajn banko al la banko « *Bohemia* » en *Praha* je la konto de la XIII^a *Universala Kongreso de Esperanto* kaj samtempe sciigu pri la aliĝo kaj mense de la ĝeneralan sekretarion !

Garantia Funda. — Garantiu almenaŭ 100 ĉeĥosl. kronojn ! (Vidu la IIIan Komunikon !)

Donacoj. — Ĉeĥoslovaka komercministerio 10.000 K.; S-ro ZEDNIK en *Berlin* 100 K.; F-inoj Marie kaj Nina SILBERSTECKENOVY 100 K.; liaj lernantinoj 30 K.; S-ro HARNA en *HOLICE* 10 K.

Depono de mono en Praha. — (Vidu la IVan Komunikon !)

Vojaĝaĵeroj. — (Vidu la IVan Komunikon !)

6^a Komunikilo.

Fakaj kunvenoj. — Por filatelistoj organizas S-ro FLEISCHER; teosofanoj S-ro CIMR; ŝakludantoj S-ro HAJEK, kiu aranĝos ankaŭ vetludon de Esperantaj ŝakistoj.

Kotizaĵo. — Vidu la kvinan komunikon !

Deponado de la mono en Praha. — Vidu la kvaran komunikon !

Vojaĝaĵeroj. — Vidu la kvaran komunikon !

Garantia fundo. — 1. S-ro Ĉeĥ al *Wien* 100 Kĉ.; 2. D-ro RÓBIN, *Warszawa* 100 Kĉ.; 3. S-ro HEEK, *Hengelo* 500 N. G.

Garantiu precipe Esperantistoj el landoj kun bona valuto !

Donacoj. — Ĉeĥoslovaka ministerio por eksterlandaj aferoj 5.000 Kĉ.; S-ro HEEK el *Hengelo* 60 N. G.; S-ino MAMMEN el *Grenaa* kaj ŝiaj 10 lernantoj-skoltoj 100 Kĉ.; S-ro STRAKA, *Bratislava* 100 Kĉ.; Prof. KROUZIL kun kolegoj kaj studentoj, *Brno*, 60 Kĉ.; Anonima societo « *Centra-Esperanto-librejo's-Gravenhage* » 51 Kĉ.; S-ro RIBAS DE PINA 5 liroj.

Sciigoj pri loĝado kaj vivkostoj en Praha aperos en la sepa komunikilo !

Kongresa kaso. — La financa sekcio aranĝis la 6 decembro 1920 amuzvesperon de St. Nikolao kaj du teatrajn prezentadojn : la 19 nov. 1920 kaj la 26 jan. 1921, per kiuj entreprenoj pliriĉiĝis la kaso je 7.000 Kĉ.

7^a Komunikio.

Ĉiu pagas en sia nuna ŝtata valuto ! La sumon sendu en rekomendita letero rekte al la ĝenerala sekretario ! La ricevo de la kotizo estos venonte sole en ĉi tiu rubriko kvitota !

Garantia fundo. — 4. S-ro DÖRING el *Freiburg* 100 Kĉ.; 5. S-ro BRUIJN, *Hago* 500 Kĉ.; 6. S-ro FAULHABER, *Amsterdam*, kaj 7. S-ro van DOORNE, *Rotterdam*, po 100 Kĉ. *Gesamideanoj* garantiu almenaŭ 100 Kĉ. !

Donacoj. — S-ino MAMMEN el *Grenaa* kun siaj skoltaj lernantoj ankoraŭ 113 Kĉ.; S-ro JUNG, *Horrem* 30 Kĉ.; S-ro FRIEDRICH, *Kosice* 400 Kĉ.; skolto Larsen, *Grenaa* 3 Kĉ.; S-ro RIEDL, *Jilemnice* 25 Kĉ.; S-ro BÜNEMANN, *Hamburg* 8 M.; S-ro ŠIMONEK, *Chicago* 1.000 Kĉ. Venonte sole en tiu rubriko oni dankeme kvitancos la donacojn !

Kongresa kaso. — 62 K. 67 h. enspezo por donacitaj 50 ekzempleroj de la 22-a numero (bildoj pri Praha) de « *Esperanto Triumfonta* ».

Deponita mono ĉe la banko « *Bohemia* » en Praha : 1. F-ino BEUKEMA 200 K.; 2. S-ro KRESTANOFF 41 K. 50 h.; 3. S-ro BRUIJN 2.000 K.; 4. S-ro DÖRING 100 K.; 5. S-ro BALKANYI 360 K.

Prezoj (hodiaŭaj) en Praha : I. De la hotelĉambroj : 1-a kategorio : a) unulita 10—37 K.; b) dua provizora lito 10—20 K.; c) dulita 25—77 K. 2-a kategorio : a) 10—29 K.; b) 10 K.; c) 26 ĝis 50 K.

Oni intencas prizorgi ankaŭ loĝadon en privataj familioj kaj komunaj loĝejoj (por neriĉaj Esperantistoj). Notu viajn tiurilatajn dezirojn en la de la Loka Kongresa Komitato sendota aliĝilo !

II. De la manĝaĵoj : 1-a kategorio : a) matenmanĝo (kafo aŭ teo kun butero aŭ kompoto, pano aŭ bulko) 10—15 K.; b) tagmanĝo (inter la 12—2 h. posttagmeze) laŭ karto (buljono, fiŝo aŭ bovaĵo, rostajo kun farunbuloj aŭ terpomoj, farunaĵo) 45—75 K.; c) vespermanĝo laŭ karto (antaŭmanĝo kaj rostajo) 25—65 K.; 2-a kategorio : a) 5—7 K.; b) 33—37 K.; c) 25 K.

Krom tio trinkmono almenaŭ 10 %.

En restoracioj bonaj tag-kaj vespermanĝoj po 10—20 K. !

Tre bongustaj kaj malkaraj estas la kolbasetoj kaj ŝinko de Praha. Biero, 1/2, 1 K. 30 h. ĝis 2 K. 30 h.

Vojaĝaferoj. — Informojn donas : « *Čs. ČESTOVNI a dopravní Kan- celar* », Milenlandska 7, Praha III. La VIII-a komunikio donos prezojn de la biletoj por ĉiuj pligravaj fervojlinioj al Praha !

Glumarkoj oficialaj (3 malsamaj specoj dukoloraj) ĵus aperis 1 peco = 10 helerojn, 100 pecoj = 9 Kĉ. (kun afranko 10 Kĉ.); por eksterlando :

100 pecoj = 3 francajn frankojn aŭ egalvaloran valuton, sentando en rekomendita letero. Mendadu rapide!

Korespondado. — Gesamideanoj! Legu atente la ĝisnunajn oficialajn komunikojn! Ne demandu pri la komunikitaĵoj! Ne malriĉigu la kongresan kason forgesante aldoni por respondo aŭ respondkuponon aŭ afrankon en neu itaj naciaj poŝtmarkoj! Demandu sole pri aferoj rilatantaj al la XIII!

8^a Komunikio.

Komitato. — Eksiĝis S-ro BOUSKA.

Fakaj kunvenoj. — Por *virinoj* aranĝos F-ino instruistino NESMERAKOVA; por *ĉastemuloj* : S-ro ROSKES, Hago.

Kotizo. — Vidu la Sepan komunikon! Aliĝu antaŭ I. VI, 1921 kaj pagu kotizon siaj ŝtataj banknotoj, sendotaj en rekomendita letero al la ĝenerala sekretario! La aliĝintoj bonvolu baldaŭ sendi kotizaĵon!

Donacoj. — S-ro TUTSCH 15 K.; S-ro FITTON 20 ŝ.; Esper Grupo Olomouc 100 K.; S-ro TANNENBAUM 175 aŭstr. K.; S-ro GOTTGRETREU 18 m.; paroh. KUČERA 100 K.; lernantoj de inĝ. prof. KROUZIL 1.000 K.

Deponita Mono. — S-ro DEGENKAMP 1.250 Kĉ. S-ro FAULHABER 2.000 K.; S-ro de Boer 2.000 K.; S-ro v. DOORNE 3.000 K.; S-ro LAURANS 4.500 K.; F-ino BOON 1.247 K. 28 h.; S-ro TANNENBAUM 250 K.; S-ro THIÉBAULT 397 K. 13 h.; S-ro JUNG 53 K. 10; S-ro MOLNAR 100 K.; S-ro GRENKAMP 90 K.

Garantia Fundo. — 8. S-ro VINZENT 100 K.; 9. S-ro THIÉBAUT 397 K. 13; 10. S-ro ALONSO SANZ 100 Kĉ.; 11. Esper. Societo OLMOUC 300 K.; 12. S-ro MOLNAR; 13. S-ro de WOLF; 14. Esper. Klubo PLZEN; 15. S-ro KAVAN; 16. S-ro APPLEBAUM; 17. S-ro GRENKAMP po 100 Kĉ.

Prezoj de la biletoj por fervojlinioj. — Praha-Sob-Budapeŝt : II Klaso : 168 Kĉ-106 Kh.; III Klaso : 84 Kĉ-73 Kh.; Praha-Cmunt-Eger-Kufstein-Brenner-Trento : II Kl. : 97,60 Kĉ-110 m.-129,60 Kau-35,80 l.; III Kl. : 48,80 Kĉ-67 m.-64,80 Kau.-18,90 l.; Praha-Spielfeld-Beograd : II Kl. : 97,20 Kĉ.-399,80 Kau-225,50 d.; III Kl. : 48,80 Kĉ.-199,80 Kau-113,25 d.; Spielfeld-Longatico-Trieste : II Kl. : 79,50 d.-26,45 l.; III Kl. : 39,75 d.-14,10 l.; Brenner-Roma : II Kl. : 137,60 l.; III Kl. : 71,30 l.; Brenner-Genova : II Kl. : 106,25 l.; III Kl. : 55,20 l.; Praha-Cheb-Appenweier-Basel-Bern : II Kl. : 179,28 m.-II Fr. Sv.; III Kl. : 111,30 m.-7,50 Fr. Sv.; Praha-Strasbourg-Lyon : II Kl. : 77 fr.-35,80 fr.; III Kl. : 47 fr.-22,75; Praha-Paris : II Kl. : 381,15; III Kl. : 135 fr.; Praha-Dêcin/Tetschen/-Aachen-Brussel : II Kl. : 68,80 Kĉ.-211,20 m.-17 fr.; III Kl. :

34,40 Kĉ.-126 m.-10 fr.; Praha-Dĉcin-Salzbergen-Amsterdam : II Kl. : 68,60 Kĉ.-172,60 m.-10,40 n. g.; III Kl. : 34,40 Kĉ.-102,40 m.-6,30 n. g.; Praha-Berlin-Hambourg : II Kl. : 68,60 Kĉ.-145 m.; III Kl. : 34,40 Kĉ.-89 m.; Praha-Boxtel-London : II Kl.; 68,80 Kĉ.-194,40 m.-37,50 n. g.; III Kl. : 115,70 m.-33, 20 n. g.; London-Calais-Strasbourg-Cheb-Praha, Orient-Express : I Kl. : 561 fr. aŭ 14,40 L.; Praha-Berlin-Rostock/Kopenhago/ : II Kl. : 68,80 Kĉ.-77 m.-54 m.; III Kl. : 34,40 Kĉ.-45 m.-31,80 m.; Praha-Sassnitz-Warnemünde/-Stockholm/ : II Kl. : 68,80 Kĉ.-87,60 m.-85,20 m.; III Kl. : 34,40 Kĉ.-87,60 m.-85,20 m.; Praha-Leipzig-Frankfurt : II Kl. : 68, 80 Kĉ.-50,80 m.93 m.; III Kl. : 34,40 Kĉ.-30,40 m.-55,80 m.; Praha-Strasbourg-Paris-Narbonne-Perpignan/-Barcelona, : II Kl. : 77 fr.-71 fr.-139,20 fr.-8,90 fr.; III Kl. : 47 fr.-45 fr.-88,85 fr.-5,65 fr.

Pasportoj. — Por la veturo al Praha kaj reveno estas necesa pasporto pretigita de la policestrejo aŭ alia kompetenta ŝtata ofico, vizita de la ĉeĥoslovaka ambasadorejo aŭ konsulejo kaj de la konsuloj de ĉiuj traveturotaj ŝtatoj.

5. STATISTIKO DE LA KONGRESANOJ

Statistiko de kongresanoj :

Al la Kongreso aliĝis entute 2.561 kongresanoj. El ili estis el ĉi tiuj 35 landoj :

Ĉeĥoslovakio	1.406	Svisujo	32
Germanujo	289	Jugoslavio	27
Svedujo	111	Hispanujo	27
Francujo	91	Belgujo	19
Aŭstrio	83	Finnlando	14
Britujo	78	Norvegujo	12
Nederlando	73	Rumanujo	11
Polujo	72	Dancigo	6
Danujo	45	Ruslando	5
Hungarujo	45	Ukrajnio	5
Italujo	45	Usono	5
Bulgarujo	32	Japanujo	5

Argentino	4	Kubo	2
Litovio	3	Alĝerio	1
Kanado	3	Sudafriko	1
Aŭstralio	3	Brazilo	1
Estonujo	2	Urugvajo	1
Turkujo	2		

Laŭ partoj de terglobo la statistiko estas :

Eŭropo	2.533
Ameriko	16
Azio	7
Aŭstralio	3
Afriko	2

Oni vidas ankaŭ rilaton inter enlandanoj kaj fremdlandanoj :

El Ĉeĥoslovakio	1.406
Ekster Ĉeĥoslovakio	1.155

El tiuj ĉi preskaŭ 400 ne petis persone siajn kongresdokumentojn, laŭ kio oni devas juĝi, ke efektive partoprenis 2.200 ne kalkulante multajn familianojn sen kartoj.

6. RAPORTO DE LA PREZIDANTO DE LA LINGVA KOMITATO KAJ AKADEMIO

TRE ESTIMATAJ SAMIDEANOJ.

Mia unua, nia unua devo estas saluti la memoron de Rektoro BOIRAC, kiu dum multaj jaroj, kun plej granda sindono, kompetenteco kaj aŭtoritato, prezidis la Lingvan Komitaton kaj ĝian Akademion. Lin anstataŭigi ni ne povos, kaj mi nur tro bone komprenas, kiom multe mankas al mi, por lin sekvi, eĉ de malproksime. La eblon mi tamen faros kaj mi esperas, ke vi helpos al mi ne nur per via kritiko, sed ankaŭ per viaj konsiloj kaj per ĝentila, efektiva kunlaborado.

Permesu, ke unue mi resumu por vi la historion de niaj Lingvaj Institutuoj depost julio 1914 kaj ke, poste, mi proponu al via atento kelkajn rimarkojn prinianuna kaj estonta agado kaj pri la reorganizo de niaj Lingvaj Institutuoj. Tion ĉi tamen mi faros pli plene buŝe en nia Praha Kongreso ol tie ĉi skribe.

* * *

Por la kunvenoj de la *Lingva Komitato* dum la Pariza Kongreso (1914) la Akademio estis preparinta :

1-e Liston de internaciaj radikoj aprobitan de la L. K.

2-e Liston de komune uzataj vortoj aprobitan de la L. K.

El tiuj du listoj konsistis la *Dua Oficiala Aldono* al « *Universala Vortaro* ».

La milito malebligis la eldonon kaj dissendon de tiu ĉi dokumento, kiu povis aperi nur en julio 1919 (1).

Plie la *Sekcio pri la Komuna Vortaro* intencis eldoni la definitivajn korektojn de la eraraj tradukoj en la *Universala Vortaro*. Granda laboro kiu postulis multajn jarojn ĝis plena interkonsento de la diverslingvaj komitatoj. Ĉio estis preta por presado.

La Akademio publikigos tiun ĉi liston ĉu aparte, se eble, ĉu kiam ĝi eldonos plenan Radikaron kun tradukoj (2).

* * *

Tia estis la situacio, kiam eksplodis la mondmilito.

Poste, dum preskaŭ kvin jaroj, neebla estis la facila *internacia* korespondado, nepre necesa por la Akademiaj laboroj.

Aliparte ok Akademianoj devis esti balotataj, nome S-roj Cart, Lengyel, Mybs kaj kvin novaj; du pro la ekŝigo de S-roj Bein kaj Moch, unu pro la morto de S-ro Boirac (okt. 1917) kaj du por du nove kreitaj postenoj.

D-ro Mybs, Vic-prezidanto kaj mi kiel Direktoro por la Komuna Vortaro, troviĝis sekve en ne tre facila situacio; ĉu ni ankoraŭ rajtis

(1) Esperantista Dokumentaro. Kajero trideka : Dua Oficiala Aldono, Esperantista Centra Oficejo, 51, rue de Clichy, Paris. — Prezo 1 fr. 50.

(2) La netuŝebleco de l'U. V. restas kompreneble plena kaj ĝin oni ĉiam represos tian, kia ĝi estas. Sed necese estas montri al la naciaj vortaristoj, kiuj uzas la Plenan Oficialan Radikaron, kiel fundamenton de siaj laboroj, la precizan nacilingvan signifon de ĉiu radiko, por eviti erarojn en la Esperanto-naciaj vortaroj.

agi kiel Prezidanto aŭ kiel Direktoro? Korespondadi ni eĉ ne povis unu kun la alia!

Necese estis do atendi pacience la finon de la milito kaj la eblecon interkonsiliĝi ree kun ĉiuj Akademianoj.

En majo 1919, S-ro G. Chavet sendis al ĉiuj Lingva-Komitatanoj cirkuleron pri plilongigo de la povoj de la komitatanoj kaj de la Akademianoj kaj, en oktobro 1919, post aprobo de la unua cirkulero, duan cirkuleron pri la elekto de ok novaj Akademianoj.

En majo 1920 okazis la kalkulo de la voĉdonoj : S-roj Cart, Corret, Grosjean-Maupin, Kühnl, Lengyel, Mybs kaj Privat estis elektataj Akademianoj, kaj nun la Akademio, post la eksigo de S-ro de Saussure (laŭ art. VII de la Regularo), konsistas el S-roj Cart, Christaller, P. Corret, Evstifejeff, Grabowski, Grosjean-Maupin, Inglada, Kühnl, Lengyel, Mybs, Nylen, Privat, Wackrill kaj Warden.

Tuj post tiu ĉi elekto, kiel Direktoro por la Komuna Vortaro, mi demandis la Akademianojn pri ilia opinio koncerne la uzadon de la sufikso *-i* por landnomoj. Ĉar la plimulto ĝin malaprobis, mi sendis al la gazetoj cirkuleron, esprimante per ĝi la Akademian malaprobon kaj klarigante, kial tiu sufikso estus ankoraŭ teorie malakceptinda, eĉ se ĝi ne estus kontraŭa al la Fundamento.

* * *

En julio 1920, la Akademio elektis :

Prezidanton : Prof. Th. CART;

Vic-Prezidantojn : S-rojn MYBS kaj WARDEN;

Direktoron de la laboraj sekcioj :

Gramatiko : S-ron GRABOWSKI;

Komuna Vortaro : S-ron GROSJEAN-MAUPIN;

Scienca kaj teknika vortaro : D-ron CORRET;

Konkursoj kaj Premioj : S-ron PRIVAT.

En decembro 1920, ĝi sendis al vi *Deklaracion* pri la devoj de l' Esperantistaro kaj de la Lingvaj Institucioj. Ĝin vi certe legis kun atento. Multaj inter vi respondis per varma aprobo. La *Deklaracion* sekvis du cirkuleroj, unu de la Direktoro por la Komuna Vortaro, la alia de la Direktoro por la Teknika Vortaro.

* * *

Jam antaŭe, dum la Haga Kongreso, la tie ĉeestantaj malmultaj L. K-anoj estis esprimintaj la deziron, ke la Akademio ree esploru la demandon pri *-i*, kiel sufikso por la landnomoj, sed laŭregulan, oficialan petskribon pri tio ne ricevis tiam la Prezidanto. Aliparte, tute malkaŝe mi konfesos, ke — nova kaj eble ne sufiĉe sperta Prezidanto — mi esperis, ke, fine, precipe post la Akademia Deklaracio, la konsilon de la Akademio rilate al *io* ĉiuj volonte aŭskultos. Sed tio ne okazis, kaj, kvankam mi deziris eviti pri tiu ĉi speciala temo agitadon, kiu ŝajnis al mi vana kaj tempoperda, mi opiniis devo por mi, kiel Prezidanto, defendi kaj defendigi la vidpunkton de la Akademio. Mi do petis de D^{ro} CORRET, Direktoro por la Teknika Vortaro, raporton pri *-i*, kiel sufikso por la landnomoj kaj, samtempe, noton de S^{ro} GROSJEAN-MAUPIN, Direktoro por la Komuna vortaro, pri la akuzativo, kiu ŝajnas al kelkaj esperantistoj vera, neutila komplikaĵo. Tiujn dokumentojn ricevis PRIVATE la L. K-anoj.

Nur du aŭ tri semajnojn poste, la 12 de Junio 1921, mi ricevis petskribon, regule subskribitan de kvin L. K-anoj pri la *io*-demando. Ĝin mi senprokraste transdonis al la Akademianoj por atenta ekzameno, sed, plilarĝigante la demandon, mi komisiis al S^{ro} GROSJEAN-MAUPIN, Direktoro por la Komuna Vortaro, la pezan taskon verki pri tiu ĉi demando, raporton pure objektivan, science metodan kaj pruve plenan, konsiderante ĉiuflanke kaj en ĝia tuteco la malfacilan kaj malsimplan problemon, profitante kaj kompletigante la antaŭajn partajn raportojn jam publikigitajn.

Petskribon pri tiu ĉi sama demando mi ankaŭ ricevis de S^{roj} ROLLET DE L'ISLE, Prezidanto de la Franca Societo por la propagando de Esperanto, J.-M. WARDEN, Prezidanto de la Brita Esperanta Asocio, A. J. WITTERYCK, Prezidanto de la Belga Ligo Esperantista, D^{ro} A. STECE, Prezidanto de la Germana Esperantista Ligo kaj aliaj. Dezirante, ke finiĝu, kiel eble plej baldaŭ la bedaŭrinda konflikto, ili proponas solvon akceptindan de ambaŭ partioj t. e. la uzon de *lando* (Germanlando k. t. p.), kiu estas tute Fundamenta kaj rajtas esti uzata apud la Fundamenta, regula formo *ujo*. Mi respondiis :

« Kiel Prezidanto mi tuj rajtas respondi al vi, — ĉar nenia alia respondo estas ebla, — ke la Akademio nur povas konsili al ĉiuj la uzon de la Fundamenta finiĝo *ujo*, sed ke, aliparte, ĝi tute ne povas malkonsili la uzon de *lando*, kiel sufikso, ĉar tia uzo, kiel vi mem rimarkas, estas plene regula kaj laŭfundamenta. »

Kaj nun mi firme esperas, ke ĉiuj Esperantistoj, komprenante la danĝeron de konfliktoj kaj de nesufiĉe pripensitaj decidoj, konsente

kaj propravole restos, ĝis definitiva pravigita solvo de la problemo, simple fidelaj, en la praktiko, al la Fundamento kaj al la Zamenhofa kaj tradicia uzado, ne enkondukante novan sufikson kaj profitante la diversajn nun ekzistantajn kaj regule permesitajn rimedojn. — La Akademio celas nur la pacon kaj akordon tute necesajn al la bono de nia komuna afero. Eble ĝia Prezidanto, en tiu ĉi afero, kelkafoje eraris en sia konduto — kaj, se ĉe Prezidanto eraro estas kulpo, kulpa li estas, — sed ĉu ĉiuj alportis al li la necesan, eĉ en kontraŭdiro amikan helpon? Ili de nun alportu ĝin, kaj ili povas esti certaj, ke liaflanke ne mankos la bonvola kaj samideana ĝentileco.

* * *

La sekcio por *Komuna Vortaro* tre bone laboris. Sr^o GROSJEAN-MAUPIN sendis al la L. K.-anoj tre zorge preparitan liston, kiu postulis de li grandan laboron. Ĉar la voĉdonado finiĝos nur la 15 de julio, mi povas tie ĉi nur anonci la raporton, kiun mi legos en la kunsido de la Lingva Komitato.

Por la *Teknika Vortaro*, Dr^o CORRET ankaŭ laboris siaflanke. Lian duan cirkuleron pri la organizo de la laboro en diversaj subkomisionoj mi konigos ankaŭ tie.

De la sekcioj por *Gramatiko* kaj por *Konkursoj* mi ne ricevis raportojn, sed kulpaj ni estas iliaj Direktoroj, ĉar, ricevinte nenium demandon specialan por la Gramatiko (1), nek librojn premiotajn, mi ne petis raportojn de la Direktoroj : se malprave, ili pardonu ! Necese estas, ke en estonteco tio ne plu okazu ; en oktobro mi petos de niaj gazetoj, ke ili bonvolu sciigi siajn legantojn, ke la Direktoro por Gramatiko estas ĉiam preta ekzameni gramatikajn demandojn kaj raportoj pri ili, kaj ke la Direktoro por Konkursoj, kies kompetenteco en tiu ĉi fako estas granda, zorge tralegos la senditajn rekompencotajn literaturajojn.

* * *

Restas lasta demando pri reorganizo de la *Lingvaj Institucioj*. Ke ĝi estas necesa, necesega, pri tio neniu povas dubi, via Prezidanto malpli ol kiu ajn. Sed la deziratajn sugestiojn li ne ricevis kaj pro malfeliĉaj

(1) Escepte pri la akuzativa problemo, kies solvon jam antaŭe studis Sr^o GROSJEAN-MAUPIN kaj pri kiu respondo estis urĝa.

cirkonstancoj, post vana atendo, lia alvoko povis aperi nur en la ĵus eldonita kajero de « Oficiala Gazeto ». Mi esperas, ke en Praha ni tute ĝentile, tute amike esploros tiun gravan problemon, kaj poste, antaŭ la fino de l' jaro, ni havos sufiĉajn dokumentojn por verki plenan raporton ekzaminotan kaj aprobotan de la Lingva Komitato antaŭ la estonta Kongreso.

* * *

Permesu, karaj samideanoj, ke, finante tiun ĉi jam tro longan raporton, — kiu montras, ke, se ni ne tiel multe laboris, kiel mi esperis : rapide fluas la monatoj ! ni tamen ne estis maldiligentaj, — mi rediru kun insisteco, ke nia interna unueco estas la ĉefa kondiĉo de nia sukceso. Se tiel energie, tiel obstine ni defendas la pure Zamenhofan lingvon, tio ne estas, ĉar ni opinias ĝin en ĉiuj detaloj la plej bona : ne fanatikeco estas nia fideleco, sed ĉar ni scias, ke nur per tia sintenado ni povas konservi la unuecon ĉu internacian, ĉu interklasan, ĉu interaĝan. El lingva vidpunkto ne ekzistas, ne devas ekzisti inter ni diversnaciaĵoj, diversklasaj homoj, diversaĝuloj : ni ĉiuj estas Esperantistoj, nur Esperantistoj. Ni neniam starigu nacion kontraŭ nacio, klason kontraŭ klaso, aĝon kontraŭ aĝo, sed unuanime, manon en mano, ni laboru por la venko de la kara lingvo, kiun donis al ni nia neforgesebla Majstro, D^{ro} Zamenhof !

Parizo, la 10 de Julio 1921.

Th. CART,

Prezidanto de la Lingva Komitato.

7. — RAPORTO DE LA PREZIDENTO DE LA KOMITATO DE LA KONGRESOJ

Laŭ la regularo de niaj kongresoj, la tasko de la Konstanta Komitato konsistas el du partoj : 1^o la preparado de la estontaj kongresoj ; 2^o la plenumo de la deziroj esprimitaj kaj de la decidoj alprenitaj dum la okazintaj Kongresoj. Sekve de tiu regularo, mi do devis, post la Haga kongreso, interkonsente kun miaj kolegoj de la Konstanta Komitato, zorgi pri la preparado de la Dektria Kongreso en Praha, kaj doni la necesajn sekvojn al la diversaj antaŭaj kongreslaboroj, kaj speciale al la decidoj de la lasta Kongreso.

DEKA KONGRESO.

En la raporto de la Konstanta Komitato al la Dekdua kongreso (O. G. N° 78-79, p. 18) ni sciigis pri la metodo sekvita de la Loka Komitato de la Dekka Kongreso, interkonsente kun la kuratoroj de la kongresa kaso, por definitiva starigo de plenaj kontoj pri la Dekka Kongreso, laboro speciale malfacila kaj malrapida pro la longe daŭrinta milito. Konforme al tiu interkonsentita metodo la kontoj estas fine starigitaj kaj publikigitaj en O. G. (N° 80, p. 76-78). Laŭ la propono de la Loka Komitato, kun konsento de la kuratoroj, oni dividis la restantan sumon en tri partoj pagotaj : 1° Al la Esperantista Centra Oficejo, kiel repago de la elspezoj faritaj por la kongreso (presado de preparaj dokumentoj, raporto, k. t. p.); 2° Al la kongresa Kaso por malgrandigi la deficiton kaŭzitan de antaŭaj kongresoj; 3° Al la Franca Societo por Propagando de Esperanto.

DEKDUA KONGRESO.

Post la Dekdua Kongreso, la Esperantista Centra Oficejo devis zorgi pri la ordigo kaj presado de la dokumentoj rilatantaj al tiu kongreso kaj precipe de la protokoloj de la kongresaj kunsidoj. Tiuj dokumentoj aperis en la N-oj 78-79 kaj 80 de la Oficiala Gazeto, kaj estis represitaj en aparta volumo senpage sendita, kiel kutime, al ĉiu kongresano.

Koncerne la kontoj de tiu kongreso, ili estis pretaj malpli ol ses semajnoj post la fino de la kongreso, kaj tion ni ŝuldas al la bona ordo, kaj sindonemo de niaj Nederlandaj Samideanoj, kiujn ni plezure gratulas pro tiu rapida reguligo de ĉiuj detaloj de la kongreso. Tiu unua postmilita kongreso cetere bone sukcesis, ĉar malgraŭ malvasta budĝeto pro la malgranda nombro de partoprenantoj, kaj la tamen ĉiel kontentigaj aranĝoj de laboroj kaj de distraĵoj, la kongresaj kontoj saldiĝas per kredita sumo de 5.520 frankoj. El tiu sumo oni devas depreni la sumon de 3.000 frankoj antaŭviditan en la budĝeto por repago al la Esperantista Centra Oficejo de la faritaj elspezoj por presado (preparaj dokumentoj, raporto, sendo de tiu ĉi, k. t. p.) post kio restas do neta profito de 2.520 frankoj. Tiuj kontoj estos tre baldaŭ publikigitaj.

PREPARO DE LA DEKTRIA KONGRESO.

Esplorinte la ricevitaĵajn invitojn por la dektria Kongreso, la Dekdua esprimis la deziron, ke post plua enketo oni eventuale okazigu la Dek-

trian en Praha (O. G. N^o 78-79, p. 69). Por konformiĝi al tiu decido, tuj post la dekdua kongreso, la Konstanta Komitato¹ interrilatis kaj interŝanĝis opiniojn pri tio, kaj ekrilatis kun la samideanoj en Praha. Fine, kolektinte ĉiujn informojn, la Konstanta Komitato decidis organizi la 13-an kongreson en la bela ĉefurbo de la juna Respubliko Ĉeĥoslovaka. Nia Komitato aprobis ankaŭ la elekton de la anoj de la Loka Komitato kaj akceptis la nomojn de S-roj Pitlik kaj Kamaryt por reprezenti tiun Komitaton en la Konstanta Komitato. Tuj post tiuj elektoj la Loka kaj la Konstanta Komitatoj interkonsentis pri la kongreskotizo, pri la datoj kaj programo de la Kongreso, kaj ni donis al la Loka Komitato ĉiujn instrukciojn, konsilojn kaj helpojn, kiujn ĝi petis por la sukcesa organizo de la Kongreso.

Nun ni povas ĝoji, ke la laborado de la Loka Komitato estas kronita per sukceso, kaj ĝoje konstati ke la 13-a Kongreso kunigas neesperite grandan nombron de partoprenantoj, kiuj pruvas al la mondo la ĉiam kreskantan forton de nia movado.

Laŭ la regularo, ni devus ankaŭ organizi voĉdonadon de Rajtigitaj Delegitoj laŭ la sistemo, kiu funkciis en Krakovo kaj Berno kaj devis funkcii en Paris. Sed, ĉar la postmilita organizo de nia movado ne estas ankoraŭ sufiĉe atingita, ni opiniis ke tiu voĉdonado estus malfacile organizebla. Efektive, el enketo farita pri tiu punkto rezultas, ke se kelkaj naciaj asocioj estas tute plene refunkciantaj, kaj tre dezirus revidi tiun regulan voĉdonadon, estas kelkaj, kiuj ne ankoraŭ povis plene reorganiziĝi, kun kiuj ni eĉ ne povas interrilati kaj kiuj ne estus tre kontentaj se oni voĉdonus kaj decidus sen ilia partopreno. Ili subtenas ke organizo de voĉdonado de Rajtigitaj Delegitoj en tiuj ĉi kondiĉoj ne donus ĝustan ideon pri la opinio de la esperantistaro en la mondo. Ni do decidis prokrasti la demandon ankaŭ por tiu ĉi kongreso, same kiel ni faris par la Dekdua.

Por solvi la demandon, ni do proponas, ke la Esperantistoj voĉdonu individue. Sed eble pro niaj spertoj estos permesite al ni doni al ili amikan konsilon. Estas urĝe necese, ke niaj kongresoj okazu en plena konkordo, despli ke nuntempe el ĉiuj flankoj rigardoj amikaj kaj malamikaj estas fiksitaj al ni. Ni do konsilas, ke la kongresanoj kunvenu laŭ nacioj antaŭ la kongreso, kaj ke por eviti ĥaosan kaj senfruktan diskuton por atingi per serioza kaj amika esploro de ĉiuj demandoj submetitaj al la Kongreso, sufiĉan unuanimecon en voĉdonado, ĉiuj nacio (aŭ lingvo) elektu iujn reprezentanton, kiun ili komisiis por diskuti je ilia nomo tiamaniere, ke la unuanimeco evitu la iafoje longan kaj malfacilan kalkulon de voĉdonoj.

Estas ankaŭ unu el la taskoj de la Konstanta Komitato prepari la laborajn kunsidojn de la kongresoj. Ni do kunigis la proponojn ricevitajn por esti submetotaj al la Dektria Kongreso, kaj ni publikigas je la fino de tiu ĉi raporto la diversajn tekstojn utiligotajn por tiuj kunsidoj.

KOMISIONO POR ĜENERALA ORGANIZAĴO.

Laŭ decido de la Dekdua Kongreso estas starigita Komisiono kun tasko prilabori planon por ĝenerala organizo de la tuta esperantistaro. Tiu Komisiono laboris senĉese de la dekdua kongreso ĝis nun. Ni metis je la dispo de ĝia Prezidanto ĉiujn dokumentojn, kiuj troviĝis en la arkivoj de la biblioteko de la Esperantista Centra Oficejo, kaj laŭ nia devo, ni publikigas aldone al tiu raporto, laŭ peto de S-ro Page, Prezidanto, la tekston de la raporto prezentota de li al la 13-a Kongreso.

Tiu Raporto estas la frukto de grava laboro, kiun faris S-ro Page, dum la tuta jaro studinte plene la organizan demandon kun helpo de la diversaj korespondadoj kun la aliaj komisionanoj. Bedaŭrinde, la tasko de nia meritplena Prezidanto estis tre malfacila pro la cirkonstancoj, kiuj malhelpis ke la anoj kunvenu kaj interdiskutu pri la temo. Tia interdiskuto estus tre rapidiginta la laboron. Okazis interparoloj inter S-roj Page, Warden kar S-ino Cense (ambaŭ lastaj reprezentantoj de la Esperantista Centra Oficejo) en Edinburgo, post la Brita Kongreso, okazis ankaŭ mallonga interparolo inter S-roj Arnhold, Chavet, Generalo Sebert kaj S-ino Cense en Paris okaze de la trapaso de S-ro Arnhold. Sed tiuj interparoladoj utilis nur por doni kelkajn klarigojn pri tia aŭ alia punkto kaj neniel anstataŭis plenan kunvenon de Komisionanoj.

Pro tiuj cirkonstancoj, la raporto de S-ro Page ne estas rezulto de plena interkonsento inter ĉiuj anoj de la Komisiono, sed li opinias, ke oni povos ĝin konsideri kiel tute akcepteblan bazon por serioza kaj fruktodona laboro.

La du reprezentantoj de la Esperantista Centra Oficejo (S-roj Warden kaj Chavet), decidis akcepti principe tiun projekton. Cetere, kunveno de la Komisionanoj povos eble okazi antaŭ kaj precipe dum la 13-a kongreso, kaj el tiu kunveno eble rezulti diversaj amendoj, kiuj modifus kelkajn detalojn de tia projekto, kaj kiuj estas konigotaj al vi dum la kongresoj kunsidoj.

DIVERSAJ PROPONOJ RICEVITAJ.

Projekto de S-ro Applebaum (Liverpool).

1. — Tiu bone prilaborita projekto celas kunigi la bonvolemon de la Esperantistaro por starigi per monokolekto monumenton sur la tombo de nia kara Majstro D-ro Zamenhof. La proponinto interkonsentis pri tio kun konataj Esperantistoj el diversaj landoj kaj ricevis de ili valorajn aprobojn kaj promesojn de helpo. La kongresanoj trovos tiun proponon je la fino de tiu ĉi raporto, kaj ni lasas al la kongreso la decidon pri tio, ĉu ĝi dediĉos al ĝi parton de laborkunsido, aŭ ĉu ĝi simple donos al ĝi moralan apogon por pli vasta diskonigo de la projekto al la esperantistaro de la tuta mondo.

Alvenis poste al la K. K. K. novan proponon pri la sama celo de la Pola Esperantista Societo, jene redaktita : « ... malfermi monkokolekton por fondo de monumento sur la tombo de nia Majstro kaj krei komisionon por organizo de la monumenta konkurso. »

Propono de la Pola Esperantista Societo.

2. — Jam dum la dekdua kongreso, kiel oni povos vidi per la ĝenerala raporto de tiu kongreso, oni diskutis pri propono de la Pola Societo. Kaj post longa diskuto la kongreso decidis ke pro la diversaj leĝoj, kiuj regas la Publikan Instruadon kaj la malsimila organizo de tiu instruado en ĉiuj landoj, ne estas rekomendinde, ke la Esperantistoj trudu al la Ligo de Nacioj tian klopodon, kiu estus certe senrezulto.

Niaj Polaj samideanoj, cetere kun plej bona intenco, reprezentas sian proponon al la Dektria Kongreso sub alia formo. Ni do donas la novan formon ĉi poste kaj la 13-a Kongreso decidu ĉu sub tiu ĉi nova formo la demando estas studinda. La sola deziro de la Konstanta Komitato estas, ke la laboraj kunsidoj estu regataj de ĉiama frata spirito, kaj ke tiuj laboroj ne estu laicigaj kaj senfruktaj diskutoj sed seriozaj, fruktoportaj laboroj indaj je pioniroj de granda ideo.

Propono de S-ro Ziegler.

3. — Ni ricevis de S-ro Gustav Ziegler, el München, alvokon pri fondo de eldona akcia Societo. Ni donas la tekston de la propono.

kiel por la aliaj, sed tiu afero povas esti nur privata entrepreno kaj ĝia sukceso dependas nur de la konfido donita aŭ donota al la entreprenanto, kaj en tiuj aferoj, la Konstanta Komitato opinias, ke la kongresoj ne povas enmiksiĝi. Se leginte tiun projekton la interesatoj deziras kunveni por pridiskuti la aferon inter si kaj fondi ĝin, la Konstanta Komitato petas la Lokan Komitaton doni al ili lokon por tio, laŭ peto kaj interkonsento, sed ke ĝi restu afero flanka de la kongreso.

Propono de la Prepara blindulkongresa Komitato.

4. — La Komitato por preparo de blindulkongreso en Praha proponas: ke la Kongreso studu la rimedojn helpadi la propagandon de Esperanto inter la geblinduloj. La proponoj alvenis tro malfrue, por ke ni ilin represu, sed la aŭtoroj povos, se la Kongreso konsentos, ilin prezenti. Cetere, laŭ la Kongresa Regularo, la anoj de specialistaj kunvenoj povas komuniki al la tuta Kongreso la rezultojn de siaj laboroj.

Propono de S-ro O. Rieck, poŝtdirektoro.

5. — Jen la mallonga teksto de tiu propono, lastamomente ricevitan:

« La XIII^a Universala Kongreso de Esperanto en Praha gratulas sinjoron A. Penido, Ĝeneralan Direktoron de l'Brazila Telegrafo pro lia permeso, ke la telegrafo funkciu senpage por la komitato kaj la delegitoj de la Sesa Brazila Esperanto-Kongreso. La Universala Kongreso deziras, ke la poŝtaj administracioj imitu la Brazilan ekzemplon moderigante la taksojn por Esperantaj skribaĵoj kaj presajoj, tiamaniere kondukante la mondhelpligon al ĝenerala uzado. »

PRI ESTONTAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

Pri la loko de organizo de la estontaj Kongresoj, ni jam notis la proponojn, jam principe akceptitajn, sed ne facile realigeblaj antaŭ kelkaj jaroj, nome *Kopenhago* kaj *Edinburgo*.

Por la XIV^a Kongreso, kiu okazos en la jaro 1922^a, ni ricevis oficialan inviton, en Esperanto redaktitan, de la Magistrato de *Wiesbaden* (Germanujo). Kaj ni sciigis, ke, laŭ propono de la loka societo, la libera urbo *Danzig* decidis inviti ankaŭ la venontan Kongreson, promesante sian tutan oficialan apogon. La Kongresanoj decidis, post aŭdo de la

argumentoj prezentitaj de la enlandaj samideanoj, kiu propono estos pli oportuna.

Por la XV^a Kongreso (1923), venis al ni propono de la Esperanta Asocio de Finnlando, ke ĝi okazu en *Helsinki* (Finnlando), laŭ decido de la VIIa Kongreso de Finnlandaj Esperantistoj, okazinta en Tempere (Marto 1921).

Laŭ la Regularo la Kongreso devos do esprimi sian opinion pri tiuj proponoj. Kaj pri la aliaj proponoj kiuj povos prezentiĝi lastamamente, kaj la Konstanta Komitato de la Kongresoj fine decidos kaj zorgos plejlatente pri la bona organizo de viaj estontaj Kongresoj.

REORGANIZO DE LA KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ.

Finante tiun raporton kiu certe estas mia lasta kiel Prezidanto de la Konstanta Komitato de niaj kongresoj, mi devas ankoraŭ pritrakti delikatan kaj penigan temon; nome pri mia persona situacio.

Pro mia granda aĝo kaj mia malbona sanstato, kiu definitive malebligas al mi longajn vojaĝojn, mi ne plu povas konservi la honorindan postenon, kiun konfidis al mi de longa tempo la bonvolo de la Esperantistoj.

Kiam, dum la jaro 1905, kun helpo de la bedaŭrata D-ro Javal, mi akceptis plenumi la insistan deziron de nia Majstro, kaj fondis la Esperantistan Centran Oficejon, mi nur intencis alporti al la estroj de niaj Oficialaj Institucioj la materialajn rimedojn, kiuj mankis al ili por efektivigi la regulan funkciadon de tiuj institucioj rapide kreitaj dum la Kongreso en Boulogne s/Mer, sen antaŭa prizorgo de necesaj monrimedoj.

Mi ne deziris esti unu el iliaj estroj, sed simple mi intencis zorgi pri la servoj alportotaj al la Esperantista Movado. Baldaŭ tamen, laŭ la propono de nia Majstro, kaj la multfoje ripetita peto kaj voĉdono de la sinsekvaj kongresoj, mi devis akcepti, kaj poste konservi la postenon de Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj, kiun mi plenumis dum pli ol dek-ses jaroj.

Plurfoje mi provis rezigni tiun pezan taskon. Jam dum la jaro 1912 mi sukcesis akceptigi de Profesoro Carlo Bourlet, la vicprezidantecon de tiu Komitato. Li certe bone kaj taŭge anstataŭus min, se la morto ne estus rabinta lin de ni tiel subite kaj tragike. Mi esperis trovi taŭgan posteulon dum la Dekaj Kongreso, sed vi scias, ke la okazintaĵoj ĉion

interrompis, kaj la reviviĝo de niaj kongresoj ankoraŭ trovas min je mia posteno.

Sed nun, se mi povos ankoraŭ, malgraŭ multnombraj malfacilaĵoj, zorgi pri la gvidado interna de la Esperantista Centra Oficejo, kaj doni helpon al la sindonemaj oficistoj de tiu servema Instituto, mia stato devigas min resti for de niaj kongresoj kaj pro tiu foresto, mi ne plu povas akcepti taskon, kiu trudas al la akceptinto devojn, kiujn mi ne plu povas plenumi. Por plenumi tiujn devojn mi do petas vin, estimataj kaj karaj gesamideanoj, ke vi bonvolu, laŭ la regularo de niaj Universalaj kongresoj, elekti Prezidanton de la Konstanta Komitato por la venontaj kongresoj. Pro la konfido, kiun vi ĉiam montris al mi, permesu, ke mi faru al vi sugestion, kiun mi esperas, vi bonvolos akcepti.

Vi facile povus trovi novan prezidanton en la rondo de la nunaj anoj de la Konstanta Komitato, kiuj jam montris sian kapablon por gvidi la laborajn kaj organizon de niaj Kongresoj. Se S-ro Warden, pro siaj tro multaj okupadoj ne povos favore respondi al la propono, mi esperas, ke S-ro Isbrücker bonvolos akcepti tiun postenon, pri kies plenumado mi promesas, ke mi daŭrigos kunlabori per miaj tutaj fortoj, kiel kondukanto de la Esperantista Centra Oficejo, kun la sekretarioj de tiu Oficejo.

Mi ankoraŭ povas aldoni, ke mi ĉiam intencas, kiel promesis en mia nomo S-ro Bourlet, dum la Krakova Kongreso, donaci al la Esperantistoj, aŭ pli ĝuste al la Societo de Amikoj de Esperanto, la enhavon de la Esperantista Centra Oficejo kondiĉe, ke mi trovos sufiĉan garantion por la estonta subtenado de tiu Oficejo, kion ĝis nun ne sufiĉe atentis la Esperantistaro.

Adresante tiujn lastajn, adiaŭajn salutojn al la ĉeestantaj, kaj eĉ al forestantaj samideanoj, mi fine esprimas la esperon, ke ili sukcesos firmigi la konstantan unuecon kaj la veran konkordon de ĉiuj Esperantistoj en la Mondo. Al tiu celo mi plene dediĉis miajn fortojn, kaj mi esperas, ke antaŭ la fino de mia vivo mi tiamaniere vidos la plenan sukceson kaj plenan triumfon de miaj deziroj por la bono de nia Esperanta Movado.

*La Prezidanto de la Konstanta Komitato
de la Kongresoj :*

H. SEBERT.

ALDONOJ

I

TUTMONDA MONKOLEKTO POR MONUMENTO AL DR-O LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF

LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF estis unu el la geniuloj de la mondo. Tion la historio baldaŭ konstatos. Li donis al la homoj la internacian lingvon Esperanto, kiu jam realigis la malnovan revon je tutmonda lingva kompreno kaj vekis ĉe siaj adeptoj senton de homa interfratiĝado. Lia verko forte enradikiĝis en miloj da koroj tra la tuta mondo. kaj jam portis fruktojn en la rilatoj de homoj el diversaj popoloj kaj lingvoj, rasoj kaj kredoj, kaj en la laboro de sindonaj samideanoj, kiuj entuziasme klopodas por ĝin disvastigi.

Ĝis nun lia tombo en la hebrea enterigejo en Varsovio atendas taŭgan monumenton. Dum la lingvo, kiun li kreis, restos por ĉiam lia plej nobla monumento, estas dece, ke sur lia lasta ripozejo La Esperantistoj, kiuj lin amis kaj admiris, starigu monumenton, altrangan je digno kaj edifo, kiu simboligos tiun amon kaj admiron, kiel lian epokfarantan elpensitaĵon.

La celo de la nuna alvoko estas havigi la subtenon de la Esperantistoj por la monsumo bezonata por tiu unika memoraĵo. Neniu dankema koro detenu sin de la ofero de eĉ sumeto por tiu bela celo. Kiel la Poloj, liaj samlandanoj, alportis el ĉiuj anguloj de sia lando bulojn da tero por monumento al Kosciuszko, la Pola nacia heroo, tiel ankaŭ el ĉiuj anguloj de la mondo ĉiu Esperantisto alportu sian moneron por la konstruo de tiu unika monumento sur la tombo de la kara Majstro.

La Organiza Komitato konsistas el :

S-ro J. M. Warden, Vic-prezidanto de la Akademio Esperanta.

S-ro W. M. Page, Advokato, 31 Queen Street, Edinburgh, Honora Kasisto.

S-ro J. D. Applebaum, 11 Mayville Rd. Mossley Hill. Liverpool. Hon. Sek.

Ili kolektos la monon per sistemo de Kupon-kartoj (Vidu apartajn notojn).

Por la desegno de la monumento estos malfermata internacia konkurso, kaj la konstruon de la monumento en Varsovio prizorgos loka

Komitato, jam strarigita, kiu konsistas el : D-ro Ignac Dubrowicz D-ro J. Krenicki, S-ro Lankopolanski, D-ro W. Robin, Inĝ. Ig. Teichfeld, kaj Juĝisto Jozef Littauer.

La mono kolektita estos uzata por la monumento, kaj, se restos sumo, por alia taŭga memora celo.

La projekto estas aprobata de S-ino Zamenhof kaj la familianoj de la Majstro.

Ni tutkore rekomendas la projekton al la simpatio de la Esperantistaro.

La projektita plano.

MONKOLEKTO PER SISTEMO DE KUPON-KARTOJ.

La Organiza Komitato eldonas Kupon-kartojn kun gravurita portreto de la Majstro, kaj kun teksto klariganta la celon.

Ĉiu serio de kartoj havas certan valoron konforme al la monsystemoj kaj la ekonomiaj kondiĉoj de la diversaj landoj. Ekz. 20-ŝilingoj aŭ Svisaj Frankoj, 50 frankoj Francaj, 100 Mk. Germanaj, k. t. p. La karton ĉirkaŭos 20 kuponoj kun la sama bildo de la Majstro, ĉiu valoranta la dudekonon de la tuta karto. Oni povos do akiri aŭ plenajn kartojn, aŭ nur kelkajn kuponojn. Tio donos la oportunon al ĉiu samideano kunhelpi tiom, kiom li kapablas.

La kartoj kaj kuponoj estas la sola kvitanco al la pagintoj.

Kun la afabla helpo de la Naciaj Societoj Esperantistaj kaj de la reprezentantoj de U. E. A. tiuj kupon-kartoj estas disvenditaj inter la Esperantistaro kaj la simpatianoj tra la tuta mondo.

La Organiza Komitato difinos filiojn kaj agentejojn, kaj fiksos iliajn kondiĉojn kaj respondecojn. La Agentoj nur vendos plenajn kartojn, la vendado de kuponoj prizorgos sindon j samideanoj, kiuj kompanse konservu la mezan parton de la Kupon-karto-kun la portreto.

Estos eldonata la kvanto da Kupon-kartoj necesa por provizi ĉiujn revendistojn. Post sufiĉa vendo, la nevenditaj plenaj Kupon-kartoj estos reprenitaj. Mi taksas la bezonon de proksimume £ 500 sterlingaj.

La Organiza Komitato aranĝas la tutan kolektadon, okazigas internacian konkurson pri la monumento, ĝin mendas kaj pagas.

La Loka Komitato en Varsovio konstruigas la monumenton kaj zorgos por ĝia konservado.

La iniciatintoj devas aprobi ĉiujn gravajn decidojn.

La Esperantistaj Gazetoj enhavos regule informojn pri la progreso de la kolekto kaj la kalkulo.

La Universalaj Kongresoj de Esperanto decidis pri la raportoj de la Organiza Komitato kaj pri uzado de eble restanta monsumo.

Por la Organiza Komitato kaj la Iniciatoj :

J. D. APPLEBAUM, *Honora Sekretario*.

II

ALVOKO DE POLA ESPERANTISTA SOCIETO AL LA ESPERANTISTARO

Oni opiniis, ke sufiĉas varbi la parlamentajn delegitojn por nia ideo, por ke la decido pri deviga enkonduko de Esperanto en la lernejojn, unufoje prezentita al la parlamento, estu akceptota per la delegitaro. Ho! kiel-naiva iluzio! Oni supozis, ke la delegito ne estas influata per la opinio de siaj elektantoj kaj pensis, ke se la delegitoj eĉ decidus ion kontraŭ la volo de ili, oni tion ne povus iamaniere nuligi. Tiu vojo ne gvidas al celo en la konstitucia ŝtato.

Por enkonduki Esperanton en ĝeneralan mondan uzadon, estas necese, ke ĝi estu enkondukata en ĉiuj landoj, sekve per ĉiuj parlamentoj, aŭ almenaŭ per plimulto da ili. Efektive, se ni supozus, ke en iu parlamento troviĝus sufiĉa kvanto da delegitoj favoraj por nia ideo, tiam Esperanto enkondukita en tiu ĉi lando estus sen granda signifo por la landanoj, ĉar en aliaj landoj ĝi estus konata nur de la malgrandaj ĝisnunaj grupetoj.

Ni proponas tial samtempe demandi enkete ĉiujn parlamentojn : « Ĉu la parlamento akceptus Esperanton, eltrovitan de D-ro L. Zamenhof kiel oficiale internacian helpan lingvon, kaj enmetus ĝin en la programon de la lernejoj en la lando, se samtempe ĉiuj aliaj parlamentoj aŭ almenaŭ la plej gravaj same farus? »

Tiamaniere formulinte la demandon ni sukcesos, ke la parlamento de la lando A, B, C, ktp. akceptinte tiun proponon, estos devigata al nenio, se aliaj parlamentoj la proponon ne akceptos; kontraŭe, se aliaj parlamentoj ĝin akceptos, estos jam la bazo por la konkreta postulo, ke Esperanto estu enkondukata en la lernejojn de la lando.

Por tiu enketa laboro necesa estas komisiono, kin ĝin organizus. Ĝi estos kreota kaj sankciota de la kongresa esperantistaro.

Propono.

« Pola Esperantista Societo, konsiderinte ke nia ĉefa taktika celo en la realigo de nia programo estas inklinigi la ŝtatojn enkonduki Espe-

ranton en la lernejojn, kiel devigan lingvon, petas XIII-an Universalan Kongreson de Esperanto en Praha, ke ĝi elektu komisionon, kiu sin turnos al ministerioj de la publika instruado en ĉiuj konstituciaj parlamentaj ŝtatoj, proponante, ke ĉiu el ili promesu eventuale enkonduki Esperanton, kreitan de D-ro Zamenhof, en la programon de la lernejoj de sia lando, kiel oficiale internacian, helpan lingvon, *se samtempe* ĉiuj aliaj, aŭ almenaŭ la plej gravaj el ili, ankaŭ konsentos fari la samon. La komisiono finos sian taskon post la publikigo de la rezultatoj de tiu ĉi enketo. »

III

PROPONO PRI FONDO DE ELDONA AKCIA SOCIETO

Por ĉiu lando aŭ grupo de landoj fondiĝu plej baldaŭ « eldona akcia societo », kies sola celo estu ebligi la eldonon (en mondformato !) de ĉiaj bonesperantaj kaj valoraj libroj kaj broŝuroj — sen konsidero ankaŭ de ties sociaj, rasaj, religiaj kaj nacilingvaj tendencoj, kiom ĉi tiuj ne kontraŭas la enlandan leĝaron. Helpante tiamaniere ĉiujn, eĉ la plej kontraŭajn movadojn samgrade kaj neniel prirespondante la enhavon mem de la eldonaĵoj, ĝi estos vere neŭtrala kaj nepre neriproĉinda, tiom pli ke ĝi neniam trudos al iu tiun aŭ alian ne plaĉantan al li verkon. Laŭ mia firma konvinko ĝuste tia societo kaŭzos konkuron, kiu treege povos rapidigi la kreigon de riĉa Esperanto-biblioteko ĉiuspeca.

Kvankam el tio per si mem rezultos plej bona propagando de nia kara lingvo, ni duobligu la utilon, ligante la eldonajn akciajn societojn kun la koncernaj naciaj Esperanto-asocioj propagandaj tiel, ke ĉi tiuj eblan mongajnon senpere povu uzi por ĝenerala propagando de Esperanto. Al tio certe ne kontraŭstaros samideano, al kiu ajn partio li apartenos private. Kalkulante jam nun je ebla mongajno, mi supozas — ĉu malprave? — ke almenaŭ komence ne malmutaj akciuloj volonte cedos malgradan profiton personan al la bono de nia komuna afero.

Se plena koncentriĝo montriĝos dezirinda, kunfando de la landaj societoj en universalan estos ebla, kiam la internaciaj rilatoj tute normaligiĝis.

La naciaj Esperanto-asocioj ekzameni kaj al kompetentuloj komisiu la preparon de realigeblaj planoj.

Gustav ZIEGLER,

Steinheilstr. 10/31 ks., München (Bayern).

IV

RAPORTO PRI INTERNACIA ORGANIZO
DE ESPERANTISTOJ

La XII-a Universala Kongreso de Esperanto en *Hago*, en Aŭgusto, 1920, akceptis la jenan rezolucion :

« *La Kongreso opinias necesa, ke estu baldaŭ starigata ĝenerala organizo internacia de la individuaj Esperantistoj por subteni la necesajn centrajn instituciojn. Ĝi petas la Centran Oficejon en Parizo kaj la Komitato de U.E.A. formi komisionon por prepari planon kaj publike raporti antaŭ la printempo. Tiu komisiono konsistu el du reprezentantoj de C.O., du de U.E.A., kaj tri personoj elektotaj de la Kongreso.* »

Konforme al la deziro de la Kongreso, la Esperantista Centra Oficejo (E.C.O.) kaj U.E.A. formis komisionon, kaj difinis kiel siajn reprezentantojn, la E.C.O., S-ron John Mabon WARDEN, *Edinburgo*, kaj S-ron Gabriel CHAVET, *Parizo* (kun S-ino E.F. CENSE, *Parizo*, kiel anstataŭantino); kaj U.E.A., S-ron Edward STETTLER, *Berno*, kaj D-ron Edmond PRIVAT, *Genevo*. La Kongreso jam elektis D-ron Heinrich ARNHOLD, *Dresdeno*, S-ron W.M. PAGE, *Edinburgo*, kaj S-ron Louis PONCET, *Lyon*.

La Komisiono elektis S-ron PAGE ĝia prezidanto.

Ne por la unua fojo Komisiono studas la demandon pri organizo por subteni la necesajn centrajn instituciojn de Esperanto. La Sepa Universala Kongreso de Esperanto en *Antverpeno* (1911) starigis Komisionon por studi kaj raporti dum la Oka Kongreso en *Krakovo* (1912) pri la jenaj demandoj :

1. Ĝenerala organizaĵo por doni firman bazon al la oficialaj institucioj (Komitato de la Kongresoj, Lingva Komitato, Centra Oficejo), kaj por ilin subteni kaj interligi;
2. Unuiĝo de la naciaj Esperantistaj Societoj;
3. Amikaj kaj efikaj rilatoj inter la propagandaj, aplikaj, kaj fakaj societoj, kiel ekz. U.E.A.

Tiu Komisiono ne povis plene raporti ĉe *Krakovo*, sed ĝi projektis la Internacian Unuiĝon de Esperanto-Societoj, kies regularo estis submetata al la Kongreso en *Bern*. La Berna Kongreso aprobis la kunordigon de la Esperantistaj institucioj kaj la publikigon de la teksto de

tiu kunordigo, laŭ la plano montrita en la aldono de la raporto. Ĝi akceptis la principon de Unuiĝo de Esperanto-Societoj, kaj rekomendis la naciajn societojn finstarigi tiun kuniĝon, kies unua kunveno de delegitoj okazus en Parizo dum la X-a Kongreso en 1914. La milito venis tuj antaŭ la Kongreso, kaj pro tio la organiza demando estas ankoraŭ nesolvita.

I

La ĉefaj nunaj internaciaj organizoj de Esperanto estas :

1. Lingva Komitato kaj Akademio;
2. Konstanta Komitato de la Kongresoj;
3. Esperantista Centra Oficejo, kun Oficiala Gazeto Esperantista;
4. Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Societoj (ankoraŭ ne plene funkcianta);
5. Societo de Amikoj de Esperanto;
la sidejo de kiuj estas en *Parizo*; kaj
6. Universala Esperanto-Asocio (U.E.A.) kun la gazeto « *Esperanto* »; kies sidejo estas en *Genevo*.

LINGVA KOMITATO KAJ AKADEMIO

La Lingva Komitato estas unue provizore kreita ĉe la Unua Kongreso de Esperanto (*Bulonjo-ĉe-Mar*, 1905). Tiu Kongreso decidis, ke la Komitato : « decidis mem pri sia organizado kaj funkciado, ĉu elektante oficistaron, ĉu dividiĝante en grupojn. »

En 1908 la Lingva Komitato akceptis regularon por sia funkciado, kaj *inter alia* starigis *Esperantistan Akademion* de 18 anoj, kies devo estas esplori la demandojn submetitajn al la L.K., kaj formuli decidojn laŭ la opinioj kolektitaj pri tiuj demandoj ĉe la lingvokomitatoj. La nombro de lingvokomitatoj ne estas limigita, kaj novaj membroj estas elektataj de la Akademio el proponoj de diversspecaj gravaj Esperantistaj societoj, de la lingvokomitatoj, kaj de la anoj de aliaj altaj Esperantistaj institucioj. Komitatano estas elektata por naŭ jaroj. Akademianoj estas elektataj de la lingvokomitatoj kaj la estraro.

La regularo ne entenas provizon por financa subteno de la Komitato, kaj ĝis nun la elspezojn devis prizorgi privataj personoj.

La komitato mem decidas pri ŝanĝoj de reguloj.

La tasko de la komitato estas zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evoluon.

KONSTANTA KOMITATO DE LA KONGRESOJ.

En la Unua Kongreso ankaŭ estas kreita Organiza Komitato, por organizi la venontan Kongreson, kaj esplori interkongresajn demandojn. El tiu Komitato stariĝis la Konstanta Komitato de la Kongresoj (K.K.K.), kiu laŭ decido de la Kvara Kongreso (*Dresdeno*, 1908) konsistas el :

1. Du anoj de la Komitato de la antaŭa Kongreso;
2. Du anoj de la Komitato de la nuna Kongreso;
3. Du anoj elektitaj por ĉiu Kongreso decidita por la venontaj jaroj;
4. Unu prezidanto (kaj se necese unu vic-prezidanto) senpere elektita de la Kongreso mem;
5. Unu ĝenerala sekretario, same elektita de la Kongreso kun la nombro necesa de sekretarioj-adjunktoj, almenaŭ unu por Eŭropo, kaj unu por ĉiu alia kontinento, kie okazas Kongreso.

La K.K.K., laŭ ĝia propra regularo, ne havas difinitan financon subtenon, sed laŭ la regularo de la Kongresa Kaso, ĝi elektas tri diversaciajn kuratorojn por administri la Kongresan Kason.

ESPERANTISTA CENTRA OFICEJO

En 1905 en 51 rue de Clichy, *Parizo*, fondiĝis la *Esperantista Centra Oficejo*. En letero de la 17-a de Februaro 1906, presita en *Oficiala Gazeto*, vol. I, p. 234, D-ro ZAMENHOF skribis :

« La Centra Oficejo ne estas ia leĝdonanta komitato; ĝi estas simple *oficejo*, ĝi estas simple *loko*, en kiu koncentriĝas la laboroj de la du komitatoj, kreitaj de la Bulonja Kongreso. La Kongreso kreis provizoran Lingvan Komitaton kaj provizoran Organizan Komitaton, sed ĝi donis neniam monajn rimedojn, por ebligi al la ambaŭ komitatoj sukcesan laboradon; tiam troviĝis sindonaj kaj malavaraj esperantistoj, kiuj el sia propra poŝo donis (almenaŭ por la unua tempo) la necesan monon, luis apartan loĝejon, en kiu povus koncentriĝi la laboroj de la ambaŭ komitatoj, ĉiuj dokumentoj, ĉiuj leteroj, irantaj al la ĉiuj komitatoj kaj de la komitatoj; ili ankaŭ difinis kelkan salajron por aparta sekretario. »

En cirkulero datita la 6an de novembro 1905, O.G. vol. I, p. 233, estas dirite :

« La Esperantista Centra Oficejo restis, ĝis nun *privata fondaĵo*, organizita per la iniciato de kelkaj amikoj de Esperanto, kaj finance sub-

tenata de ili; sed ĝiaj fondintoj intencas, por certe daŭrigi ĝian ekzistadon, fondi, se estas necese, specialan Societon de Amikoj aŭ Protektantoj de Esperanto, kiu sin okupus pri la direktado de tiu Oficejo. »

La Kvara Kongreso (*Dresdeno*, 1908) esprimis la deziron, ke estu formata speciala societo por daŭrigi la funkciadon de la Centra Oficejo. (O.G., vol. I, 156.)

Per la regularo de la Centra Oficejo, aprobita de la Sepa Kongreso (Antverpeno) 1911, (O.G., I, 142) la celoj de la Oficejo estas formale montritaj. Ĝi interalie diras :

1. La Esperantista Centra Oficejo estas oficiale komisiita por funkcii la servojn de sekretario de la oficialaj Esperantistaj Institucioj, tio estas de la Institucioj, kies kreadon regule deziresprimis la Universalaj Kongresoj de Esperanto aŭ la Rajtigataj Delegitoj de la Esperantistaj Societoj, kaj *kies subtenadon devas regule provizi tiuj Societoj.*

2. La Oficialaj Institucioj kiujn la E.C.O. devige helpas estas :

La Konstanta Komitato de la Kongresoj;

La Lingva Komitato kaj Akademio;

Oficiala Gazeto kaj Esperantista Dokumentaro, organoj de tiuj Institucioj.

La aliaj entreprenoj, kiuj laŭ peto ĝi povos eble utile helpi, laŭ siaj agadaj rimedoj estas :

La Tutmonda Esperantista Societaro;

La ĝeneralaj verkoj pri statistiko de Esperanta movado.

La Informa Bulteno por ĝenerala propagando de Esperanto.

La bibliografiaj verkoj pri Esperanta literaturo.

3. La Ĝenerala Sekretario estas submetita al kontrolo de Administra Komitato, formita el delegitoj regule elektitaj de la partoprenantoj al la subtenado de la Centra Oficejo.

4. La anojn de la Administra Komitato elektas la Esperantistaj naciaj societoj, ĝenerale po unu delegito por ĉiuj mil anoj aliĝintaj.

6. La proksimuma sumo necesa por la funkciado de la Centra Oficejo estas fiksota ĉiujare per decido de la Administra Komitato. La dispartigo de tiu sumo inter la diversaj landoj estas farita proporcie je la disvastigo de la movado en ĉiu lando. Ĉiu societo, kiu partoprenas al la subtenado de la Oficejo devas zorgi pri la kolekto kaj ĝustatempa sendado de la mono.

7. Oni alkonfidas al Societo de Amikoj de Esperanto la organizadon de konstanta internacia monoferado, kiu celos starigi la garancia kapitalo difinita por provizi la mankojn eventuale rezultantajn de la suprediritaj agmanieroj.

8. La anoj de la Administra Komitato verkas sian internan regularon. Ili elektas prezidanton kaj vic-prezidanton. Ili kunvenas ĉiujare, almenaŭ unufoje dum la Universala Kongreso.

En la jaro 1912 Generalo SEBERT, kiu en tiu tempo portis la tutan finanĉan respondecon por la Centra Oficejo kaj ĝiaj havaĵoj kaj ŝuldo transdonis ĝin senŝulde al la Esperantistaro. (O.G., vol. V, p. 137.) La Oka Kongreso dankis lin, kaj esprimis la deziron, ke la oficialaj servoj de la Centra Oficejo (L.K., K.K.K., kaj O.G.) estu plene apartigitaj for de aliaj servoj, kaj submetitaj al la regado de la Administra Komitato.

Poste la Administra Komitato dividis la Oficejon en du sekciojn :

(a) Pri la diritaj oficialaj institucioj, kaj

(b) Pri la ĝenerala propagando.

La Oficejo estas registrita laŭ la franca leĝo pri Asocioj je la 18-a de decembro 1911.

SOCIETO DE AMIKOJ DE ESPERANTO

Ĉi tiu Societo estas la Societo al kiu, laŭ la regularo de E.C.O., par. 7, estas alkonfidata la organizado de konstanta internacia monoferado por la funkciado de la E.C.O. Ĝia statuto estas registrata laŭ franca leĝo la 11-an de decembro 1919.

La Societo celas helpadi la fondaĵojn kreitajn por diskonigi kaj uzadi Esperanton. Ĝi sekvas la programon aprobitan de la Kongreso de *Bulono* en 1905 por la fondo de E.C.O. La societa sidejo estas fiksita en Parizo, ĉe la sidejo de E.C.O, sed ĝi povas esti translokita en ĉiun alian lokon en Francujo, laŭ decido de la Administra Komitato.

Estas du specoj de anoj : Asociaj anoj, kiuj pagas minimuman jarkotizon de 25 frs., kaj Aliĝintaj anoj, kiuj pagas minimuman jarkotizon de 10 frs. Anoj, kiuj pagas al la Societo 500 frs. kiel anstataŭaĵon de kotizo, ricevos la titolon bonfarantoj.

En la Societo, Esperantistaj grupoj povas esti reprezentataj de delegitoj. Ili pagas la kotizon de asociaj anoj.

La Societo estas administrata de Konsilantaro de 6 ĝis 28 anoj, elektitaj por ses jaroj de la ĝenerala kunveno. Sep francoj estas nomitaj kiel anoj de la unua konsilantaro.

La Konsilantaro elektas estraron. Ĝi sola disponas pro iu ajn kaŭzo, pri ĉiuj havaĵoj kaj bienoj, kiuj dependas de la societa kapitalo aŭ apartenas al la societo.

La statuto povas esti ŝanĝita nur laŭ propono de la Konsilantaro, aprobita de la ĝenerala kunveno. Tiu aprobo estas laŭrajta nur, se la

kunveno enhavas almenaŭ la duonon el la anoj de la societo, kaj se ĝi estas voĉdonita de du trionoj el la ĉeestantaj anoj.

INTERNACIA UNUIĜO DE ESPERANTISTAJ SOCIETOJ

Ĉi tiu organizo celas interligi la Esperantistajn societojn. Laŭ la regularo (O.G., vol. VI, p. 89) submetita al la Kongreso en *Berno* (1913) ĝia sidejo estas ĉe E.C.O. La societoj, kiuj aliĝas al la Unuiĝo, pagas kotizon, kiu donas al ili la rajton ricevi la servon de la E.C.O. kun ĝiaj oficialaj publikajoj. Nur tiuj societoj povas partopreni en la elekto de rajtigitaj delegitoj al la Kongreso, unu delegito por 25 elektantoj, kiuj pagas la jaran fiksitan kotizon. Ili solaj rajtas partopreni en la elekto de la Administra Komitato de E.C.O. po unu delegito por mil elektantoj, aŭ por ĉiu nacia societo, eĉ se ĝi ne havas tiun nombron.

La estraro ne rajtas mem alpreni decidojn. Ĝi povas nur formuli dezirojn aŭ esprimi konsilojn. La estraro estas speciale komisiita por internacie reprezenti la Esperantistaron apud la registraroj. La anoj de la estraro starigas mem la regularon por la funkciado de la Unuiĝo.

KONGRESOJ

En la Kongreso en *Antverpeno* (1911) estas decidite, ke la decido de Internacia Esperantista Kongreso estas deviga por la Oficialaj Esperantistaj Institucioj, t. e. la institucioj kreitaj kaj subtenataj laŭ deziroj de la Kongresoj, aŭ laŭ decidoj de rajtigitaj delegitoj. (O.G., vol. IV, p. 141.)

Ĉiu, kiu pagas la kotizon kaj submetiĝas al la Kongresa regularo havas la rajton partopreni en kongreso; sed rajton de voĉdono havas nur la rajtigitaj delegitoj.

Rajtigitaj delegitoj estas elektitaj de grupo aŭ societo po unu por 25 membroj, kaj ĉiu delegito havas tiom da voĉoj kiomfoje po 25 membroj havas la grupo aŭ societo, kiun ĝi reprezentas.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (U.E.A.)

El ĉiuj ne-oficialaj institucioj de la Esperantistoj U.E.A. estas la plej grava.

Ĝi estas fondita en la jaro 1908, laŭ la iniciato de S-ro Hector HOLLER, *Genevo*, kaj S-ro Th. ROUSSEAU, *Dijono*, ambaŭ mortintaj. La iniciatintoj opiniis, ke Esperanto vivos, ne nur kiam estas propagandō,

sed ankaŭ ekzistas anoj da personoj, kiuj uzas la lingvon por siaj bezonoj, same kiel oni uzas nacian lingvon. Ili kreis U.E.A. do per praktikaj kaj idealaj celoj. Per delegitoj lokitaj en diversaj regionoj de la mondo U.E.A. prezentis unikajn utilajn internaciajn servojn. Ĝi ankaŭ eldonas monatan gazeton « Esperanto », kiel sian oficialan organon. En 1914 U.E.A. kalkulis 7,233 membrojn. Ĝia centra oficejo troviĝas en *Genevo*.

U.E.A. havas apartan kongreson, kiu kutime okazas samtempe kaj samloke kun la Universala Kongreso de Esperanto. Al la 6-a Kongreso de U.E.A. okazinta en *Hago* estis submetita nova statuto, kiu provizas por ĝia estonta funkciado kaj evoluado laŭ zorge elpensita plano bazita sur la jam akirita sperto. La detaloj estas tro komplikaj por esti skizitaj en ĉi tiu raporto.

ALIAJ INTERNACIAJ SOCIETOJ

Oni devas noti, ke ekzistas ankaŭ internaciaj societoj de Esperantistoj, kiuj faras utilajn laborojn, kiuj havas amikajn rilatojn kun la diritaj institucioj, kaj povas esti pli intime ligitaj kun ili, nome : Esperantista Literatura Asocio, kies oficejo estas en *Dresdno*; Internacia Societo de Esperantistaj Juristoj; Internacia Scienca Asocio, kaj multaj aliaj.

II

Studinte la suprediritajn regularojn kaj statutojn oni konstatas, ke ekzistas inter la Esperantistoj du ĉefaj centroj de ĝenerala internacia laboro, *Parizo* kaj *Genevo*. En *Parizo* centriĝas la tiel nomataj oficialaj institucioj kreitaj de la Unua Universala Kongreso de Esperanto — la Lingva Komitato kaj la Konstanta Komitato de la Kongresoj. Regulojn por tiuj institucioj sekvintaj kongresoj starigis. La grava Esperantista Centra Oficejo, kiu havas lokon en *Parizo*, estas privata fondaĵo, organizita de kelkaj amikoj de Esperanto kaj finance subtenata de ili ĝis tiu tempo en kiu la Esperantistoj mem povos akcepti la tutan respondecon por ĝia funkciado. Al tiuj malavaraj amikoj la tuta Esperantistaro ŝuldas eternan dankon, ne nur pro la multvaloraj oferoj, kiujn ili faris sed pro la fakto, ke je kriza tempo ili savis niajn oficialajn instituciojn el la manoj de kontraŭuloj de nia afero. Kvankam la Antverpena Kongreso en 1911 metis la Centran Oficejon sub la kontrolo de Administra Komitato elektita de la Esperantistaj naciaj societoj, kaj alkonfidis al la Esperantistaj societoj kaj al la internacia mono-

ferado organizota de la Societo de Amikoj de Esperanto la financon subtenon de tiuj institucioj, preskaŭ la tutan subtenon de tiuj institucioj ankoraŭ provizas la samaj personoj kiel antaŭe. Efektive la maŝinaro por enspezigi la necesan monon ne estas facile funkciebla.

La E.C.O. estas la redakto de la *Oficiala Gazeto Esperantista*. Ĝi ankaŭ estas la sidejo de aparta organizo — la Internacia Unuiĝo de Esperantistaj Societoj — kiun oni ekkreis por interligi la Esperantistajn societojn. Al tiu Unuiĝo aliĝis 15 naciaj societoj, kiuj nomis siajn delegitojn, kies unua kunveno estis okazonta en Parizo en Aŭgusto 1914, sed pro la malhelpo de la milito, ili ne povis kunveni, kaj la Unuiĝo neniam aktive funkciis.

Traleĝante la broŝuron *Fundamentaj Dokumentoj pri la Oficialaj Institucioj de Esperanto* 1914, eldonitan de E.C.O., oni konstatas, ke ekzistas apartaj regularoj por la L.K., la Kongresoj, la E.C.O., la Administra Komitato, I.U.E.S., kaj I.S.A.E. Ili estas interplektitaj kaj tamen sendependaj, kaj estas tre dezirinde, ke ili estu kunigitaj en unu sola statuto, kun aparta interna regularo por ĉiu fako. Plue la Komisiono opinias, ke la aranĝoj de la regularoj ne efike trafas la individuajn Esperantistojn kaj Esperantistajn societojn. Kompreneble neniu intencas devigi ĉiujn Esperantistojn subteni la oficialajn instituciojn, kvankam ĉiu Esperantisto devus konsideri tion kiel sian devon; sed se la Esperantistoj volas esti konsiderataj kiel matura organizo, ili devas provizi la vivrimedojn por tiuj institucioj, kies bezono estas de ĉiuj konata, kaj kiujn kreis la unuaj pioniroj de la ideo por la bono de la lingvo. Plie kiam la Esperantistoj vivigos mem tiujn instituciojn ili rajtos kontroli ilin de pli proksime ol ili faris ĝis nun. Tiu aranĝo donos al niaj oficialaj institucioj pli firman kaj pli vastan bazon. ol kiam ili dependas de la bonvolemo kaj situacio de eĉ plej sindonaj bonfarantoj.

Dum la milito, pro sia favora sidejo en neŭtrala lando, U.E.A., kies centra oficejo estas en Svislando, sukcesis ludi grandan rolon inter la Esperantistoj. En la landoj turmentitaj de la milito estis tre malfacile vivi la Esperantistan movadon, kaj en kelkaj lokoj la propagando devis tute ĉesi. La E.C.O. faris sian eblon daŭrigi sian laboron, ĝis la limoj de ĝiaj povoj. Sed en iuj militantaj landoj, apartigitaj por ordinara internacia interkomunikiĝo, U.E.A., pro siaj servoj kaj la regula apero de sia gazeto, estis la ĉefa signo de nia internacia vivado. Tio donis al U.E.A. grandan prestiĝon kaj influon. Kvankam ĝia celo estas la praktika uzado de Esperanto por internaciaj interrilatoj, ĝi samtempe okupis en la okuloj de multaj Esperantistoj la lokon difinitan por E.C.O., kaj, eble senintence, kvazaŭ konkurado inter la du oficejoj okazis. La

milito agis malfavore kontraŭ la agado de la oficialaj institucioj kaj aliaj organizoj ĉe E.C.O., kaj la nova Esperantisto nun ne scias en kiu templo adori, ĉu en Parizo aŭ en Genevo, kaj, se ambaŭ devas ekzisti, kial ili devas resti apartaj.

La ĉefaj celoj de E.C.O. estas propagandaj kaj lingvaj; tiuj de U.E.A. estas praktikaj. Sed U.E.A. ankaŭ montris apartan trajton. Dank' al la starigo de delegitoj en diversaj partoj de la mondo, kaj ĝia mirinda organizado, ĝi prezentas solvon de la problemo de la organizado de la individuaj Esperantistoj, kaj samtempe invitas la apogon de Esperantistaj societoj kaj komercaj firmoj kiel Esperantistaj entreprenoj. Tamen la kocizoj de ĝiaj anoj apenaŭ sufiĉis por ĝiaj modestaj elspezoj, kaj U.E.A., same kiel E.C.O., devis dependi de la oferoj de sindcnaj bonfarantoj. E.C.O. klopodis atingi por si la subtenon de societoj pere de I.U.E.S. kaj de individuoj pere de I.S.A.E., sed estas domaĝe, ke tiu subteno devas esti serĉata pere de du disaj societoj, kiuj ankoraŭ ne plene fike funkcias. Tiuj societoj ankaŭ devas varbi membrojn en lokoj tra la mondo, kie U.E.A. estas jam organizita, kaj la novaj Esperantistoj, kiuj ne bone scias la fruan historion de nia movado, ne povas kompreni, kial nia movado bezonas du fortajn internaciajn oficejojn.

Estas do bone, ke en la nova situacio, kiu prezentas sin en la komenco de nova epoko, ni reordigu nian aferon, kaj serĉu rimedon por konservi por la estonta esperantistaro sub unu estraro kaj unu statuto, la altvalorajn instituciojn kiujn niaj pioniroj tiel sindoneme kaj zorge konstruis, kaj por provizi monrimedojn por efike subteni tiujn instituciojn.

La Komisiono zorge esploris la tutan aferon, kaj ĉiujn dokumentojn submetitajn de E.C.O. kaj U.E.A., kaj humile prezentas al la Esperantistaro planon de organizo, per kiu, ili opinias, nia movado povos stariĝi sur fortika demokrata bazo; per kiu ĉiuj niaj institucioj propagandaj, lingvaj, kaj aplikaj — povos ĝui la komunan subtenon de la oferoj de ĉiuj membroj de la organizo; kaj per kiu estos certigata la disvolvo de la diversaj flankoj de nia afero laŭ orda metodo.

III

En la fruaj tagoj de Esperanto D-ro ZAMENHOF, kies ideoj pri organizado de la Esperantistoj la Komisiono ĉiam tenis antaŭ si, projektis la fondon de Tutmonda Ligo de Esperantistoj. Oni kredas, ke oni faras honoron al lia ideo, prenante la vorton « Ligo » por nia estonta organizo. Ni ŝatas la adjektivan « Universala », prefere ol la vorton « Tut-

monda », ĉar ni devas memori, ke nia organizo devos havi nomon facile rekoneblan de la ne-esperantista publiko tra la mondo. Nomante la organizon « Universala Ligo Esperantista », ni do prenas la centran vorton de nia Majstro, la unuan de U.E.A., kaj la lastan de E.C.O.

Laŭ la plano kiun la Komisiono nun prezentas la nova Ligo celas kunigi ne nur la individuajn Esperantistojn sed ankaŭ la esperantistajn societojn, lokajn, naciajn, kaj fakajn. Pro tio la Ligo konsistos el :

1. La individuaj Esperantistoj sen diferenco de nacieco, kiuj rekte monferas por ĝia laboro (oni nomos ilin « liganoj »); kaj.

2. La lokaj, naciaj, kaj fakaj organizoj, kiujn kreis la Esperantistoj en siaj landoj.

Ĝi do reprezentos la universalan kaj ankaŭ la nacian Esperantismon. Lokon oni povos ankaŭ trovi en la Ligo por societoj kaj personoj, ne-esperantistaj, kiuj volas kunlaboradi en la sama agadkampo.

Oni celas uzi por la Ligo ĉiujn bonajn partojn de la nunaj organizoj, kies utileco estas pruvita, ekzemple la sistemon de delegitoj, kiun jam havas U.E.A., kiu nun tre bone funkcias en multe da lokoj tra la mondo. En la Ligo la delegitoj havos pligrandigitajn devojn. La delegito estos la reprezentanto de la Ligo en sia regiono, li ankaŭ reprezentos la Liganon ĉe la Ligo. Li faros la servojn, pri kiuj la nunaj delegitoj de U.E.A. kutimas, kaj li ankaŭ elektos parton de la Ĝenerala Komitato de la Ligo, starigota por ĝia ĝenerala gvidado kaj administrado. Li voĉdonos po unu voĉo por ĉiu ligano en sia regiono.

La Ĝenerala Komitato konsistos el :

1. Reprezentantoj de la Liganoj po unu por ĉiu kvincento da kotizantoj liganoj, proporcie balotitaj;

2. Reprezentantoj de la lokaj, naciaj, kaj fakaj Esperantistaj societoj elektotaj laŭlande rekte al la Komitato.

3. Kvin reprezentantoj de la Lingva Komitato.

Do, se estus 5,000 liganoj kaj 20 grupoj de lokaj, naciaj, kaj fakaj societoj, la Ĝenerala Komitato konsistus el 35 personoj — 10 elektitaj de la delegitoj, 20 de la landaj grupoj, kaj kvin de la Lingva Komitato.

Kun la kresko de la movado, la nombro de la anoj de la Ĝenerala Komitato pligrandiĝos; sed tiu grandnombreco ne estos grava malhelpo, ĉar la ĉefaj administraj devoj de la Komitato estos komisiitaj al Administra Komitato elektita de la Ĝenerala Komitato, kaj konsistanta el la Prezidanto de la Ligo, unu el la vic-prezidantoj, po unu ano de la Lingva Komitato, de ĉiu faka komitato de la Ligo, kaj de iu alia alia societo aŭ komitato ĉe la Ligo (ekz. la Societo de Amikoj de Esperanto), kiun la Ĝenerala Komitato juĝas taŭga por esti reprezentata.

La ĝenerala Komitato elektos la Prezidanton de la Ligo, la vic-prezidantojn, Ĝeneralan Sekretarion, kaj Ĝeneralan Kasiston.

La ĝenerala Komitato starigos Fakajn Komitatojn, kiuj povos krei sian propran internan regularon kaj laborplanon, kiujn tamen devos aprobi la Administra Komitato.

La nombro de fakaj komitatoj estas nelimigita, sed la Komisiono pritraktas ĉi tie nur pri tri gravaj fakaj komitatoj :

1. La Propaganda Komitato, kiu daŭrigos la propagandajn laborojn de E.C.O. en *Parizo* ;

2. La Servada Komitato, kiu daŭrigos la praktikajn servojn de U.E.A.; kaj

3. La Kongresa Komitato, kiu daŭrigos la laboron de la K.K.K.

La Ĝenerala Komitato povos krei aliajn fakajn komitatojn laŭ bezono por labori pri literaturo, verkado, edukado, k.t.p., kaj oni esperas, ke multaj el la ekzistantaj specialistaj societoj, kiuj ne okupas sin pri religio aŭ politiko, baldaŭ trovos sin fakaj komitatoj de la Ligo.

La Oficiala Gazeto estos administrata de la Administrata Komitato, kiu kontrolos la redaktadon. La Komisiono konsentas, ke estas dezirinde, ke estu nur unu gazeto de la Ligo.

La Administra Komitato enkasigos la kotizojn kaj abonojn, kaj dispartigos la monon por pagi sian propran elspezon, por la elspezo de la Lingva Komitato kaj Akademio, kaj por la Fakaj Komitatoj. La Fakaj Komitatoj povos, kun la aprobo de la Administra Komitato, pligrandigi sian enspezon per mondonacoj de Societo de Amikoj de Esperanto aŭ privataj bonfarantoj, kaj per profitoj el vendoj.

La Komisiono opinias, ke estus bone ne tuŝi la nunan organizon de la Lingva Komitato kaj Akademio, kiu povas funkcii bone laŭ ĝia nuna regularo eble iom ŝanĝota de la Komitato laŭ la rekomendoj de la Pariza Konferenco de Septembro 1919 kaj de la Haga Kongreso de 1920. La Lingva Komitato restos memstara lingva institucio kreita de la Esperantistoj. Ĝi bone plenumos sian taskon :

« Zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evolucion. »

Ĝi ne havas regulojn por sia financa subteno, sed la Ligo akceptos la taskon zorgi pri tio. Kvankam la Lingva Komitato kaj Akademio staros kvazaŭ aparte de la Ligo, oni ne bezonos timi, ke la Ligo ne havos fortan influon ĉe la Lingva Komitato, ĉar krom la reprezentantoj de la Lingva Komitato, kiuj troviĝos en la Ĝenerala Komitato kaj Administra Komitato, estas certe, ke granda proporcio de la anoj de la Lingva Komitato troviĝos en la estraro de la Ligo.

La Universalaj Kongresoj okazos, kiel ĝis nun sub la helpa kontrolo de la Kongresa Komitato, kaj de la Loka Komitato. Ili estos popolaj manifestadoj kiuj prezentos deziresprimojn, kiujn la diversaj komitatoj de la Ligo, kaj precipe la Ĝenerala Komitato (kiu entenos la rajtigitajn de la tuta organizita Esperantistaro) ne povos ignori, sed devos esplori kaj pricide. Oni bone scias, ke D-ro ZAMENHOF tre ŝatis la ideon de rajtigitaj delegitoj kun povo voĉdoni en Universalaj Kongresoj. La Komisiono ankaŭ tenis antaŭ si la opinion de la Konferenco en *Parizo* (Septembro 1919), « ke la organizo de voĉdonado de rajtigitaj delegitoj en la Universalaj Kongresoj montriĝas kiel eble plej taŭga sistemo por ebligi al ĉiuj Esperantistoj, ke ili esprimigu almenaŭ unufojon ĉiujare sian opinion pri la ĝeneralaj komuninteresaj demandoj pri progresado de Esperanto », kaj « ke tiu organizo donas al niaj Universalaj Kongresoj specialan intereson kaj oficialan karakteron, kiun ili ne havus, se tiuj rajtigitaj delegitoj ne ekzistus. » Tamen la Komisiono opinias, ke ĝia plano estas pli simpla kaj pli facile atingos la deziritan rezulton, ĉar ĉiu delegito aŭ komitatano povos voĉdoni skribe kaj je iu tempo pri la demandoj submetitaj al voĉdonado. Kompreneble ĉiuj personoj, kiuj ĉeestos la Kongreson havos la rajton esprimi sian opinion kaj formuli dezirojn esplorotajn de la delegitoj aŭ komitatanoj por definitiva decido.

IV

Fine, la Komisiono do rekomendas :

1. Ke, por pli efike organizi subtenon de la necesaj centraj institucioj de Esperanto, estas necese, ke la ekzistantaj internaciaj organizaĵoj de la Esperantistoj estu kunmetitaj en unu ĝeneralan organizaĵon.

2. Ke ĝenerala organizaĵo estu starigita, sub la nomo « Universalala Ligo Esperantista », kun statuto verkota laŭ la sekvonta plano :

(a) La Ligo konsistu el :

1. Personaj membroj (« Liganoj »); kaj

2. Societo-membroj, lokaj, naciaj, kaj fakaj; kun asociitoj, kiuj aprobas kaj morale kaj finance subtenas Esperanton.

(b) Ĝenerala Komitato, ĉiujare elektata, entreprenu la ĝeneralan gvidadon kaj administradon de la Ligo.

(c) La Ĝenerala Komitato elektu la Prezidanton, vic-prezidantojn, kaj Administran Komitaton, ĉiujare, kaj, ne necese el sia anaro, Ĝeneralan Sekretarion kaj Ĝeneralan Kasiston.

(ĉ) La Ĝenerala Komitato kreu Fakajn Komitatojn laŭbezone. Unue estu kreaĵaj :

1. Propaganda Komitato.
2. Servada Komitato.
3. Kongresa Komitato.

Aliaj Komitatoj, literatura, scienca, ekzamena, pedagoga, kuracista, jurista, k. t. p. sekvu.

Fakaj Komitatoj faru regularojn necesajn por sia interna funkciado, aprobotajn de la Administra Komitato.

(d) La Ĝenerala Komitato difinu la sidejon kaj centran administrejon en kiu la ĝenerala agado de la Ligo centriĝos, kaj en kiu funkciados la Ĝenerala Sekretario kaj la Administra Komitato.

(e) La Centran Propagandejon de la Ligo administru la Propaganda Komitato. Ĝi daŭrigu en *Parizo* la laboron de E.C.O. En ĝi estu konservataj la arĥivoj de la Esperanta movado kaj la oficiala biblioteko. En ĝi la Propaganda Komitato organizu la propagandon ĉe registaroj kaj publikaj institucioj, la eldonadon de propagandiloj, kaj la kolekton de informoj kaj statistikoj pri la disvastigado de Esperanto. La servoj de la Centra Propagandejo estu je la dispono de la publiko.

(f) La Servada Komitato prizorgu la disvastigadon de la praktika kaj aplika uzado de la lingvo por komercaj, sciencaj, kaj aliaj celoj. Ĝi daŭrigu la laboron kaj sekvu la tradicion de U.E.A. Pri lingvaj aferoj ĝi ne okupu sin. Ĝiaj servoj estu je la dispono de ĉiuj ligoj kaj societo-membroj, kaj, je la dispono de la publiko, nur laŭ kundiĉoj starigotaj.

(g) La Kongresa Komitato konsistu el :

1. Tri membroj de la Ligo elektitaj de la Ĝenerala Komitato;
2. Du membroj de la loka komitato de la antaŭa kongreso;
3. Du membroj de la loka komitato de la nuna kongreso, kaj;
4. Du membroj elektitaj por ĉiu kongreso decidita por la venontaj

ĵaroj.

La Kongresa Komitato rajtu elekti por la Kongreso, Prezidanton kaj du vic-prezidantojn el, aŭ ekster, sia propra anaro. Kiel eble la Prezidanto estu unu el la Prezidantoj aŭ vic-prezidantoj de antaŭaj kongresoj.

(ĝ) Estu nur unu *Oficiala Gazeto* de la Ligo. Ĝia redaktado estu sub la kontrolo de la Administra Komitato. Ĝi enhavu ĉiujn oficialajn anoncojn kaj raportojn, kaj raportojn de la agado de la Lingva Komitato kaj Akademio kaj de la fakaj komitatoj. Krom la delegitoj kaj societo-membroj, nur tiuj ligoj kiuj abonas ricevu ĝin.

(h) La Lingva Komitato kaj Akademio funkciadu apud la Ligo laŭ sia ekzistanta regularo tuj revizota. Ĝi estu tute memstara kiel aŭto-

nomia oficiala institucio kreita de la Esperantistaro. La ĝenerala Komitato rajtu prezenti al la Akademio kandidatojn por la Lingva Komitato en la okazo de elekto de novaj membroj. La Lingva Komitato rajtu elekti el si kvin membrojn al la Ĝenerala Komitato kaj unu membron al la Administra Komitato.

(h) La Ligoj estu reprezentataj de delegitoj, kiujn ili elektu ĉiujare, en ĉiu loko, grava por sia granda, kaj kiujn la Administra Komitato aprobas. Ili estu reelekteblaj, kaj se eble konservu sian oficon almenaŭ tri jarojn. La delegito reprezentu la Ligon en sia regiono, kaj reprezentu ĉe la Ligo la regionajn membrojn. La Delegitoj funkciu ankaŭ kiel la nunaj delegitoj de U.E.A. Ili varbu membrojn por la Ligo, kolektu kotizojn kaj abonojn, partoprenu pri la administraj aferoj de la Ligo, kaj voĉdonu skribe unu voĉon por ĉiu membro en sia regiono. La delegitoj elektu al la Ĝenerala Komitato laŭ proporcia balotado unu komitatano por ĉiu kvincento da ligoj.

(i) La societo-membroj de la Ligo kuniĝu por elekti reprezentantojn al la ĝenerala Komitato por sia lando, po unu komitatano por ĉiu lando kun pluaj reprezentantoj por tiuj landoj kies societoj havas pli ol mil membroj po unu reprezentanto por ĉiu mil aŭ parto de mil. La societoj klopodu, ke kiel eble plej multaj el siaj membroj fariĝu plenaj ligoj kaj abonantoj de la oficiala gazeto.

(j) La asociitoj ne havu la rajton voĉdoni.

(f) La Administra Komitato fiksus la kotizojn kaj abonojn ĉu pagotajn de la ligoj aŭ de societo-membroj aŭ de asociitoj. La kotizoj estu sufiĉe altaj por certigi la eventualan financon sukceson de la Ligo.

(k) La Ligo eldonu jarlibron, kiun ĉiuj ligoj kaj societo-membroj rajtu ricevi po unu ekzemplero.

(l) Ĉiuj membroj de la Ligo rajtu al la ĝeneralaj servoj de la Ligo kaj ĝiaj komitatoj; sed anoj de la societo-membroj ne ricevu la jarlibron kaj nur tiujn servojn kiujn la Administra Komitato difinos.

(m) La Centra Kaso ricevu monon ne nur de ligoj kaj societo-membroj kaj asociitoj sed ankaŭ de la Societo de Amikoj de Esperanto kaj bonvolemaj donacintoj.

Ĝi uzu la monon ricevitan, krom por administraj bezonoj, por la subteno de la Lingva Komitato kaj Akademio kaj de la diversaj komitatoj kaj fakoj de la Ligo.

(n) Ĉiu faka komitato rajtu starigi apartan kason por sia propra funkciado, kaj, krom la mono ricevebla el la centra kaso, ĝi rajtu ricevi apartan financon subtenon de la Societo de Amikoj de Esperanto, aŭ de aliaj societoj, aŭ de privataj personej; sed ĝi ne rajtu fari ĝeneralan

peton por monsubteno sen la aprobo de la Administra Komitato.

(o) Ĉar la Ligo prezentos definitivan bazon de tutmonda reprezentado de la subtenantoj de la Esperanta movado, kiuj povos voĉdoni pri ĉiuj aferoj en la Ĝenerala Komitato, je iu ajn tempo, kaj ne nur dum kongreso, la nuna sistemo de rajtigataj delegitoj estu forigita, kaj la kongresanoj havu la plenan rajton diskuti kaj esplori ĉiujn demandojn komuninteresajn por ĉiuj Esperantistoj, sed ne alpreni decidojn devigajn ĉu por izolaj Esperantistoj, aŭ por Esperantistaj societoj, aŭ por la Ligo, sed ili plene rajtu esprimi dezirojn kaj konsilojn. Tiujn deziresprimojn aŭ konsilojn la Administra Komitato de la Ligo, kiel eble plej baldaŭ devige submetu por definitiva decido al la Ĝenerala Komitato, aŭ al alia koncernata komitato, aŭ se la afero tuŝas statuton aŭ gravan principon, al ĝenerala voĉdono de la Ligo.

(p) La apartaj reguloj kaj statutoj de E.C.O., U.E.A., A.K., K.K.K., kaj I.U.E.S. estu forigitaj, sed ili reaperu ŝanĝitaj laŭ bezono en la interna regularo de la Administra Komitato, la Propaganda Komitato, kaj la Servada Komitato, kiun tiuj komitatoj verkos.

3. Ke, por starigi la Ligon, la Kongreso aprobu rezolucion laŭ la sekvanta modelo :

La Kongreso RICEVAS la Raporton de la Komisiono, kaj DANKAS la Komisionanojn pro ilia laboro;

APROBAS la starigon de UNIVERSALA LIGO ESPERANTISTA laŭ la ĝenerala plano de la Raporto,

Kaj ĝis kiam la Ligo plene funkcios, NOMAS..... (sep personoj)..... kiel provizoran Administran Komitaton de la Ligo, kaj..... (S)..... kiel Sekretarion; PETAS la Komisionon verki statuton aprobotan de la provizora Administra Komitato, presigotan en Oficiala Gazeto Esperantista kaj en la gazeto « Esperanto », kaj poste konfirmotan de la ĝenerala voĉdonado de la Ligo unu jaron post la publikigo en tiuj gazetoj;

ESPRIMAS LA DEZIRON, ke la Societo de la Centra Oficejo kaj U.E.A. dumtempe daŭrigu sian [laboron, [samtempe klopodante por enkorpiĝi sin en la Ligo kaj por efektiviĝi la sukceson de la Ligo;

MALFERMAS organizan kason sub la kontrolo de la provizora Administra Komitato, kun..... (K)..... kiel kasisto, kaj PETAS la bonvolemajn kongresanojn tuj, kaj la Esperantistaron kaj amikojn de Esperanto ĝenerale, subteni kiel eble plej frue, tiun kason per siaj mondonacoj.

La Komisiono petas simpatian ekzamenadon de sia plano. Ne ŝajnas eble, ke ĝi plene plaĉu al ĉiuj personoj, sed ĝi projektas organizon,

kiu ne detruos eĉ unu utilan parton de la nunaj organizoj, sed kunordigas, unuigas, simpligas. Kvankam ĝi ne perfekte atingas la idealon de unu kotizo, unu organizo, unu estraro, ĝi kiel eble plej praktike tion faras. La Komisiono lasas sian verkon al la juĝo kaj aprobo de la Kongreso en *Praĥa*, esperante, ke ĝi alportos al nia movado kaj al nia anaro rimedon por marŝi antaŭen en ordo kaj konkordo, kun la celo ĉiam antaŭ ni montrita de nia kara Majstro — « reunigi la homaron » — per la disvastigado kaj konstanta uzado de la bela internacia lingvo, kiun li postlasis al ni.

W. M. PAGE, *Prezidanto*.

Noto de la Prezidanto.

La Prezidanto bedaŭras, ke pro diversaj malhelpoj la Komisiono ne povis publikigi sian planon pri organizo antaŭ la printempo. Post studado de dokumentoj ricevitaĵoj el E.C.O. kaj U.E.A. li submetis al la komisionanoj dum Januaro raporton kaj projekton de statuto. Ĉiujn dokumentojn la komisionanoj studadis kaj sendis al li siajn kritikojn kaj kontraŭproponojn. Li provis aranĝi kunvenon de la komisionanoj por zorge pristudi la aferon kaj pretigi konsentitan raporton kaj projekton de statuto, sed li nur sukcesis kunvenigi tri komisionanojn; aliaj sendis konsiderojn, kiujn la kunvenintoj studadis kun la aliaj dokumentoj. La tempo ne permesas, ke la Prezidanto prezentu konsentitan raporton, sed ĉi tiu raporto estos plue konsiderata de la Komisionanoj en la antaŭkongreso en *Dresdeno*, kaj eble kiam ĝi estos oficiale prezentata al la kongreso ĝi estos iom ŝanĝita laŭ kelkaj detaloj.

W. M. P.

II. — OFFICIALA PROTOKOLARO

OFICIALAJ DECIDOJ KAJ KOMUNIKOJ

I. — KUNSIDOJ DE LA LINGVA KOMITATO

Unua Kunsido (31 julio).

Prezidanto : Profesoro Th. CART.

Ĉeestas S-roj WARDEN, CHRISTALLER, ARNHOLD, KRUMPHOLZ, ĈEJKA, BLOK, SIMON, MEAZZINI, PRIVAT.

Laŭ propono de profesoro CART, prezidanto de la Akademio, oni elektas unuvoĉe S-inon CENSE kiel sekretariinon de la kunvenoj de la L. K. dum la kongreso.

La Prezidanto rimarkigas, ke nur malmultaj L. K. -anoj sciis pri tiu-ĉi kunveno, kiu okazas *antaŭ* la malfermo de la kongreso kaj ke, aliparte, ne ankoraŭ alvenis lia raporto : labori sen ĝi kaj sen la raporto de S-ro GROSJEAN-MAUPIN kaj de D-ro CORRET ne estas eble. Tiujn ĉi dokumentojn ni tre baldaŭ ricevos; tiam ni povos havi laborkunvenon, al kiu ni kunvokos ĉiujn L. K. -anojn kiuj ĉeestos la kongreson.

Laŭ ĝenerala konsento kaj post amika ne oficiala interbabilado, oni elektas la mardon 2-an de aŭgusto, je la 14-a por tiu ĉi laborkunveno.

La kunsido finiĝas je la 12 1/2 h.

Dua Kunsido (2 aŭgusto).

Ĉeestas S-roj CART, prezidanto; H. ARNHOLD, ĈEJKA, CHRISTALLER, F-ino FLOURENS (Roksano), KRUMPHOLCZ, MEAZZINI, PRIVAT, OTTO SIMON, WARDEN.

La Prezidanto proponas la legadon de la raporto, por aŭdi la opiniojn pri tio, kion oni devas legi dum la kunsido de la kongreso. Post interparolado pri tio, li proponas, ke oni legu dum la ĝenerala kunsido lian saluton al S-ro Boirac, kaj diversajn partojn de lia raporto kaj de la raporto pri la Komuna Vortaro kaj pri la Teknika.

La sekretario legas la raporton prezentatan de S-ro GROSJEAN-MAUPIN, pri la novaj vortoj.

D-ro PRIVAT demandas ĉu oni eldonos en la 3-an liston la vortojn kun finiĝo en : *aci, uci*, aŭ sen tiu finaĵo.

Prof. CART respondas, ke oni publikigos ilin, kiel memstarajn vortojn, sed ke tuj poste aperos listo de vere fundamentaj radikoj.

S-ro MEAZZINI opinias, ke oni ne devas oficialigi la vortojn kun tiuj finaĵoj, ĉar poste oni ne povos forigi ilin.

Prof. CART respondas, ke post la eldono de la 3-a aldono, oni povos revizi ĉiujn 3 aldonojn.

D-ro PRIVAT diras, ke li kredis, ke laŭregule la listo post voĉdono de la Lingvo Komitatoj, revenos al Akademio por lasta esploro.

Prof. CART respondas, ke ne, la voĉdono estas nur farita, la konsiderojn notis S-ro GROSJEAN-MAUPIN kaj nun aperos la listo.

D-ro PRIVAT demandas, ĉu la Akademio do unue esploras kaj poste la L. K. aŭ kontraŭe.

S-ro ARNHOLD diras, ke li vidas neniun danĝeron en tio, ke la Akademio esploru laste, sed li tamen konsideras ke la L. K. havas pli da rajtoj, da graveco, ol la Akademio.

Prof. CART atentigas, ke la vortoj proponitaj estas jam de longe uzitaj de D-ro ZAMENHOF sub tiu formo, ke ĉiuj direktoroj de la komisionoj pri vortaro devas submeti siajn raportojn al la Akademio, kiu ilin esploras.

D-ro PRIVAT diras, ke li ne vidas la malfacilecon de rondirantaj kajeroj, sur kiuj oni diru sian opinion. Al tio, Prof. CART respondas, ke li sekvas la tradicion.

D-ro PRIVAT demandas, ĉu li povas, devas konsili la uzon de la vortoj kun forigo de la finaĵo : *acio* k. t. p.

S-ro WARDEN respondas, ke laŭ la regulo 15-a de la Fundamento, oni rajtas uzi la vortojn en la pli mallonga formo.

S-ro ARNHOLD opinias, ke oni ne devas altrudi akcepton de tiaj aŭ iaj vortoj pere de la gazetoj; sed ke la esperantistoj devas submetiĝi je la decidoj de la Akademio kaj de L. K.

Poste la sekretario legas la raporton de D-ro CORRET.

Post diversaj rimarkoj de la ĉeestantoj, la Prezidanto diras, ke la Akademio ne rajtas kaj ne volas trudi ion ajn, sed ke ĉiu konsentu tamen, ke ĝi rajtas konsili, kaj ke ĝi konsilas por la unueco de la lingvo.

La kunveno finiĝis je la 17-a horo.

Sekcio por la Scienca kaj Teknika Vortaro

Dua Cirkulero de la Direktoro por la Scienca kaj Teknika Vortaro.

(Aldono al la Raporto de la Prezidanto)

Karaj Kolegoj,

Kvindek-du samideanoj, ĝis la 20-a de julio, respondis la alvokon de la unua cirkulero pri ellaborado de la teknikaj vortaroj (1).

El ili, kvindek proponis sian kunlaboron en unu aŭ en kelkaj fakoj; du ne difinis ian fakon; du nur esprimis opinion pri labormetodo; unu sendis teknikajn katalogojn, kiel prilaboreblan materialon.

Al ĉiuj respondintoj la Direktoro ne povis skribi persone. La tuta Esperantistaro certe konsentos kun li, por esprimi al siaj kolegoj, kiuj komprenis la gravecon de la nuna tasko. sian plej koran kaj sinceran dankon.

* * *

La aludo pri decimala klasado okazigis kelkajn kritikojn, ĉar oni ne ĝuste sciis, kiamaniere estas intencata ĝia uzado.

Unu korespondanto opiniis, ke cent fakoj estas tro granda nombro, kaj proponis ĝin malgrandigi ĝis nur dudek fakoj. Oni poste vidos, ke la nombro da fakoj neniel estas rigide antaŭfiksita; ĝi grade pligrandiĝos laŭ la nombro de la kunlaborantoj kaj precipe laŭ ilia specialeco; nur por praktika oportuneco ĝi dividiĝos laŭ diversgradaj subfakoj.

Alia respondinto sprite kaj ĝuste rimarkigis, « ke la homaro ne evoluis podeke, kaj ke Zamenhof kreis majstroverkon, simple ĉerpante el la ĉiutaga vivo. » Efektive, en la intencata plano la decimaleco ludas nenian esencan kaj lingvan rolon. Ĝia ofico estos organiza, koresponda, kvazaŭ nur simple administra. Ĝi nur utilos, por disdividi la laboron laŭ jam pretaj fakoj.

Kiam ni ekloĝas jam pretan, okaze dek-ĉambran domon, ni tute bone povas aranĝi en ĝi nature nian vivon, kvankam ankaŭ la homa loĝado ne evoluis « dek-ĉambre ». La decimala klasado estos por ni jam preta domo; ĝia ĉefa bono estas nur, ke ĝi jam prete ekzistas, ke ĝi estas

(1) Kvar pluaj kunlaborantoj aliĝis post la XIII• Kongreso. Iliaj nomoj es aldonitaj al tiu ĉi cirkulero.

sufiĉe diskonata kaj ebligas senfinan disvolviĝon de modeste komencita entrepreno.

Se en nia domo la deka ĉambro ne estos utila, tiam ni ĝin simple ne uzos; se, kontraŭe, dek-unuan ĉambron ni bezonas, tiam ni senĝene ĝin konstruos. De la jam preta klasado ni ne estos sklavo; ĝi kontraŭe estos nia laŭvola servanto. Eble, ne tre logike malsamaj metiistoj loĝos en sama ĉambraro. Tute same, kiel en la praktika vivo, tio ne estos tre grava, se nur ni konas iliajn adresojn, kaj se la komuna laboro efektiviĝos.

La alpreno de tia ĝenerala klasado, kun dividoj kaj diversgradaj subdividoj ĉefe staras por ni sur tiu ĉi principo, ke la laboro por teknikaj vortaroj senfine pliampleksiĝos kaj dume unu sola direktoro ne povos persone rilati kun senfine kreskanta nombro da kunlaborantoj. Tial ili are grupiĝos laŭ fakoj kaj subfakoj kun ĝeneralaj kaj diversgradaj fakestroj. Nur kun ĝeneralaj fakestroj rekte rilatos la Direktoro, ĝeneralaj kun duagradaj, k. t. p. Tiel, kun kreskanta nombro da fakoj ne kreskos senfine la laboro de unu persono, sed la nombro de ĝiaj helpantoj.

Principe ekzistas dek ĝeneralaj fakoj, kiuj grade disfakiĝos laŭ la jam pretaj dividoj, — aŭ proksimume, — kiam plimultiĝos, plidiversiĝos kaj plispecialiĝos la kunlaborantoj.

Laŭ tiuj ĉi dek ĝeneralaj fakoj oni jam nun povas jene dispartigi la ĝisnunajn kunlaborantojn :

Laŭfaka divido de la Kunlaborantoj.

ĜENERALAĴOJ.

Bibliografio : S-ro Francesco Pizzi.

FILOZOFIO.

D-ro E. Dittrich; S-ro Grosjean-Maupin; S-ro Georg J. Meyer; D-ro Paul Rumpel.

RELIGIO.

Teologio : S-ro Georg J. Meyer; Dro Siegel.

SOCIAJ SCIENCŬOJ KAJ JURŬO.

Sociologio : S-ro Kurt Kauffmann.

Politika Scienco : D-ro Edm. Privat.

- Ekonomio Publika* : S-ro Norman W. Frost; S-ro Kurt Kauffmann;
S-ro Václav Nêmec (*banko*); D-ro Paul Rumpel.
Juro : S-ro Mc Conkey (*juro internacia*); Dro Paul Rumpel.
Publikaj financoj : S-ro Karl.
Pedagogio : S-ino F. Hörnig.

FILOLOGIO.

- Filologio ĝenerala kaj diverslingva* : S-ro Ĉernohvostov; D-ro E. Dittrich;
S-ro Rudolf Fridrich (*gramatiko*); S-ro Grosjean-Maupin; S-ro
G. Kayser; S-ro Georg J. Meyer; S^o Vilho Setälä; Dro Siegel.

NATURSCIENCŬ.

- Generale* : S-ro Eugen Wüster.
Matematiko : S-ro Venancio Deulofeu; S-ro K. Hendel; S-ro Ir. J. R.
G. Isbrücker; S-ro A. Mazzolini (*geometrio*); S-ro René Mesny;
S-ro W. W. Padfield; S-ro Vilho Setälä; S-ro Petro Stojan; S-ro
Eugen Wüster.
Astronomio : S-ro Petro Stojan.
Fiziko : S-ro J. R. G. Isbrücker; S-ro L. M. Kanervo; S-ro E. Lefèvre;
S-ro René Mesny; S-ro Vilho Setälä; S-ro Petro Stojan.
Hemio : S-ro Venancio Deulofeu; D-ro W. Döhler; D-ro A. Jentsch;
S-ro L. M. Kanervo; S-ro E. Lefèvre; S-ro Vilho Setälä.
Biologio : D-ro W. Döhler; D-ro A. Jentsch; S-ro M. C. Mc Conkey.
Botaniko : D-ro A. Jentsch; S-ro Vilho Setälä.
Zoologio : D-ro W. Döhler; S-ro Vilho Setälä; S-ro Petro Stojan (*orni-
tologio*).
Geologio : S-ro Petro Stojan (*mineralologio*); D-ro Wohlstadt.
Meteorologio : S-ro Petro Stojan.

SCIENCŬJ APLIKITAJ

- Medicino* : D-ro Bluth; D-ro Andreo Fišer; D-ro P. Vanverts; D-ro Leon
Zamenhof (*anatomio*).
Inĝenierarto : S-ro Brettman; S-ro Arthur Brown; S-ro Rudolf Fridrich;
S-ro F. O. Lechmere-Oertel; S-ro E. Lefèvre; S-ro W. W. Padfield;
S-ro Francisko Schneider; S-ro Arthur J. Scott Scott (*aŭtomobiloj*);
S-ro Ch. Tiard.
Elektrotekniko : S-ro Eskil Hakansson; S-ro Willy Heinze; S-ro Ir. J. R.

G. Isbrücker; S-ro René Mesny (*telegrafio senfadena*); S-ro Majoro R. Raven-Hart (*telegrafio, inkluzive senfadena*).

Maristaĵoj : S-ro René Mesny; S-ro Rollet de l'Isle.

Agronomio : S-ro L. M. Kanervo; S-ro P. Marly; D-ro Siegel (*abeloj*).

Fervojoj : S-ro Brettmann; S-ro Rudolf Fridrich; S-ro Majoro R. Raven-Hart; S-ro Francisko Schneider; S-ro V. d. Shmurlo.

Kontado kaj Komercio : S-ro Jean Balliman; S-ro J. Camescasse; S-ro A. Ĉernohvostov; S-ro Karl; S-ro Kurt Kauffmann; S-ro Václav Némec; D-ro Paul Rumpel; S-ro J. M. de Villa.

Vitraĵoj : S-ro Jean Balliman; S-ro P. Marly.

Ŝtoĵoj, Pasamentaĵoj : S-ino Jeanne Flourens; S-ro T. Löttsch.

Konstruado : S-ro Jean Balliman; S-ro G. Arthur Brown; S-ro Francisko Schneider.

Ŝipkonstruo : S-ro A. Ĉernohvostov.

BELARTOJ.

Estetiko ĝenerale : S-ro Grosjean-Maupin; S-ro Georg J. Meyer.

Arĥitekturo : S-ro F. O. Lechmere-Oertel.

Desegno : S-ro Grosjean-Maupin; S-ro A. Mazzolini.

Muziko : S-ro Montagu C. Butler; S-ro W. Kalitzke (*musikaj instrumentoj*) D-ro Paul Rumpel; F-ino Ad. Ŝefer.

Sporto : D-ro Paul Rumpel.

LITERATURO.

S-ro Rudolf Fridrich; S-ro Grosjean-Maupin; S-ro Georg J. Meyer.

GEOGRAFIO KAJ HISTORIO.

Historio : S-ro Norman W. Frost; S-ro Georg J. Meyer.

Kulturoj : D-ro E. Dittrich; S-ro G. Kayser.

Geografio : S-ro A. Ĉernohvostov; S-ro Norman W. Frost.

NEDIFINITAJ FAKOJ.

S-ro Anatolo Koch; S-ro V. d. Shmurlo; S-ro Stefano La Colla.

Por ĉiu ĝenerala fako kaj ankaŭ por ĉiu duagrada fako, kiu enhavas kelkajn kunlaborantojn, fakestroj bonvolu jam nun sin proponi. Por

plenumi sian precipe administran oficon, ili kompreneble ne bezonas persone posedi teknikan kompetentecon pri ĉiuj subfakoj, same kiel la Direktoro ne estas mem kompetenta pri ĉiuj ĝeneralaj fakoj. Nur necese estas, ke ili disponu sufiĉan tempon por oportune rilati kun la fakanoj kaj la ĝenerala fakestro aŭ la Direktoro. Ili ankaŭ ne loĝu tro malproksime de Parizo kaj estu almenaŭ Eŭropanoj.

Je la fino de tiu ĉi cirkulero estas aldonita plena adresaro de la ĝisnunaj kvindek-du fakanoj, por ke ili povu jam nun interrilati inter si kaj organizi sian laboron.

* * *

Pri labora plano ne multaj estis la esprimitaj opinioj; unu proponis : « ni komence faru, kion ni ĉefe bezonas », aliaj opinias : « tion ni faru, kion ni nur povas ».

Teorie tre alloga estas la unua propono. Teknikaj kompetentuloj — ne devige Esperantistoj — starigus nacilingve tabelojn de la plej necesaj vortoj pri « la domo », « la kampo », « elementa tekniko », « internaciaj rilatoj ». Poste, esperantaj lingvistoj — ne devige teknikistoj — farus la Esperantan tradukon. Bedaŭrinde, praktika sperto montris, ke en samaj kapoj devas troviĝi samtempe teknika kaj Esperanta kompetenteco. Sen tia kunesto, oni tre ofte nur venus al ne taŭgaj tradukoj.

La dua propono respondas tiun ĉi necesecon. Nur tiujn teknikajn vortarojn ni nun ellaboru, pri kies teknika materialo ni havas kompetentajn samideanojn. Feliĉe montriĝas el la supra nomaro, ke en ĉiuj plej necesaj fakoj ni havas la bezonatajn specialistojn. Tiel samtempe povas kontentiĝi ambaŭ postuloj : ĝuste tion ni povas fari, kion ni plej bezonas.

* * *

Ankaŭ pri labormaniero de la kunlaborantoj prezentiĝas du malsamaj vojoj; unue, tradukado de naciaj teknikaj vortaroj; due, tradukado aŭ verkado de elementaj lernolibroj en ĉiu fako.

Kelkajn gravajn vortarojn oni citis, nome :

1^o Seslingvan *Vortaron pri inĝenierarto*, eldonitan de Constable and Co, 10-12, Orange Str., Leicester Sq., London, W. C. 2.

2^o Kvarlingvan « *Technologisches Wörterbuch* », von Offinger, Stuttgart, J. B. Metzlersche Buchhandlung.

3^o « *Illustrierte Technische Wörterbücher* », Schломann-Oldenbourg, — Nünchen und Berlin, Druck und Verlag von R. Oldenbourg.

La laste nomitaj « Wörterbücher » konsistas el diversaj volumoj; unu estas dediĉita al ĉiu aparta fako. Da tiaj volumoj ekzistis en 1909 jam dek, kaj ili de tiu tempo plimultiĝis.

Ĉu ni traduku, unu post alia, de la komenco ĝis la fino, ĉiujn vortojn de tiuj ĉi grandaj vortaroj?

Praktikemulo prave atentigis, ke la vortarojn ni volas havi sur nia skribotablo, ne en nia ĉerko. Ni do devas elekti, kiel unue tradukotajn, tiujn el la teknikaj vortoj, kiuj estas plej urĝe bezonaj. La ceteraj venos poste.

Por tio mirinde taŭgas la dua proponita metodo. Ni traduku aŭ, pli bone, ni speciale verku en ĉiu fako elementajn kaj poste pli detalajn lernolibrojn. Ni ĉerpu por tio la tradukan materialon el la naciaj teknikaj vortaroj kaj el la provaj vortaroj, kiuj estis jam eldonitaj en Esperanto.

Tiuj lernolibroj ne bezonos esti verkitaj laŭ pedagogia vidpunkto, sed ĉefe kun la celo elekti la plej necesajn radikojn kaj praktike *provi* ilian uzeblecon. Ili eĉ ne nepre bezonas esti plene verkitaj kaj skribitaj, ĉar sendube la plimulto el ili neniam povos esti presita. Sufiĉos, se la celo de elektado kaj praktika provado estos atingita. La vortoj poste aperos en formo de alfabetaj tabeloj, kun esperante redaktitaj klarigoj kaj, eventuale, komprenigaj ilustraĵoj.

Por la eldonado de la vortaroj, la sama praktikulo, kiun mi jam citis, atentigas, ke mono estas necesa kaj ke financan planon oni devas jam nun starigi. « Mi spertis, li diras, ke entute la Esperantistoj estas oferemaj, kondiĉe ke ili vidas klaran celon, scias, kiu estas responda kaj regule ricevas informojn pri la spezoj.... Dudek mil frankoj estos troveblaj, ne timu, kaj per ili vi povos bone komenci ».

Kiom prava estas nia samideano, ne bezone estas iel insisti, sed ŝajnas, ke ne al la *lingvaj* institucioj apartenas la esploro de tiu ĉi *Financa* flanko de la demando, kvankam ĝi evidente estas nepre konsiderinda por atingi de praktikaj rezultatoj.

D-ro Pierre CORRET,

Direktoro de la Akademia Sekcio por la Scienca kaj Tehnika Vortaro.

Adresaro de la Fakanoj.

- BALLIMAN (S^o Jean), 5, rue de Provence, Paris (Francujo).
BLUTH (D^{ro} Friedr.), Bad Neuenahr, Rejnlando (Germanujo).
BRETTMANN (S^o), Stralsund (Germanujo).
BROWN (S^o G. Arthur), Rua Assembléa, 76, São Paulo (Brazilujo).
BUTLER (S^o Montagu C.), 17, Hart Street, London, W. C. 1 (Anglujo).
CAMESCASSE (S^o J.), 39, rue de Douai, Paris-9^e (Francujo).
ĈERNOHVOSTOV (S^o A.), Alberga (Finnlando).
DEULOFEU (S^o Venancio), Rivadavia, 5758, Buenos-Aires (Argentino).
DITTRICH (D^{ro} E.), Wettinerstrasse 33/3, Riesa apud Elbe (Germanujo).
DÖHLER (D^{ro} W.), ĉe Dittrich (D^{ro} E.).
FIȘER (D^{ro} Andreo), 25, rue Griboïedov, Tiflis, Géorgie (Caucase), via Batoum.
FLOURENS (S^{ino} Jeanne), 111, avenue G.-Clémenceau, Béziers, Hérault (Francujo).
FRIDRICH (S^o Rudolf), Profesoro ĉe gimnazio, Brno, Královo Pole, Moravio (Ĉeĥoslovakujo).
FROST (S^o Norman W.), 993, Watertown St., W. Newton, 65, Mass. (Usono).
GROSJEAN-MAUPIN (S^o E.), 14, rue du Val d'Osne, Saint-Maurice, Seine (Francujo).
HAKANSSON (S^o Eskil), Ursvik, Ulriksdal (Svedujo).
HEINZE (S^o Willy), Bennostr., 29, Oberlössnitz bez. Dresden (Germanujo).
HENDEL (S^o K.), ĉe Dittrich (D^{ro} E.).
HÖRNIG (S^{ino} F.), ĉe Dittrich (D^{ro} E.).
ISBRÜCKER (S^o Ir. J. R. G.), v. Beverningkstraat, 10, s'-Gravenhage (Holando).
JENTSCH (D^{ro} A.), ĉe Dittrich (D^{ro} E.).
KALITZKE (S^o W.), ul. Poplinskich, 2, Poznan (Polujo).
KANERVO (S^o L. M.), Tikkurila, Agrikultura Eksperimenta Instituto (Finnlando).
KARL (S^o), receveur des Finances, Ussel, Corrèze (Francujo).
KAUFFMANN (S^o Kurt), Hauptstrasse, 129, Heidelberg (Germanujo).
KAYSER (S^o G.), ĉe Dittrich (D^{ro} E.).
KOCH (S^o Anatolo), Warszawa (Polujo) « Poste Restante ».
LA COLLA (S^o Stefano), via F. Cavallotti, 1, Palermo (Italujo).

- LECHMERE-OERTEL (S^o F. O.), Gloucester-House, Broad Lane, Hampton (Anglujo).
- LEFÈVRE (S^o E.), Châlet Saint-Louis, impasse Saint-Louis, Cannes, Alpes-Maritimes (Francujo).
- LÖTZSCH (S^o T.), villa Alphyddan, III v., Askim (Svedujo).
- MARLY (S^o P.), 11, rue Ad.-Baysseance, Bordeaux, Gironde (Francujo).
- MAZZOLINI (S^o A.), viale Regina Vittoria, n^o 22, p. III, Firenze (Italujo).
- MC CONKEY (S^o M. C.), 2935, Nebraska St., Sioux City, Iowa (Usono).
- MESNY (S^o René), 12, rue du Chemin-de-Fer, Saint-Denis, Seine (Francujo).
- MEYER (S^o Georg J.), Augsburg, Spitalgasse, A, 211 (Bavarujo).
- NEMEC (S^o Václav), Prokuristo de Zivnostenská Banko, Karlovy Vary (Ĉeĥoslovakujo).
- PADFIELD (S^o W. W.), 2, Cedar Villas, Bath (Anglujo).
- PIZZI (S^o Francesco), R. Biblioteca Naz. di San Marco, Venezia (Italujo).
- PRIVAT (S^o Edm.), 2, chemin des Roches, Genève (Svisujo).
- RAVEN-HART (S^o Majoro R.), Union Club, Necochea y Perú, Mendoza (Argentino).
- ROLLET DE L'ISLE, 35, rue du Sommerard, Paris-5^e (Francujo).
- RUMPEL (D^{ro} Paul), Berlin-Wilmersdorf, Motz-Strasse, 52 (Germanujo).
- SCHNEIDER (S^o Francisko), 17, Havličkova ul. Prag-Karlin (Ĉeĥoslovakujo).
- SCOTT SCOTT (S^o Arthur J.), 48 Highfield Road, Doncaster (Britujo).
- ŠEFER (F^{ino} Ad.), 8, Gloucester Crescent, Regents Park, London, N. W. 1 (Anglujo).
- SETÄLÄ (S^o Vilho), Alberga (Finnlando).
- SHMURLO (S^o V. d.) Rakovaja N 11, Riga (Litovujo).
- SIEGEL (D-ro), Unterlauter-Coburg (Germanujo).
- STOJAN (S^o Petro), Crkvena, 1, Kragujevac (Serbujo).
- TIARD (S^o Ch.), 24, rue des Bons-Enfants, Paris-1^{er} (Francujo).
- VANVERTS (D^{ro} P.), 236, rue Solférino, Lille, Nord (Francujo).
- VILLA (S^o J. M. de), Apartado 1357, Habana (Cuba).
- Ĝis la fino de la jaro 1921 : ĉe S-ro M. Van Aelst, 107, rue Émile-Féron, St. Gilles, Bruxelles (Belgujo).
- WOHLSTADT (D^{ro} R.), Hamburg, 5, Lubecker Thor 22 (Germanujo).

WÜSTER (S^o Eugen), Berlin-Charlottenburg, Berlinerstr., 23 (Germanujo).

ZAMENHOF (D^{ro} Léon), Marszalkowska, 125, Varsovio (Polujo).

Sekcio por la Komuna Vortaro

Raporto de la Direktoro

Altestimata S-ro Prezidanto,

Nur tiun ĉi jaron povis la L. K. rekomenci sian laboradon interrompitan de la dum militaj kaj postmilitaj malhelpaĵoj. Certe kun granda plezuro la Esperantistaro konstatos la viklecon kaj fervoron de la tiu-ĉijara agado de siaj Lingvaj Institucioj kaj la ŝatindajn jam ricevitajn rezultatojn.

Estas tre ĝojiga fakto, ke multaj L. K.anoj partoprenis en la efektiva laboro, sed tio estas ankoraŭ pli grava kaj pli esperiga, ke, respondante al la demandoj kaj proponoj de la Sekcio por la Komuna Vortaro, ili klare pruvis per siaj respondoj kaj rimarkoj, ke, plene konsentante kun la ĵusa Akademia Deklaracio kaj prave atentante la danĝeron de malunueco kaj anarkio, montritan de la Akademio, ili ĝuste komprenas la nunajn bezonojn de nia afero kaj klare konscias la devojn, kiujn la kreskado de nia lingvo trudas al la Lingvaj Institucioj.

Jen estas la ideoj plej ofte esprimitaj aŭ aluditaj de la respondintoj :

Nepre bezona estas *kompletigo* de nia vortaro; sed tiu ĉi kompletigo devas fariĝi *metode*, unuece kaj interkonsente anstataŭ esti forlasata al la blinda hazardo de la cirkonstancoj kaj al la nesingardaj kapricoj de la scienculoj kaj nekompetentuloj.

« La tempo alvenos, eble jam alvenis, skribas Usona Komitato, kiam la Esperantistoj ne plu konsentos permesi al ĉiuj verkistoj, kleraj kaj nekleraj, bone instruitaj kaj neinstruitaj, senzorge proponi kaj uzi novajn vortojn, eĉ el radikoj intereŭropane konataj. Ĉiu devus memori, ke la internacia lingvo estas por la homoj de la tuta mondo, kaj se unu kaj alia homo povas gaje fari ĉiujn ajn aldonojn kaj ŝanĝojn sen antaŭa konsultado kun la L. K. aŭ Akademio, Esperanto baldaŭ disfalos same, kiel disfalus la angla aŭ franca aŭ iu ajn alia nacia lingvo sub tia traktado. »

Efektive, samaj kaŭzoj ĉiam estigas samajn efikojn : La libera natura senkonscia kaj senscia evoluado de la naciaj lingvoj, kiu igis ilin

ĉiujn malsimplaj, mallogikaj, malregulaj, kapricaj kaj esceptplenaj, baldaŭ kondukus ilin al pereiga disfalo en diversajn lokajn dialektojn kaj apartajn korporaciajn ĵargonojn, se la unuecon kaj komunan kompreneblecon de la lingvo ne defendus kaj konservus potencaj konsciaj konservaj fortoj, tio estas la libraj verkantoj, la instruistoj, la lingvaj literaturaj kaj sciencaj institucioj kaj la ŝtataj administracioj.

Ĉar la unueco de Esperanto ankoraŭ ne povas esti subtenata de la instruistoj nek protektata de la Ŝtato; ĉar, aliflanke, pro la diversnacieco kaj diverslingvaneco de la Esperantistaj aŭtoroj kaj vortaristoj, niaj libroj kaj vortaroj, respegulante la diferencajn lingvajn, pensajn kaj sentajn kutimojn de la verkantoj, anstataŭ esti, kiel en la naciaj lingvoj, unuigilo kaj konservilo, plej ofte estigas kontraŭe diversecon kaj malunuecon, pro tio la Esperantistaj Lingvaj Institucioj, almenaŭ ĝis la tempo, kiam ĉiu aŭtoro konsentos trudi al si mem volan konscian severan disciplinon, estas kaj estos la sola konserva kaj unuiga forto, kiu povas kontraŭbatali la dividajn pereigajn fortojn. « Oni povas troigi la respekton al la libera natura vivado », asertas Sveda Akademiano.

Kaj ĉiuj same konkludas : Ni nepre bezonas regulojn kaj gvidilojn; la propra kaj deva rolo de la Lingvaj Institucioj estas faciligi, reguligi kaj internaciigi, tio estas unuformigi la evoluadon de la lingvo. Vera libereco ne estas senbrida, senpripensa kaj senkontrola kaprico, sed estas konscia, prudenta, laŭregula, metoda elekto. La Esperantistaro bezonas konstantan kaj efikan helpon por la laŭnorma pliriĉigo de la lingvo kaj precizajn konsilojn por la malfacila elekto de la novaj radikoj kaj formoj. Nur la Lingvaj Institucioj, en la nuna stato de nia afero, povas plenumi tiun taskon, nur ili povas sciigi la Esperantistojn kaj precipe la verkantojn pri la internacieco aŭ neinternacieco de la radikoj, nur ili povas admoni kaj konsili pri la taŭgeco aŭ netaŭgeco, utileco aŭ neutileco de la proponebloj. Estas pli saĝe antaŭforigi la malsanon ol nesingarde atendi ĝin kaj nur klopodi por kuraci ĝin, kiam ĝi ekzistas, enradikiĝis kaj graviĝis. Estas pli facile kaj pli certe detruiri en la nesto la ovojn de malutila birdo ol tro malfrue vane persekuti la fortiĝintajn forflugantajn birdidojn, t. e. la jam presitajn malbonaĵojn.

« Mi tre bedaŭras, diras sprite iu Komitatano, ke la L. K. kaj Akademio fermas la pordon nur post kiam la ŝtelisto jam ŝtelis la ĉevalon el la ĉevalejo. » « Oni troigas, skribas Germana Respondanto, la regulon, ke la Akademio kaj la L. K. ne rajtas fari proprajn proponojn. Kial do ne admoni la Esperantistaron kontraŭ la malbonaj formoj? » « Ni mankas je direktantaj principoj kaj reguloj en la elektado de novaj radikoj »,

diras Franca Komitatano, kaj alia samnaciulo aldonas : « La Direktanta Organo de la Lingvo Internacia devus proponi al la L. K.anoj kaj al la aŭtoroj la radikojn, kiujn ĝi opinias la plej konsilindaj por plenigi la mankojn de nia vortaro. »

Mi petas la permeson rememorigi, ke la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro, antaŭe konsentante kun tiuj ĉi admonoj kaj postuloj, jam oficiale konsilis kelkajn principojn por unuformigo de la metodo sekvota en la elekto de novaj vortoj (Vidu Ofic. Gaz., 25 Majo 1924 : Oficialaj Komunikoj.), kaj ĝi intencas proponi al la Akademio publikigi, laŭ la deziro de la L. K., liston de preferindaj aŭ rekomendindaj radikoj. Oni povas esperi, ke tiuj ĉi rekomenditaj formoj kaj radikoj, eĉ se ili ne estas ĝis nun uzitaj, baldaŭ eniĝos en la uzadon tiamaniere, ke la L. K. rajtos pli poste oficialigi ilin kaj enmeti en la propran esperantlingvan vortaron.

Fine la Komunvortara Sekcio intencas peti de la Akademio, ke ĝi denove proponu al pli detala ekzameno kaj pli funda esploro de la L. K. kelkajn radikojn, kies signifo ne estas sufiĉe precize kaj plenakorde fiksita, kvankam ili estas oficiale akceptitaj. Mi citas ekzemple la radikojn *Administraci'*, *Aksesor'*, *Binokl'*, *Blok'*, *Emfaz'*, *Flagr'*, *Konjekci'*, *Sose'*, *Vero'*, k. t. p.

Certe multa laboro restas farota kaj la tasko de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro estas malfacila kaj multpena, sed tiu ĉi tasko estos multe faciligata kaj helpata per la evidenta bonvolo, per la kuraĝiga aprobo kaj per la ĉiukonsenta apogo de la L. K. Tia konsento kaj aprobo estigos sen ia dubo tre favorajn rezultatojn por la sukceso kaj prospero de nia afero.

Ni nun parolu pri la jam farita, kaj pri la jam komencita laboro :

1° Per sia unua cirkulero la Akademio demandis al la L. K. ĝian opinion pri la litero Ĥ kaj pri la duontehnika sufikso *Oid* aŭ *Ojd*. Pri ambaŭ demandoj, precipe pri la unua, mi ricevis tre interesajn rimarkojn, kiujn mi bedaŭras, ke mi ne povas citi tie ĉi. La plimulto de la respondintoj preferas la formon *Oid* kaj aprobas la laŭvolan anstataŭigon de la litero Ĥ per la litero K en la okazoj, kiam ĝi senpere sekvas post la litero R.

2° Al la alvoko de la Komunvortara Direktoro proponanta internacian esploradon pri Proverboj, Komparoj k. t. p. sufiĉe multaj kompetentaj kaj penemaj Esperantistoj jam favore respondis. Kelkaj fruktodonaj ideoj estas prezentitaj, la plano de la laboro kaj la metodo por la esploro precizigis, kaj oni povas esperi, ke diversaj naciaj subkomisionoj, direktataj de kompetentuloj, eĉ de eminentuloj, estos baldaŭ definitive organizataj kaj komencos la proponitan esploron. Nederlanda Komitatano

jam sendis tre gravan kaj admirindan preparan laboron pri la Holandaj proverboj. Al ĉiuj miaj sindonaj kunlaborantoj mi sendas mian koran dankon.

3^o Fine mi povas sciigi, ke la tuta proponita prepara listo por la 3a Aldono estas akceptita de granda plimulto de la L. K.anoj.

Tamen multaj el niaj kolegoj, eĉ akceptante la tutan liston, aldonas tre atentindajn rimarkojn kaj ĝustajn kritikojn koncerne la vortojn kun la pseŭdosufiksoj *Acio*, *Icio*, *Ucio*, kaj la verban finiĝon *ii*. Pro klare montritaj motivoj ili principe firme malaprobas la radikojn *Apelaci'*, *Arbitraci'*, *Civilizaci'*, *Deklaraci'*, *Erudici'*, *Evoluci'*, *Kontribuci'*, *Konversaci'*, *Navigaci'*, *Revelaci'*, *Revizi'*, *Rezignaci'*, *Spekulaci'*, *Sugesti'*, k. t. p., preferante la pli simplajn formojn *Apel'* aŭ *Apelac'*, *Arbitrac'*, *Civiliz'*, *Deklar'*, *Erudit'*, *Evolu'*, *Kontribu'*, *Konvers'*, *Navig'*, *Revel'*, *Reviz'*, *Rezignac'*, *Spekul'*, *Sugest'*, k. t. p.

Eceptante nur kelkajn apartajn radikojn aŭ formojn, kiuj eble estas konservindaj pro diversaj motivoj montritaj en la noto de la 30a de Junio, komunikita de la Prezidanto al ĉiuj L. K.anoj, la Direktanto de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro plene samopinias, kiel la suprediritaj L. K.anoj kaj li esperas, ke liaj altestimataj Kolegoj aprobas la jenajn konsiderojn kaj la rimedon, kiun li proponas por kontentigi kaj konsentigi ĉiujn .

Ni ne lasu nin trompi per la vorto « oficiala ». Ĝi ne signifas, ke ĉiu oficiala vorto estas propre esperantlingva kaj povas esti ĉiaokaze uzata. Oni ne devas forgesi, ke nia « *Oficiala* » vortaro efektive konsistas el du malsamaj partoj :

1^o La *propraj* Esperantlingvaj radikoj ;

2^o Multaj ĝenerale (aŭ, pli ĝuste, eŭropane) internaciaj radikoj, kiuj, ne apartenante propre al nia lingvo, restas *fremdaj* vortoj kaj, laŭ la 15a Fundamenta regulo, nur « povas esti uzataj » de la Esperantistoj. Preskaŭ ĉiuj radikoj kun pseŭdosufiksoj estas *fremdaj* internaciaj vortoj, kiuj, eĉ oficialigitaj, tamen ne estas asimilitaj kaj alproprigitaj al la Esperantlingva vortrezoro. « Oni devas diferencigi, skribas tre prave iu Germana Komitatano, inter vortoj plenrajte *enkondukindaj* kaj vortoj *tolerindaj*. »

Angla Akademiano rimarkigas, ke ĝenerale la *Internaciaj* vortoj estas internaciaj pli laŭ formo ol laŭ signifo. Tiu ĉi tre simpla sed tre grava rimarko pravigas la oficialigon de la internaciaj vortoj, kiun kelkaj rigardas kiel danĝeran aŭ almenaŭ senutilan : la oficialigo de tiaj vortoj servas por fiksi kaj internaciigi ilian signifon.

Jam en la 2a Oficiala Aldono Prof. Cart kaj iliaj tiamaj kunlaborantoj

tre prave dividis la oficiale aprobitajn radikojn en du listojn proksimume korespondantajn al la supremontritaj. La radikoj de la 1a Oficiala Aldono estos sammaniere dupartigataj en la baldaŭ publikigota Akademia Plena Radikaro anoncita en mia 1a cirkulero, kaj estas tre dezirinde, ke tia dupartigo estu poste klare montrata en ĉiuj estontaj vortaroj.

Multaj L. K.anoj postulas, ke oni senbalastigu kaj kribru nian vortaron. Ni ĝuste povos profiti la okazon por kontentigi tiun tute pravan peton, ĉar la suprealudita dupartigo estas la plej bona kaj taŭga rimedo por efektiviĝi la deziratan kaj dezirindan senbalastigon.

Prof. E. GROSJEAN-MAUPIN,

Direktoro de la Akademia Sekcio por Komuna Vortaro.

II. — ĜENERLAJ KUNSIDOJ DE LA KONGRESO

Malferma Kunsido la 31an de Julio, je la 14a kaj 15 min.

La Kongresanoj starante kantas la himnon kun akompano de belega orgeno.

S-ro ISBRÜCKER, prezidinto de la antaŭa kongreso, salutas la kongresanojn kaj malfermas la kunsidon. Antaŭ ol komenci la laboron, li diras kelkajn vortojn pri la ĵus mortinta fama samideano ANTONI GRABOWSKI, la glora samideano, kiu la unua uzis Esperanton kun ZAMENHOF. La kongresanoj honoras la mortinton per leviĝo kaj momente silenta starado.

S-ro ISBRÜCKER proponas la estraron je la nomo de la K. K. K. : ĝi estas aplaŭde akceptita de la Kongreso kaj konsistas el jenaj :

Honraj prezidantoj : Generalo SEBERT, membro de la Franca Instituto; Profesoro D-ro ŠUSTA, Ministro de Publika Instruado kaj Nacia Klero de la Ĉeĥoslovaka Respubliko; Inĝeniero ROTNAGL, vicurbestro de la ĉefurbo *Praha*.

Prezidanto : D-ro Stan. KAMARYT, profesoro.

Vicprezidantoj : J. M. WARDEN, ano de la Konstanta Komitato; D-ro Heinrich ARNHOLD.

Generala sekretario : Aug. PITLIK, ĉefkomisaro de la Ministrejo.

Sekretariinoj : S-ino E. F. CENSE, sekretariino de E. C. O. ; F-ino Julie ŠUPICHOVA, instruistino.

S-ro ISBRÜCKER transdonas la povojn al la nova Prezidanto; proponas la elekton de nova Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj kaj legas la nomon de S-ro WARDEN proponata de S-ro SEBERT. La nomo estas aplaŭde akceptita. S-ro KAMARYT dankas je nomo de si kaj de la kongresestraro por la honoro de la elekto. Li promesas ankaŭ je la nomo de ĉiuj, ke la estraro laŭ siaj povoj plenumos la donitan taskon.

Poste li legas la saluton de generalo SEBERT, prezidanto de K. K. K., kies malsano malhelpis al li partoprenon en la kongreso. Li proponas, ke la kongreso sendu al li saluttelegramon. La kongresanoj aplaŭde akceptas.

S-ro KAMARYT diras bonvenajn vortojn al S-ino ZAMENHOF, kiu ĉeestas la kunvenon. La ĉeestantaro varmege aplaŭdas kaj salutas ŝin.

La Prezidanto alparolas la ministron, Prof. D-ro ŠUSTA, kaj dankas lin pro la ĉe esto, kiu pravas lian simpation al la movado.

La Ministro respondas per ĉeĥoslovaka lingvo.

Kelkajn vortojn la prezidanto diras ankaŭ al la ĉeestanta vicurbestro, Ing. ROTNAGL kiu respondas per ĉeĥa lingvo kaj finas per kelkaj frazoj en Esperanto.

La prezidanto daŭrigas sian malferman paroladon.

La prezidanto donas la parolon al S-ro ISBRÜCKER, kiu legas la raporton de la Prezidanto de la K. K. K.

La prezidanto anoncas, ke la raporto de la L. K., prezentata de prof. CART, prezidanto de la Akademio, ne estos legata nun, sed nur dum la kunveno de la L. K., kaj dum la laborkunveno.

La prezidanto donas la vorton al S-ro PRIVAT, kiu alparolas la kongreson, je la nomo de la Universala Esperanto-Asocio. Kiel kutime, la oratoro ricevas meritatajn aplaŭdojn.

La prezidanto dankas S-ron PRIVAT pro lia tre kortuŝa parolado kaj proponas, ke oni sendu telegramon al Prez. MASARYK kaj al D-ro BENEŠ, ministro pri fremlandaj aferoj kiu estis sendinta salutleteron. La kongresanoj akceptas aplaŭde tiun proponon.

Post kvaronhora paŭzo, la oficialaj delegitoj alparolas la publikon laŭ la sekvanta ordo :

Belgujo : S-ro Frans SCHOofs, je la nomo de la Ministro de Sciencoj kaj Artoj;

Finlando : S-ro Vilho SETÄLÄ, je la nomo de la Finnlanda Ministro pro Instruado;

Hispanujo : Majoro Julio MANGADA, je la nomo de la Hispana Registaro;

- Italujo* : Komandanto ALBERTO ALESSIO, je la nomo de la Ministro pri Maraferoj;
- Nederlando* : S-ro SEVENHUYSEN, je la nomo de la Ministro pri Instruado, Artoj kaj Sciencoj;
- Litovujo* : S-ro MEDEM, je la nomo de la Ministro por Financaj, Komercaj kaj Industriaj aferoj;
- Saksujo* : S-ro Prof. FRITZ WICKE, je la nomo de la Registaro, sed precipe pri instruada fako;
- Ukrajno* : S-ro BOCKOWSKI, je la nomo de la Diplomata Misio en *Praha*.
- Ligo de Nacioj* : S-ro FUĴISAŬA, je la nomo de la Sekretario de la Ligo de Nacioj, kiu alvenas tuj post tiu parolado, kaj mem alparolas la kongreson per la angla lingvo. Lian paroladon tradukis S-ro PRIVAT. La vortoj de D-ro NITOBÉ estis varme aplaŭditaj.
- Saksa Esperanta Instituto* : S-ro Prof. DIETTERLE, salutas la Kongreson.
- Jugoslavio* : S-ro Bravko WIEGLE, je la nomo de la Jugoslavia Delegacio en *Praha*.
- Poste venas la Naciaj Delegitoj :
- Algerio* : S-ino TIARD.
- Aŭstralio* : S-ro HUDSON.
- Aŭstrujo* : S-ro OTTO SIMON.
- Belgujo* : F-ino JENNEN.
- Britujo* : *Anglujo*, S-ro CURRIE. *Skotlando*, S-ro KENNEDY. *Kimra lingvo* : S-ro EDWARDS. *Irlando* : Pastro PARKER.
- Bulgarujo* : S-ro KOLEV.
- Ĉeĥoslovakujo* : ĉeĥoslovaka lingvo : EISELT; germana lingvo SCHOLZE.
- Danujo* : S-ro BLICHER.
- Danzig* : S-ro KETTERLING.
- Esonujo* : je la nomo de rusoj : S-ro ONOFRIEV.
- Finnlando* : S-ro SETALA, je la nomo de *Finnoj* kaj ankaŭ de *Estonoj*.
- Francujo* : S-ro ERNEST ARCHDEACON.
- Germánujo* : D-ro STECHE.
- Por *Hebreoj* de la tuta mondo : S-ro HELLER.
- Hispanujo* : S-ro VICTOR O. de ALLENDE.
- Hungarujo* : Prelato GIESSWEIN.
- Italujo* : D-ro FILIPETTI.
- Japanujo* : S-ro SHIGEO NARITA.
- Jugoslavio* : por *Serboj* : S-ro KLAJIC; por *Kroatoj* : S-ino KELLET.
- Kanado* : S-ro PRATLEY.
- Litovujo* : S-ro KLIMAS.
- Nederlando* : S-ro ISBRÜCKER.

Norvegujo : S-ro BONNEVIE.

Polujo : S-ro Leo BELMONT.

Rumanujo : S-ro ĈSEH.

Svedujo : S-ro HEDSTRÖM.

Svisujo : S-ro STETTLER.

Urugvajo : S-ro LEGRAND.

Usono : S-ro PLESHE.

Blinduloj : S-ro MACAŅ, salutas je la nomo de la Blinduloj.

S-ro KREUTZ, je la nomo de la *Frankfurta foiro* ankaŭ salutas la kongreson, kaj atentigas pri la komerca valoro de Esperanto.

Unua Laborkunsido. London 2an de Aŭgusto, je la 15a horo.

La Prezidanto, D-ro Prof. KAMARYT, legas la tagordon, anoncas la legadon de la protokolo kaj la prezentadon de la Raporto pri la Internacia Komisiono. La Komisiona Raporto estos prezentata, sed ne diskutota hodiaŭ.

Li donas la parolon al S-inō CENSE, kiu legas la protokolon de la malferma kunsido.

La protokolo estas akceptita. S-ro Prof. KRONENBERG rimarkigas pri la vortoj « lingvo ĉeĥoslovaka ». La Prezidanto respondas, ke oni ne povas diskuti pri politikaj aferoj dum la kongreso, kaj ke ni lasu al la registaro la zorgon diskuti pri la esprimoj uzotaj en tiaj cirkonstancoj.

La Prezidanto donas la parolon al la ĝenerala sekretario, S-ro PITLIK, kiu legas la saluttelegramojn, kiuj estas multenombraj.

S-ro CART, prezidanto de la Akademio, parolas je la nomo de la Lingva Komitato kaj Akademio.

D-ro ZIRKEL parolas je la nomo de la *Politeknikum Cöthen*.

S-ro GERVOIS legas leteron de Henri BARBUSSE.

PRI LA INTERNACIA ORGANIZO.

S-ro Prezidanto donas la parolon al S-ro PAGE, prezidanto de la Komisiono elektita de la Haga Kongreso.

S-ro PAGE prezentas sian raporton, kaj diras, ke ĝi estas la rezultato de longa kunlaboro, ke ĝi ne pretendas esti definitiva, sed ke ĝi tamen estas grava, ĉar ĝi estas la rezulto de interkonsento inter la du gravaj institucioj, kiujn ĝi celas unuigi. Se la kongreso akceptos, la Komisiono verkos statuton, kiu estos submetata al la aprobo de la venonta kongreso.

La Komisiono elektita de la Haga Kongreso laboris dum la jaro per studado de dokumentoj kaj diversaj projektoj de organizo submetitaj al ĝi, kaj la provizora raporto estis presita kaj disdonita al la kongresanoj, sed rezulte de kunvenoj de la komisionanoj en Dresdeno tuj antaŭ la kongreso, la rekomendoj de la raporto estas rekonsideritaj kaj plisimpligitaj. Mallonge tiuj finaj rekomendoj estis : ke la ekzistantaj internaciaj organizaĵoj de la esperantistoj estu kunmetitaj en unu ĝeneralan organizon, kaj ke ĝenerala organizo estu starigita sub la nomo « Universala Ligo Esperantista » kun statuto verkota laŭ jena plano :

La Ligo konsistos el : 1^o Membroj, *a*) personaj (« Liganoj ») kaj *b*) Societoj, lokaj, naciaj, fakaj k. t. p.; kaj 2^o Aprobantoj, t. e. neesperantistaj organizaĵoj kaj personoj, kiuj morale kaj finance subtenas Esperanton.

La Liganoj elektos Komitaton de 6 anoj, kiuj fariĝos la Servada Komitato, kiu prizorgos la disvastigadon de la praktika kaj aplika uzado de la lingvo por komercaj, sciencaj kaj aliaj celoj. Ĝi daŭrigos la laboron kaj sekvos la tradicion de U. E. A.

La Societoj elektos Komitaton de 6 anoj, kiuj fariĝos la Propaganda Komitato, kiu administros la Centran Propagandejon de la Ligo kaj daŭrigos en *Parizo* la laboron de E. C. O. Ĝi konservos la arĥivojn de la esperanta movado kaj la oficialan bibliotekon. Ĝi organizos la propagandon ĉe registaroj kaj publikaj institucioj, la eldonadon de propagandiloj, kaj la kolekton de informoj kaj statistiko pri la disvastigado de Esperanto.

La Ĝenerala Komitato de la Ligo konsistos el : 1^o La Servada Komitato (6 anoj); 2^o la Propaganda Komitato (6 anoj); kaj 3^o tri anoj elektitaj de la Universala Kongreso, entute 15 anoj. La Ĝenerala Komitato elektos Prezidanton, du Vic-prezidantojn, Ĝeneralan Sekretarion kaj Ĝeneralan Kasiston de la Ligo, kaj fiksos ĝian juran sidejon.

La Direktanta Komitato konsistos el la Prezidanto kaj du Vic-prezidantoj de la Ligo, kaj la Prezidantoj de la Propaganda kaj Servada Komitatoj.

Delegitoj funkciados kiel la nunaj de le gitoj de U. E. A kaj reprezentos la Ligon en sia loko kaj la lokajn Liganojn ĉe la Ligo.

La apartaj reguloj kaj statutoj de E. C. O., U. E. A, A. K., K. K. K.; kaj I. U. E. S. estos forigitaj, sed ili reaperos ŝanĝitaj laŭ bezono en la interna regularo de la Komitatoj de la Ligo, konforme al la Statuto.

La Lingva Komitato kaj Akademio funkciados apud la Ligo laŭ sia ekzistanta regularo tuj revizota por respondi al la nova situacio

kreata de la Ligo, kiu finance subtenos ĝin kaj rajtos iel partopreni en la elekto de novaj anoj.

La Centra Kaso ricevos monon ne nur de ligoj kaj societoj kaj aprobantoj, se dankau de la Societo de Amikoj de Esperanto kaj bonvolemaj donacantoj. Ĝi uzos la monon ricevitan, krom por administraj bezonoj, por la subteno de la Lingva Komitato kaj Akademio kaj de la diversaj komitatoj kaj fakoj de la Ligo.

La Ĝenerala Komitato organizos Universalan Kongreson de Esperantistoj ĉiujare, kun la helpo de Loka Organiza Komitato. La Kongresanoj havos la plenan rajton diskuti kaj esplori ĉiujn demandojn komuninteresajn por ĉiuj esperantistoj, sed ne alpreni decidojn devigajn, ĉu por izolaj esperantistoj, aŭ por Esperantistaj Societoj, aŭ pro la Ligo; sed ili plene rajtos esprimi dezirojn kaj konsilojn. Tiujn deziresprimojn aŭ konsilojn la Direktanta Komitato de la Ligo kiel eble plej baldaŭ nepre devos submeti por definitiva decido al la Ĝenerala Komitato aŭ al alia koncernata komitato aŭ, se la afero tuŝas statuton aŭ gravan principon, al la ĝenerala voĉdono de la Ligo. Eventuala profito el kongreso estos dividata en tri egalajn partojn, 1^o al la nacia propaganda societo, kiu organizis la kongreson; 2^o al la ĝenerala kaso de la Ligo por pagi defecitojn de antaŭaj aŭ estontaj kongresoj; kaj 3^o al la Ĝenerala Kaso de la Ligo por ĝiaj ĝeneralaj celoj.

La Ligo eldonos Oficialan Gazeton kaj Jarlibron.

S-ro PAGE plue diras, ke laŭ li la Ligo realigos la iaman projekton de D-ro ZAMENHOF, ĉar ĝi ne nur kunigos la individuajn esperantistojn sed ankaŭ la societojn.

Seiu interesiĝas pri la demando, li povas skribi siajn opiniojn sur papero kaj doni sub formo de rezolucio aŭ konsilo.

Li diras kelkajn vortojn pri la granda merito de Generalo SEBERT, kiu malavare elspezis grandajn sumojn.

La diskutado de la raporto estas prokrastata ĝis la dud labor-kunsido.

Post duonhora paŭzo :

Prof. D-ro KAMARYT, proponas ke la ĉeestantoj leviĝu por honori la memoron de fama samideano pacifisto FRIED, kiu mortis in *Wien* lastatempe. La ĉeestantoj leviĝas, staras momente silentaj, kaj la kunsido daŭriĝas.

La Prezidanto proponas ankaŭ, ke oni sendu telegramon al la Ministroj, kiuj sendis Oficialajn Delegitojn al la Kongreso. Tiu propono estas akceptita.

MONUMENTO AL D^{RO} ZAMENHOF.

La Prezidanto donas la parolon al S-ro APPLEBAUM, kiu laŭ la tagordo, devas prezenti sian proponon pri Monumento sur la tombo de D-ro ZAMENHOF. Per varmaj vortoj S-ro APPLEBAUM prezentas la raporton kaj alvokas al la koro de la Esperantistoj. Li finas per la vortoj : La laboro estas nia, kaj la honoro estos tiu de la Esperantistaro estonte.

S-ro ISBRÜCKER diras, ke li plene aprobas la proponon, ke li iam proponis ion similan al S-ro HODLER, sed ke ne aŭdinte poste ion pri sia propono, la Nederlanda Asocio kolektis monon por tiu celo, kaj ke tiun sumon li donos volonte al la formiĝanta Komitato.

S-ro PRIVAT prezentas la ĉekon de S-ro ROY, ĉeko sendita parte por memortabeloj sur la domo de ZAMENHOF en *Bialystok* kaj en *Genève*, kie li loĝis.

S-ro BELMONT diras, ke la komitato, kiu devos plenumi la dezirojn de la komisiono, devos esti elektata ankaŭ inter la anoj de la Pola Societo. La kongreso konsentas, ke la Komitato devas ankaŭ turni sin al la Pola societo, por ke ĝi elektu anojn por tiu Komitato.

S-ro APPLEBAUM diras, ke jam ekzistas tia komitato en *Varsovio*, sed ke neniu kontraŭstaros, por ke oni elektu anojn el la Pola Societo. Li aldonas ke la Komitato serĉas neniun gloron. Ĝi konsentas, ke la laboro estos por la Komitato kaj la honoro estonte por la Esperantistaro. Li diras ke jam nun la Esperantistoj povas sendi siajn donacojn al la kasisto, S-ro PAGE, al kiu S-ro PRIVAT transdonas la ricevitan ĉekon de S-ro ROY.

S-ro PAGE diras, ke neniam li akceptis oficon kun pli da ĝojo ol tiun ĉi. Oni efektive povas jam nun sendi al li la monon, tamen li preferas, ke oni sendu al li nur plenigitajn promesilojn, troviĝantajn en la kongresdokumentoj.

La prezidanto admonas la Esperantistojn, ke tiu afero realiĝu kiel eble plej rapide.

ENKONDUKO DE ESPERANTO EN LA LERNEJOJN.

Poste S-ro MERGEL, delegito de la Pola Esperantista Societo, prezentas la proponon de la Societo pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Li diras, ke la Pola Societo multe pripensis antaŭ ol prezenti la raporton, kaj ke ĝi celas la bonon de Esperanto, ĉar ĝis kiam Esperanto estos traktata de la registaroj, kiel io negrava, la publiko ankaŭ neatentos,

sed de kiam iu nacio enkondukos ĝin kiel instruobjekton, estos jam multe pli facile propagandi. Oni ne povas devigi la Registarojn enkonduki la lingvon, sed oni povas peti de ili informojn sub tiu ĉi formo : se iu alia registaro enkondukas Esperanton, kion vi mem faros? Se la demando ne estas akceptita, tamen ĝi estos traktata dum parlamenta kunsido kaj tiel jam altiros la atenton de la publiko.

S-ro Prelato GIESSWEIN apogas la proponon de la Pola Societo kaj aldonas nur, ke oni devus ne nur sin turni al la Ministroj pri Instruado sed ankaŭ pri Komercio, Eksterlandaj Aferoj, k. t. p.

Sino CENSE opinias, ke estus tute malbone por Esperanto se iu internacia komisiono nomita de universala Kongreso de Esperanto turnus sin al la Francaj Ministroj por Instruado aŭ Komercio : plej bone povas agi en tiu senco la enlanduloj.

S-ro ARNHOLD proponas, ke oni nomu la komisionon, kiu turnos sin al la naciaj societoj, kun rekomendo, ke ili agu en tiun sencon en siaj respektivaj landoj.

S-ro PITLIK diras, ke estas ĉiam preferinde turni sin al la profesoroj aŭ instruistoj, ĉar tie, kie estas Esperantistaj instruistoj aŭ profesoroj, estas (en Bohemujo ekz.) permesite instrui nedevice Esperanton.

S-ro SCHAMANEK same agis en la instruistaj medioj, faris paroladon kaj estis nomata senpaga paroladisto por Esperanto. Ni unue devas prepari la kampon, por ke nia agado estu pli fruktodona kaj pli rapida.

S-ro SEVENHUYSEN opinias, ke ne estas saĝe peti ion, kion oni ne esperas ricevi. La fakto, ke lia ministro sendis lin, kiel reprezentanton al la kongreso pravas la intereson montratan de tiu ministro al Esperanto, sed li estas certa tamen, ke se iu petus de la Ministro la enkondukon de Esperanto en la lernejojn, li ne sukcesus havigi dekretan en tiu senco.

S-ro SETÄLÄ diras, ke la enkonduko de Esperanto kaj la propagando en tiu senco dependas nepre de la lokaj cirkonstancoj, kaj ke nur la lokaj personoj povas scii, kion ili devas fari. Li mem spertis, tion, kiam la Finnlanda Asocio propagandis apud la Ministerio, kaj sukcesis havigi la sumon de 25.000 fm. por Esperanto. Malkaŝigis ĝis tiam nekonataj malamikoj de Esperanto, kaj aperis artikoloj kontraŭ tiu decido, kiu pliŝarĝigis la buĝeton. Ĉiu povas en sia lando propagandi por enkonduko de Esperanto en la lernejprogramon kiel nedevisa objekto.

S-ro PRIVAT diras, ke efektive povas levigi malamikoj en la momento, kiam oni malpli pensas pri tio, sed ke ni devas ĉiam esti pretaj kontraŭstari ilin. Li proponas, ke la kongreso sendu telegramon al la Ligo de Nacioj, dankante ĝin pro tio, ke ĝi sendis sian reprezentanton al la kongreso, kaj petante, ke ĝi okupiĝu pri tiu enkonduko de Esperanto en la

lernejojn, petante la ĉeĥoslovakana registaron, ke ĝi turnu sin al aliaj registaroj.

S-ro DEGEN. — La registaro akceptas nur maturajn fruktojn, kaj ni ne devas prezenti al ili ion tute ne pretan. Ni ne havas taŭgajn instruistojn nek taŭgajn lernejjajn librojn por ĉiuj landoj. Unue ni havu bone preparitan grundon.

S-ro ISBRÜCKER. — Ŝajnas, ke la propono de la Pola Societo eliras el tre bona intenco sed nur verŝajne pro specialaj cirkonstancoj.

S-ro KRONENBERG. — Estas efektive tre grave enkonduki Esperanton en la programojn de la lernejoj, ĉar kiam ĝi estos enkondukita, estos por ni gravaj plifaciligoj. Ni havas jam tri regnojn, kiuj favoras Esperanton : Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, kaj Finnlando. Ni devas agi prudente kun la propono, kaj ne rifuzi ĝin, sed sekvi konsilojn de S-ro PRIVAT : turni sin al la Ligo de Nacioj kaj al la ĉeĥoslovaka registaro. Ni propagandu inter la junularo, ĉar ni bezonas la junularon por la estonto.

S-ro SOCK. — Ni ne parolu pri la enkonduko du Esperanto en la lernejojn, ĉar kiam ĝi estos jam sufiĉe disvastigita en la popolo, ĝi eniĝos mem la en instruadon. Ni daŭrigu nian propagandon kaj ne perdu nian tempon en paroladoj.

S-ro BELMONT ne vidas la proponon tiel danĝera kiel iuj, sed ni devas frapi de malsupre supren kaj ne de supre malsupren, sed sekvante la konsilon de la sankta skribo, kiu diras, « frapu kaj estos malfermate al vi », ni devas frapi konstante. Ni estas modesta komisiono kaj ni ne estas granduloj, sed eble oni povos fondi komisionon, kiu turnus sin al la naciaj societoj.

La prezidanto troviĝas do antaŭ du proponoj, kiuj estas :

Tiu de S-ro PRIVAT : pero de la Ligo de Nacioj, subtenata de S-ro KRONENBERG; tiu de S-ro ARNHOLD, kun konsento de S-ro Leó BELMONT, al kiu ankaŭ donas sian konsenton S-ino CENSE : ke oni starigu komisionon kiu rilatus kun la naciaj societoj.

La prezidanto voĉdonigas pri la propono PRIVAT-KRONENBERG, kiu estas akceptita. Li klarigas, ke unu ne estas kontraŭ la alia, kvankam ali ne estas la samaj, kaj ke oni povas voĉdoni ankaŭ pri la alia propono ARNHOLD-BELMONT-CENSE.

Tiu propono estas ankaŭ akceptita.

Dua Laborkunsido. Merkredon, 3an de Aŭgusto, je la 9 h. 15 m.

La Prezidanto petas la permeson legi la protokolon nur dum la estonta kunveno. La propono estas akceptita.

D-ro KAMARYT donas la parolon al S-ro PITLIK, kiu legas la alvenintajn telegramojn.

La Prezidanto proponas, ke oni elektu la komisionon pri la propono de la Pola Societo.

S-ro KRONENBERG proponas la nomojn de la Komisionanoj por ĉiuj landoj. Al tio S-ro Mergel proponas S-ron Czubinski por *Polujo*. Tiu nomo estas akceptita. La germanaj esperantistoj proponas S-ron Schramm el Dresden. Akceptita.

La Komisiono konsistas do ĝis nun el la sekvantaj nomoj :

Dr. Czubinski (Polujo), Dr. Sevenhuysen (Nederlando), Prof. Ad. Finet (Belgujo), Komandanto Mangada (Hispanujo), Setälä (Finnlando), Prof. Kamaryt (Ĉeĥoslovakujo), Dr. Privat (Svislando), Dr. Schramm (Germanujo).

Por la okazo de rifuzo de iu nomita persono, la komisiono povus elekti aliajn personojn.

Pri la Internacia Organizo, diskutado de la Raporto de la Komisiono, Dr. Kamaryt donas la parolon al Komandanto Alessio, kiu diras, ke estas eble preferinde diskuti pri la ĝeneraleco de la organizo, ĉar oni eble povus forlasi la detalojn.

Dr. Kamaryt diras, ke ekzistas do du proponoj, diskuti pri ĝeneraleco, kaj diskuti pri detaloj.

Dr. Arnhold diras, ke ne ekzistas du proponoj, ĉar la unua punkto estas de S-ro Page, estas ĝenerala, kaj la aliaj la detaloj. Se do oni akceptas la proponon de S-ro Page, oni unue diskutos pri la du punktoj.

S-ro Page raportas do pri la laboro de la Komisiono. La Komisiono nomita de vi laboris : ĝia laboro estas antaŭ vi. La raporto ne estas nun en la plej nova formo, ĉar la komisiono kunvenis en *Dresden* kaj diskutis tre funde kelkajn punktojn, kiuj ne troviĝas en la raporto. ĉar la preskosto estas konsiderita tro alta, kaj oni ankaŭ esperis ke la diskuto donos kelkajn ideojn novajn, kiuj igus netaŭgaj la novajn presajojn.

La prezidanto demandas do, ĉu oni konsentas pri la unua punkto, tio estas fondi internacian organizon de ĉiuj Esperantistoj, eĉ de tiuj kiuj pagas malgrandan kotizon laŭ la raporto de la komisiono.

La prezidanto donas la parolon al Kom. Alessio, kiu diras, ke oni devas akcepti la ĝeneralan ideon kaj danki la Komisionon kaj precipe la Prezidanton por la laboro. Li restas danka al ĉiuj, kiuj laboris. La projekto devus esti prezentita almenaŭ en Aprilo, por ke ĉiuj

gazetoj povu presigi ĝin kaj la Esperantistoj diskuti ĝin. Ni do nenion decidu pri tiu nuna projekto, kiu ne estas kontentiga. La ideo de Hago estis unuigo sed ne disiĝo de organizoj, dume li vidas du organizojn same kiel nun en la projekto. La sidejo en *Parizo* ne plu estas taŭga; ni devas havi pli internacian kaj pli neŭtran. Svislando estas la modelo por estonta mondo, ĉar pluraj Nacioj de diversaj lingvoj vivas tie akorde. Estas necese krei organizon, kiu devas doni vivon al Esperanto. Ne estas problemo de organizo, sed de ekonomio...! Esperanto estas kreita por internaciaj rilatoj. Oni enmetu du anojn de U. E. A. en la K. K. K. por la organizo de la estontaj kongresoj.

S-ro ARNHOLD petas, ke oni limigu la tempon al la parolantoj.

D-ro. Sos petas, ke oni revoku al la temo, al la tagordo.

S-ro WARDEN diras, ke li jam en Hago gratulis S-ron ALESSIO pro lia elokventeco, sed hodiaŭ li prezentos al li faktojn. La kongreso esprimis la deziron krei ĝeneralan organizon de ĉiuj esperantistoj, en kiu ĉiuj esperantistoj, eĉ tiuj kiuj ne pagas altan kotizaĵon, povos partopreni. Ĝi nomis komisionon. La komisiono laboris. La laboro estis multe pli granda ol oni povas pensi. Ĝi estas ne taksebla de la personoj, kiuj ne vidis la faratan laboron. Ni faris nian eblon, kaj jen la rezulto. S-ro ALESSIO plendas ke estas du serioj da kunvenoj. Se oni akceptas la proponon de S-ro PAGE, estonte ne plu estos du organizoj, du kongresoj, sed nur unu ĝenerala. S-ro ALESSIO devas do esti kontenta, ĉar la laboro de la komisiono estas bazita sur interkonsento. Pri la sidejo, la statutoj lasos la liberecon, ĝi estos en plej taŭga loko.

En tiu momento eniras S-ro HABRMAN, Eksministro kaj Deputito de la Ĉeĥoslovaka Parlamento, kiu alparolas la kongreson en ĉeĥa lingvo. S-ro Prof. KAMARYT tradukas lian paroladon en Esperanto.

La diskuto daŭras per la diro de S-ro KRONENBERG, kiu diras, ke ni devas celi ligan enhavantan ĉiujn Esperantistojn senescepte, ke U. E. A. ne estas tia. Oni devas iom pensi pri la propagandaj enlandaj societoj.

S-ro ARNHOLD esprimas la bedaŭron, ke S-roj STETTLER kaj PRIVAT ne ĉeestas, ĉar ili certe malaprobis la deflankigon de la diskuto de la tagordo, farita per la parolado de S-ro Kom. ALESSIO. Oni devas voĉdoni nur pri la propono, doni la rajton al la komisiono prilabori statuton sufiĉe frue por ke ĝi povus esti diskutata en la gazetoj antaŭ la XIVa kongreso. Ke la Kongreso malakceptu la proponon enirigi du anojn de U. E. A. en la K. K. K., ĉar espereble la organizo baldaŭ fariĝos kaj ekzistos nur unu kongreso organizota de la Ligo mem.

S-ro von FRENCKELL diras: Ofte ni jam spertis en nia organiza movado, ke se hodiaŭ oni ne havas la rajton decidi, kaj oni prokrastas, oni restos

ankaŭ poste kun la sama maldecideco; oni decidis nek la venontan jaron nek la postan, kaj tamen estas necese, ke oni atingu ion. S-ro v. FRENCHEL tute ne neas la gravecon de U. E. A., sed tamen la lingvaj institucioj estas ankaŭ tre gravaj. La financa stato de U. E. A. montras sufiĉe, ke ĝi ne povas jam nun bilanci sian budĝeton kaj oni volas altrudi al ĝi novajn elspezojn. Li deziras, ke la kongreso montru, ke ĝi fidas al la personoj elektitaj de la du interesataj institucioj, Esperantista Centra Oficejo kaj U. E. A.

S-ro BELMONT studis la projekton; ĝi ne estas ideala, perfekta, sed ĝi ekzistas. Ni ne devas diskuti ĝin sed ĝin akcepti, ĉar se ĝi estus prokrastita ĝis la XIVa, ne estas kaŭzo, por ke ĝi ne estu resendita ankoraŭ al alia kongreso. Se S-ro ALESSIO trovis eraron, li rajtas diri tion kompreneble, sed ni ne faru revolucion, nur evoluadon. Ni ne devas pensi pri forigo de *Parizo*, kies meritoj estas grandaj, kaj kiu estas tre utila. Ni lasu al la Komisiono la taskon pristudi la detalojn.

S-ro DEGEN diras, ke li ne vidas la bezonon ion ŝanĝi en la organizo ĉar la estontaj kongresoj estos bazataj sur la fakaj kunsidoj. Oni ne forigu la unuigon de la lokaj societoj.

S-ro PRIVAT, kiu ĵus eniris diras, ke oni devas diskuti tute senpacie, kaj atingi iun celon. Se oni prokrastus la principon ankoraŭ tiun ĉi jaron, la rezulto estus la sama. Oni povos dum la jaro kolekti la kritikojn, kaj korekti en la senco de la plimulto. S-ro PAGE havos la paciencon ankoraŭ kolekti ilin, esplori ilin, publikigi, kaj denove oni diskutos kaj decidis. Oni akceptu ne la raporton sed la rezolucion. Se iu havas iujn sugestojn farotajn, U. E. A.-anoj faru ilin al U. E. A. kaj la aliaj al la C. O. kaj oni preparolu ĉion dum la venonta Kongreso.

S-roj STETTLER kaj PRIVAT rekomendas al S-ro ALESSIO, ke li reprenu sian proponon, dankante lin pro lia bona intenco kontraŭ U. E. A., kaj rekomendas la voĉdonon de la rezolucio.

S-ro ALESSIO diras, ke li volonte akceptas la proponon de S-ro PRIVAT, se oni ne diskutas la detalojn.

S-ro MAHN diras, ke oni tro forgesas pri la Naciaj Societoj. Li voĉdonos la rezolucion se li havas la certecon, ke oni ne flankenlasas la propagandajn societojn. La estonteco de nia movado estas bazita sur la Lingvaj Institucioj kaj Naciaj Asocioj kaj U. E. A. Oni do diskutu. La nova organizo estu la rezulto de ĉiuj ideoj.

S-ro MIELERT diras, ke tiu afero estas jam sufiĉe pritraktita, ke oni devas voĉdoni laŭ la propono de S-ro PRIVAT.

S-ro ARNHOLD diras, ke la statuto estos publikigata, kaj ke tiel ĉiu havos la eblon ĝin diskuti.

S-ino CENSE respondas al S-ro MAHN, ke li povas esti tute trankvila pri la Naciaj Societoj, ĉar laŭ la projekto la E. C. O. daŭre rilatos kun la Societoj, kaj ĝia ekzisto estos bazita precipe sur tiuj ĉi Societoj.

Post la diskutado la Kongreso aprobis la jenan rezolucion :

La Kongreso ricevas la raporton de la Komisiono, kaj dankas la Komisionanojn pro ilia laboro;

Aprobas la starigon de Universala Ligo Esperantista laŭ la ĝenerala plano de la raporto;

Petas la Komisionon

1^o Verki statuton kaj financan planon de tiu Ligo, kiel eble plej konforman al tiu plano, presigotan en Oficiala Gazeto Esperantista kaj en la gazeto « Esperanto » kaj komunikotan al la Esperantista gazetaro;

2^o Celi la konsenton de la Societo de la Centra Oficejo kaj de U. E. A., kiuj dumtempe daŭrigu sian laboron, samtempe klopodante por enkorpiĝi sin en la Ligo, kaj por efektiviĝi ĝian sukceson; kaj

3^o Prezenti raporton al la 14-a Kongreso;

Petas la Lingvan Komitaton tuj revizi sian regularon por respondi al la nova situacio kreota de la Ligo; kaj

Petas al la Kuratoroj de la Kongresa Kaso, ke el eventuala profito el la Kongreso estu pagataj la elspezoj de la Komisiono, kaj se tia profito ne okazu, ke estonta kongreso rezervu parton de sia kotiza enspezo por tiu celo.

Tria Laborkunsido. Vendredo, la 5an de Aŭgusto, je la 14a horo.

Antaŭ ol oficiale malfermi la kunvenon, la Prezidanto senkulpigas la lokan Kongreskomitaton pri la iom tro longedaŭrinta ekskurso al Karsto. Tiun ekskurson aranĝis la Esperantista Klubo en Brno (Moravio) kun helpo de « Ĉeĥoslovaka vojaĝa kancelario ».

S-ro BREDALL petas la parolon, por plendi pri la manko de programo en tiu ekskurso. Oni ne antaŭe sciis pri aparta pago por aŭtomobiloj kaj eniro en grotoj, kaj tio havis sufiĉe da graveco precipe por la personoj, kiuj venis kunportante ĝuste la necesan sumon antaŭkalkulitan. Tio kaŭzis iom da konfuzo. Per la antaŭa informo pri ĉiuj kostoj oni evitus tiun konfuzon.

S-ro WARDEN diras, ke neniuj homoj estas perfekta, tamen tiu sperto devas esti por ni plia instruo. Li kredas, ke la malfacilaĵoj de la Loka Komitato estas pliigitaj per tiu fakto, ke multe da partoprenantoj anoncis sin en la lasta momento; tio malebligis antaŭvidi la nombron de ekskursontoj. Estas malfacile, kiam oni antaŭvidis kaj preparis

vojaĝon kaj tagmanĝon por 400 personoj, akcepti preskaŭ 1.000. Li dankas la Lokan Komitaton pro la multnombraj laboroj, okaze de tiu Kongreso, kaj petas la kongresanojn, ke ili bonvolu memori nur pli la bela impresoj, kiun ili havis en la belegaj subteraj mirindaĵoj, kaj forgesu la iom longan kaj eble nekomfortan vojaĝon.

La prezidanto donas la parolon al S-ino CENSE por legado de la protokoloj pri la unua kaj dua laborkunsidoj. Ambaŭ protokoloj estas aplaŭde akceptitaj. Li dankas la protokolistinon, pro la rapideco, kun kiu ŝi sukcesis prepari tiujn lertajn protokolojn, kaj legas la tagordon : 1^o novaj saluttelegramoj kaj leteroj; 2^o propono pri starigo de porblindula eldona organizaĵo; 3^o propono de S-ro ZIEGLER pri Esperantista internacia eldona Societo; 4^o propono de Finnlanda Esperantista Asocio pri la Esperantista Gazetaro.

S-ro PITLIK, ĝenerala Sekretario, legas saluttelegramon de S-ro Prezidanto MASARYK.

S-ro Rudolf FRIDRICH legas la rezolucion de Ligo de Malgrandaj Nacioj, kun deziro, ke Esperanto estu enkondukita en ĉiujn fakojn de la viva agado.

PORBLINDULA FONDAĴO. — La Prezidanto donas la parolon al Prof. STEJSKAL, kiu klarigas la celon de tiu fondaĵo. La Gazeto « Esperanta Ligilo » fondita en 1908 de S-ro Prof. Th. CART, estas la sola komunikilo, kiun havas inter si la blindaj Esperantistoj. Oni do devas subteni ĝin, kaj la plej bona maniero por tio estas fondi internacian organizaĵon por ebligi la daŭrigon de tiu grava entrepreno, kies celo estas ne nur homa, sed kiu havas tre grandan propagandan efikon. La nuna redaktanto S-ro THILANDER, kiu kun sia edzino laboras sen iu monkompensoj, meritas ĉiujn subtenojn kaj kuraĝigojn; malgraŭ tio, la eldonanto timas pri ĝia ekzista povo. Oni do bezonas regulan kaj konstantan subtenon. Bonvolaj donacoj ne sufiĉas por garantii la daŭran eldonadon. Pro tio oni sendis al la K. K. K. la proponon, fondi internacian societon, por ke oni enmetu tiun proponon en la tagordon de la XIIIa kongreso. S-ro STEJSKAL diras, ke en Bohemujo oni havas Boheman Porblindulan Asocion, kaj el kotizaĵoj oni kolektas la sumon por la abonigado. Laŭ tiu ekzemplo ĉiu Esperantisto, pagante kotizaĵon al iu Societo aŭ Grupo, aŭ abonante gazetojn, ĉiam aldonus 5 monunuojn, ekz. 5 centimojn por la porblindula presa entrepreno. Lerni Esperanton estas penige por la blinduloj; al ili mankas libroj, kaj ili devas lerni parkere. Li petas la bonvolan atenton de la Kongresanoj al tiu propono, ĉar la blinduloj havas specialan emon al studo de Esperanto.

La prezidanto demandas, ĉu iu petas la parolon pri tiu temo.

S-ro PITLIK estas certa, ke neniu inter ni kontraŭstaros la proponon kaj ke, kontraŭe, ĉiu subtenos. La blinduloj uzas Esperanton ne nur por paroli, sed ankaŭ praktike uzas ĝin por pritrakti siajn aferojn kaj staton. Tio do estas bonega pruvo pri la vera ekzisto kaj utileco de Esperanto. Li proponas, ke oni nomu Komisionon, kiu interrilatatos kun la Esperantaj Asocioj kaj gazetoj kaj iel fiksos tiun deziratan alpagon. Li proponas por tiu komisiono : S-rojn Prof. CART, STEJSKAL, MACAN, al kiuj oni povas aldoni aliajn personojn laŭ bezono. ~~1911. 10. 10~~

S-ro CART, esperas bonan akcepton de la propono. Li diras, ke la gazetoj povas fari, kion faris iam « Lingvo Internacia », kiu havis konstantan alvokon por monkolekto tiucele; tiamaniere ĝi multe subtenis « Esperantan Ligilon », pri kies vivo dum tiu tempo oni ne timis. Li parolas pri la merito de S-ro THILANDER, lia diligenteco, talento kaj li diras, ke oni povas plene fidi al li. S-ro CART finas dirante : « Mi diris jam al D-ro ZAMENHOF, ke la blindaj Esperantistoj restos certe fidelaj al la lingvo, kiun li donis al ni; helpu al ili, por ke ne mortu ilia gazeto. »

S-ro PRIVAT diras, ke li malfermis monkolekton en la gazeto *Esperanto*, kaj ke li adresigis ĝin rekte al S-ro Percy MERRICK, kiun li formale proponas kiel kasisto, almenaŭ kiel membron de la Komisiono. Li certigas S-ron CART pri lia helpo.

S-ino GENSE opinias, ke estas bone pripensi la estonton, sed ke oni ankaŭ devas pripensi la nunan tempon. Eble dum tiu ĉi kongreso, eĉ dum nuna kunveno oni povus fari kion faris niaj britaj samideanoj, dum sia kongreso, t. e. fari monkolekton, kies produkto estus tuj sendata al S-ro THILANDER, kiel unua helpo. Jam aperis numero de « Esperanta Ligilo » kun subskribo « Eldonita kun helpo de la Brita Esperantista Kongreso »; eble la du venontaj numeroj povos havi la surskribon « Eldonita kun la helpo de la 13a Universala Kongreso de Esperanto ». Eble S-ro STEJSKAL povos tuj elekti personon kiu staros ĉe la pordo kaj akceptos la oferon, kiun certe bonvolos lasi la elirantoj.

Tiu propono estas tuj efektivigita.

S-ro SETÄLÄ konstatas, ke nenie li vidis pli grandan entuziasmon ol inter la blinduloj.

S-no RACKOVA blindulino, diras, ke ŝi ĉeestas unuafoje internacian kongreson. Ŝi estas tre kortuŝita pro la sentoj esprimitaj al la blinduloj de la Esperantistoj. Por ŝi Esperanto estas efektiva fratigilo. La vivo de la blinduloj estas tre malluma, ne pro tio, ke mankas al ili la lumo de la suno, sed pro tio, ke mankas al ili ligilo vera kun la ceteraj homoj kaj inter si. La Esperanta Ligilo estas por ili vera lumo. Esper-

anto pere de ĝi alportis al ŝi kaj al ŝiaj samsortanoj la ĝojon, donante al ili la eblon korespondi, do instrui sin kaj distri sin. Ŝi do diras al ĉiuj tre koran dankon.

S-ro STEJSKAL diras, ke sen la ekzisto de la Esperanta Ligilo, la blinduloj ne povus partopreni la Kongreson, ili ne eĉ estus Esperantistoj, tial li altiras la atenton al la graveco de E. L. ». Li diras, ke la hungaroj, kvankam malriĉaj, kolektis sufiĉe grandan sumon por subteni ĝin. Li anoncas vendon de folieto kun versaĵoj je la profito de la blinduloj.

La Komisiono estas elektita el la jenaj anoj proponitaj de S-ro PITLIK : S-roj Prof. CART, PERCY MERRICK, STEJSKAL, MACAN, instruisto de blinduloj en instituto « Klar ». Tiu komisiono povos elekti mem aliajn anojn, laŭbezone.

La prezidanto informas, ke alvenis S-ro BLUMEL, delegito de la Internacia Oficejo de la Laboro en *Genevo*, kaj ke li salutas la kongreson.

S-ro BLUMEL, per franca lingvo, salutas la kongreson, kaj esprimas la bedaŭron, ke li ne povas fari tion je la komenco de la laboraj kunvenoj. Li estas tamen ĝoja, ke li povis fari tion nun, ĉar antaŭe li estus dirinta eble ion hazarde, kaj nun li diras sincere, ĉar li vidis. Li anoncas, ke la direktanto de la Internacia Laboroficejo publikigos en Esperanto la klarigan dokumenton. S-ro PRIVAT tradukas en Esperanto kaj atentigas la ĵurnalistojn kaj propagandistojn, ke ili nur citu la ĝustajn vortojn de la delegitoj oficialaj, kaj neniel uzu la vortojn, kiujn ili povus aŭdi de ili private. Tiun proponon la gazetistoj promesas akcepti kaj observi.

La Prezidanto dankas kaj aldonas sian peton al tiu de S-ro PRIVAT.

PROPONO DE S-ro ZIEGLER. — La prezidanto legas la proponon kaj demandas, ĉu la proponanto estas tie por subteni tiun proponon. La proponinto ne ĉeestas. La prezidanto diras, ke eldonado de libroj k. t. p. estas komerca entrepreno kaj sekve, povas esti nur privata afero.

S-ro von FRENCKELL proponas, ke oni simple malakceptu la proponon. La proponon estas malakceptita, kaj oni transiras al la sekvanta propono.

PROPONO DE FINNLANDA ASOCIO PRI UNUIGO DE LA GAZETOJ. — S-ro prezidanto vokas la supran proponon kaj petas la subtenanton klarigi ĝin.

S-ro SETÄLÄ klarigas, ke pro ekonomia problemo la plej abonataj gazetoj Esperantistaj, kiel ekzemple la Nacia brita, havas tro malmulte da abonantoj kaj anoncas deficiton. Plie, plejparte tiuj gazetoj ne estas

taŭgaj por la propagando. La propagandaj artikoloj, en Esperanta Finnlando, estas legataj nur de la Esperantistoj, do ne estas utilaj. Prefere oni presigu ilin en la nacilingvaj gazetoj. La artikoloj specialaj aperu en fakaj gazetoj esperantistaj, aŭ oni eldonu ilin en apartaj broŝuroj sen dato. La abonmono eliras ĉiam el la samaj poŝtoj, sekve la multenombroco de la naciaj gazetoj disigas la forton. La duono de la gazetoj havas parte la saman enhavon. Ni do havu unu komunan kaj la kompostado kaj la presado estos multe pli malkara kaj per sia aspekto ĝi faros multe pli da propagando inter la publiko. La nacia Asocio de Finnlando faris rezolucion sekvantan :

1) Ke la eldonado de esperantaj gazetoj fariĝas en la nuna tempo tre granda ekonomia ŝarĝo al la esperantistaj asocioj;

2) Ke malgraŭ tio, la plejparto de la gazetoj ne estas zorge redaktataj, tiel ke ili povu alporti utilon al la disvastigado de Esperanto;

3) Ke la multnombroco de la gazetoj ne estas utila al la progresado de nia movado en la nuna periodo de internacieco, ĉar tre malmultaj samideanoj povas aboni plurajn eksterlandajn gazetojn, kaj tiel la multaj naciaj gazetoj nur disigas la samideanaron;

4) Konsiderante, ke ĉirkaŭe la duono de la teksto en la esperanta gazetaro estas komuna al la plejparto el ili, oni povus, kunfandante ĉiujn gazetojn, doni al la abonantaro de ili ĉiuj la enhavon de ĉiuj esperantaj gazetoj kun ĝenerala (ne faka) programo, samtempe plialtigante la nombron de la abonantoj tiel, ke la entrepreno fariĝos eĉ profitodona;

5) Per tia kunfando perdata propagando nacilingva estus kun malpli gravaj ekonomiaj oferoj efektivebla per propagandaj broŝuroj nacilingvaj kaj per liverado de novaĵoj al la publika gazetaro;

6) La propaganda signifo de la komuna organo estus eksterordinare granda;

7) Sekve, la kunfando de la esperantistaj gazetoj kaŭzus neniam neriĉpareblajn perdojn al nia movado, sed kontraŭe multe plifortigus ĝin, samtempe forigante multajn ekonomiajn malfacilaĵojn el la kampo de nia laboro, kiu tiel nur profitus el ĝi;

Kaj la jarkunveno komisis al la Estraro de E. A. F. komenci traktadon en la celo koncernigi nian ĵurnalistan agadon.

S-ro SETÄLÄ do petas la kongreson, ke ĝi akceptu la rezolucion, t. e. eldono de sola gazeto internacia bone akceptita, kaj rezigno je la propraj naciaj gazetoj.

S-ro SEVENHUYSEN diras, ke en Nederlanda Gazeto ili havas konstantan rubrikon, kaj rakontas kiel, per anonco, skribita en Esperanto ili

varbis la policon, kiu deziris sekvi la enhavon de la aperantaj artikoloj, kaj fondis Esperantan kurson per la policanoj. Sekve de tio, ili sukcesis havigi la permeson por instruado de Esperanto en la lernejoj.

S-ro GRENKAMP diras, ke la propono de la Finnlanda Asocio estas tre bela kaj ideala. Ni ne estas ĉiuj tiel samaj, ke ni povu kuniĝi. La sama politika partio en la sama ŝtato havas diversajn gazetojn. Laŭ ties tas do tute domaĝe preparoli tiun aferon, nur la redaktantoj kaj eldonantoj povas ĝin prilabori. Neniu povas malhelpi, ke iu Esperantisto eldonu gazeton, se tio plaĉas al li.

S-ro KETTERLING diras, ke Esperantistoj ŝuldas iom, eĉ multon, al ĉiuj gazeteldonantoj, kaj ke ili devus esti dankaj al ili. Antaŭ la milito ekzistis multe pli da gazetoj ol nun, venos do eble la tempo, kiam estos ankoraŭ malpli. Oni eble povas simple instigi la eldonantojn, ke ili kuniĝu.

S-ro WARDEN klarigas pri la deficito de la *British Esperantist*. Li diras, ke tiu deficito devenas de tio, ke la Brita Asocio sendas la gazeton, kiel propagandon senpage al ĉiuj anoj de B. E. A., kaj oni devas enalkuli al la abonoj la kotizojn de la anoj. Oni ne povas bazi opiniojn sur la kontoj de la Brita Asocio. Tiu afero ne apartenas al la kompetenteco de tiu ĉi kongreso. La naciaj gazetoj donas faktojn utiligeblajn por la propagando enlanda.

S-ro PRIVAT opinias, ke la propono de S-ro SETĀLA estas tre akceptinda, ke efektive ekzistos ĉiam pli grandaj nacioj, kiuj volos havi sian proprajn grandajn naciajn gazetojn, t. e. la angl-, la franc- kaj la germanlingvanoj, sed ke eble, ne estas necese, ke aperu folieto por ĉiu lingvo. La propono estas tre studinda. Oni eble povus konsili al la Esperantistoj, ke ili kiel eble plej ne multigu la eldonon de la gazetoj.

La prezidanto resumas la diritajn opiniojn. Certe estas multaj gazetoj, sed egale certe estas malfacile ordigi la aferon, malpermesi al iu nacio eldoni gazeton. Deziresprimo de la Kongreso povas tamen iel influi. Ofte la gazetoj estas eldonataj de novaj kaj entuziasmaj esperantistoj, sed oni devas pripensi, ke simpla entuziasmo ne sufiĉas por viviĝi gazeton. (Li legas rezolucion proponatan de S-ino CENSE). La rezolucio de S-ino CENSE estas bona. Ni ekzemple havas en Ĉeĥoslovakujo propagandan gazeton « *Esperantsky Zpravodaj* », kiu aperas en ĉeĥa lingvo kaj kiu faris bonan propagandon, de kiam ĝi eliris. Ĝi donas bonajn informojn kaj ne havas deficiton.

S-ro SETĀLA diras, ke la propono de S-ro PRIVAT estas pli kontentiga.

S-ro PRIVAT petas, ke la Kongreso kontentiĝu per protokolo de utilaj konsiloj kaj ne akceptu iun ajn rezolucion.

S-ro Leo BELMONT opinias, ke la ideo estas tre brila, ĉar la Esperantistoj estas unu popolo kaj povas havi unu gazeton, sed oni devas zorgi pri la fakaj. Li petas, ke oni rekomendu en la rezolucio la fakajn gazetojn.

S-ino CENSE ne komprenas, ke oni povas konsenti al kelkaj grandaj nacioj la rajton havi siajn proprajn organojn, kaj demandas kiamaniere oni distingas la grandajn de la malgrandaj nacioj? Ĉu plaĉos al la italoj aŭ hispanoj esti konsiderataj kiel malgrandaj nacioj? Ni ĉiam insistas pri la plena sendependeco de la naciaj societoj, kaj ni neniel havas rajton trudi al ili iujn devojn kiujn ili konsiderus kontraŭ sia nacia propaganda devo. Ĉiu estas libera eldoni sian organon, kaj ni neniel rajtas malpermesi al ili, eĉ kiam ili aperigas du gazetojn, kiam apenaŭ unu povas vivi. Oni povas voĉdoni pri rezolucio, kiu konsilas ne eldoni nebezonaĵajn gazetojn.

S-ro STETTLER konsideras tre subteninda, ne la proponon, sed la ideon de S-ro SETALÄ, tio estas iomete afero de komerco kaj kapitalo, kaj oni starigas konkurencon. Ni ne ordonu ion ĉi tie al iu societo. Li proponas korekton por la rezolucio de S-ino CENSE.

S-ro PRIVAT rezignas sian proponon kaj aliĝas al tiu de S-ro STETTLER.

S-ro ROBERTSON diras, ke li povas akcepti la proponon de rezolucio, sed ke oni rekomendu tion poste al la Universala Ligo de Esperantistoj.

S-no CENSE volonte akceptas al rezolucio de S-ro STETTLER, kiu estas tute laŭ la sama ideo kiel ŝia, se ĝi ne estas laŭvorte la sama.

S-ro Prezidanto legas ankoraŭ unufoje la rezolucion, kiu estas akceptita.

Ferma kunsido. Sabaton, 6an de aŭgusto, matene.

La prezidanto legas la tagordon kaj donas la parolon al S-ino CENSE por legado de la protokolo.

S-ino CENSE klarigas, ke la protokolo ne estas finita pro manko de tempo. La prezidanto demandas, ĉu la kongresanoj lasas al la estraro la zorgon pri la finstarigo de tiu protokolo laŭ la notoj de la sekretarioj, kaj ĉu ili fidus je tiu ĉi. Post jesa multopa respondo, la prezidanto donas la parolon al S-ro PITLIK, ĝen. sekretario, por la salutleteroj kaj telegramoj.

S-ro HORNER prezentas sian rajtigilon, kiun tradukas el la franca

lingvo S-ino CENSE, kaj poste li salutas la kongreson je la nomo de la Ruĝa Kruco en *Genève*, per elokventaj vortoj, kiuj estas varme aplauditaj.

La prezidanto dankas pro tiuj vortoj, kaj donas la parolon al S-ro KROUZIL, kiu legas la rezolucion alprenitan dum la kunveno de la inĝenieroj.

S-ro BALKANYI petas la parolon por atentigi la esperantistojn pri la trouzo de la vortoj *Esperanto* kaj ZAMENHOF por reklamoj kiel por raziloj, kiuj laste estis anoncitaj. Li diras, ke ofte la novaj Esperantistoj kritikas la vortojn uzatajn, kaj konsilas, ke oni lasu tion al la sciencistoj en siaj revuoj.

La prezidanto apogas tiun diron, aldonante, ke bona komercaĵo ne bezonas bruan reklamon.

Pri la kritikoj de iuj Esperantistoj, li konsilas, ke oni iom pli fidu al la kapableco de la Lingva Komitato.

La Prezidanto donas la parolon al S-ro CART, prezidanto de la Akademio, kiu legas resumon de sia raporto, dirante, ke tiu raporto baldaŭ aperos. Li petas helpon por la reorganizo de la L. K., ne kritikojn simple; tiuj ne helpas, sed helpon ĉiu povas doni. Ni ne kontentiĝu per kritikoj, ni montru kiel oni devas labori. Eble ni kelkafoje eraris, sed fidu, kun via helpo ni sukcesos starigi la necesan teknikan vortaron. Li legas la nomojn de la personoj, kiuj jam proponis sian helpon por la diversaj fakoj, kaj ree esprimas sian esperon ricevi helpon de kiel eble plej multenombraj Esperantistoj.

La Prezidanto dankas al la L. K. kaj al ĝia prezidanto, kaj esprimas ankaŭ sian esperon, ke la Esperantistoj, anstataŭ kritiki, helpos al tiu institucio, kies gravecon por nia lingvo ĉiu konas aŭ devas koni.

S-ino CENSE legas la transdonitan al ŝi rezolucion de la Studenta fako.

La prezidanto memorigas tiukaze, ke la kunvenoj, kiuj deziras vidi siajn raportojn en la ĝenerala raporto, devas doni ilin al la Sekretariino.

S-ro Paŭlo MEDEM petas la parolon por atentigi kelkajn Esperantistojn pri la elparolado, kiu devas resti unuforma en ĉiuj landoj kaj atentigas pri kelkaj literoj, kiuj estas aparte elparolataj de kelkaj popoloj. Li aŭdis iafoje la akcenton sur la lasta silabo, kaj kio estas mirinde, ne de la francaj Esperantistoj. Ni estas granda familio, kaj ni devas atentigi nin pri niaj reciprokaj mankoj, sen ofendo, unuj por la aliaj.

S-ro CART diras, ke oni ne devas esti tro severa, ni atentigu, sed ne malkuraĝigu.

S-ro Prezidanto diras, ke ambaŭ konsiloj estas bonegaj, ni sekvu ilin ĉiam. Ni uzu Esperanton, ni ne senkuraĝigu la komencantojn, kiuj uzas Esperanton, sed kiam iu volas paroli publike, aŭ skribi en la gazetoj, li almenaŭ parolu aŭ skribu korekte.

PRI LA ESTONTAJ KONGRESOJ. — Oficiale venis proponoj el *Wiesbaden* kaj *Danzig*, kaj private de aliaj lokoj. La prezidanto klarigas, ke la cirkonstancoj, ne ebligas, ke la kongreso okazu en *Wiesbaden*, sed ke *Helsinki*, kiu intencis inviti nur la XVan invitas nun la XIVan. Li donos la parolon al S-ro SETÄLÄ, kiu faras la proponon.

S-ro von FRENCKELL havas la parolon. Li diras, ke estas necese, koni la principojn kaj taskojn de niaj kongresoj, kaj laŭ tio elekti la urbon, kie ili devas okazi. Unue, ni kunvenis por scii ĉu funkcias la lingvo kaj poste por havi okazon kunveni, kio estas tre interesa por la lingva unueco. Tiun ĉi fojon ni foriros el *Praha* kun la absoluta konvinko, ke nia lingvo ne povas esti forigita, ke ĝi vivos. Li dankas al la ĉefaj samideanoj pro la organizo de la kongreso, kaj diras, ke la harmonio estas la ĉefa eco de tiu ĉi kongreso. La kongresanaro estas grandnombra, eble jam tro multnombra, tial ne estas eble necese serĉi la centron de Eŭropo por okazigi niajn kongresojn. Eble ni baldaŭ konsideros necesa organizi la kongreson en Japanujo, Afriko, Kanado. Ni nur demandas nin, kie Esperanto ricevos la pli grandan antaŭenpuŝon. Ni elektu landon, kie la valuto estas favora por la plimulto, kie la gazetaro estas favora, urbon ne tro grandan. Ekzistas tiaj landoj kaj urboj. Ni devas serĉi tion, kio estas plej bona por nia propagando.

S-ro STETTLER petas la parolon pri la tagordo. La germanoj mem ne tre deziras havi la kongreson en *Wiesbaden*, aliparte ekzistas serioza propono de la finnaj Esperantistoj. Li petas, ke S-ro SETÄLÄ mallonge rekomendu la aferon, kaj oni poste voĉdonu.

La prezidanto donas la vorton al S-ro SETÄLÄ por subteni kaj klarigi la proponon de la finnaj Esperantistoj.

S-ro SETÄLÄ diras, ke efektive ili deziras havi la kongreson en *Helsinki*. Li esperas, ke venos tre multaj Esperantistoj, la vojo ne estas tro longa. Ili provos aranĝi specialajn ŝipojn el ĉiuj plej gravaj havenoj. Ili provos disdoni la kongresdokumentojn jam sur la ŝipoj, por ke ĉiu povu studi ilin jam antaŭe. La kurzo estas sufiĉe favora, kaj plie ili tre verŝajne disponigos senpage loĝejojn por la malriĉaj kongresanoj, purajn malkarajn manĝejojn por modestaj monuoj. La tuta spirito de la movado estas koncentrita en *Helsingfors*. La gazetaro estas sufiĉe favora kaj akceptas artikolojn pri nia movado. La finnoj tre malrapide entu-

ziasmiĝas, sed ilia *flamo* daŭras. Ili aranĝos ekskursojn tre interesajn por ĉiuj vizitantoj. Finnlando estas neŭtrala lando, kiu havas antipation al neniuj aliaj nacioj. Ili havas du oficialajn lingvojn sed, unu Esperanto-asociacion. Li kuraĝas diri, ke kiel Svislando ili havas idealon de interpopola kunligo.

S-ro WARDEN subtenas la proponon de S-ro SETÄLÄ. Ni fidis al la Prahanoj; jen ni havas la rezultojn: la kongreso brile sukcesis. Ni nur bedaŭris, ke ni tro superŝutis la sekretarion per laboro. Efektive Finnlando ne estas tiel malproksime, ĝi ĉiam estas proksime al iu loko, kaj ne povas esti proksima al ĉiuj. Ne estas dezirinde okazigi la kongreson ĉiam proksime al ni, ni iru iom norden. La belecoj de Finnlando estas sufiĉe allogaj kaj bone konataj. Ni estu dankemaj al la finnoj pro tio, kion ili laste faris: ili ja havigis al Esperanto la subtenon de la ŝtato.

S-ro PITLIK diras, ke dum sia vojaĝo al *Helsinki* li trovis tie tre viglan Esperantan movadon. Por skandinavaj landoj ni bezonas kongreson. Li subtenas la proponon de S-ro SETÄLÄ por la finnoj, kiuj estas popolo tre gastema kaj laborema kaj modesta.

La prezidanto demandas, ĉu do oni konsentas pri la propono, aranĝi la kongreson en *Helsinki*. Tiu propono estas entuziasmo akceptita.

S-ro NARITA legas je la nomo de japanaj Esperantistoj inviton por la XVa kongreso al *Tokio* en la jaro 1923a.

La prezidanto dankas la Japanojn pro ilia invito al la kongreso, kaj esprimas la esperon, ke iam ni havos kongreson en tiu malproksima oriento, precipe danke al la ĉeesto tie de la finna Ambasadoro S-ro RAMSTEDT, kiu estas, kiel jam dirite, tre fervora samideano.

S-ro SETÄLÄ dankas la kongresanojn pro la entuziasme akceptita propono. Li havas jam tri aliĝintojn, kiuj pagis la kotizon, kvankam ĝi ne jam estas fiksita. Li esperas, ke ni laboros tie kaj amuziĝos en malpli granda varmeco ol ĉi tie en *Praha*; sed tamen ni ne bezonos havi palton dum la kongreso. Li diras, ke estas ankaŭ dezirinde organizi kongreson en Japanujo.

S-ro BELMONT diras, ke la Esperantistoj jam nun malmultnombraj, kiuj kunvenis en *Boulogne-sur-Mer* scias, ke ni kunvenadas ĉiujare kun la sama sento, kiu igas nun senti, ke efektive ekzistas Esperantujo. En Esperantujo ne okazis ĝis nun militoj, kaj li esperas, ke ne okazos milito inter Japanujo kaj Polujo pri la XVa Kongreso. Ni Poloj, ni ja scias, ne povas viziti la XIVan; sed ni esperas, ke la projektita monumento estos preta, kaj ke okaze de la XVa oni povos ĝin starigi. Li legas poemojn al la XIVa kaj pri la reguloj de vivo de la Esperantisto.

S-ro Prezidanto de la K. K. K. notas la inviton de Japanujo, kaj Pol-

lando, dankas S-ron SETÄLÄ kaj la finnajn Esperantistojn pro la proponata organizo de la kongreso en *Helsinki* kaj bondeziras al tiu kongreso. Li konstatas la akcepton de la kongreso, kaj diras, ke kiel kutime tiu deziresprimo estas resendota al la K. K. K. por fina esploro kaj starigo de la detaloj kun la Loka Komitato.

S-ro FUĴISAŬA estas tre ĝoja, ke la XIVa okazos en Finnlando. La Finna Ambasadoro en Japanujo propagandas kaj favoras Esperanton, kies varma adepto li estas. Japanujo estas tre malproksima por Eŭropanoj, kaj eble finance la sukceso ne estus atingebla. Tamen la kongreso okazanta inter ni estus tre grava propagando, kiu multe efikus. Li tre favoras la proponon faritan de S-ro NARITA, kaj ni tri ĉi tie Japanoj en Eŭropo helpus por sukcesigi la kongreson.

S-ino CENSE diras, ke iu Esperantisto venis al ŝi por demandi, ĉu ne estus necese stenografi la kongresajn diskutojn entute, ĉar laŭ opinio de tiu ĉi samideano oni eble povus opinii, ke la raporto ne estas senpartiaj. La protokoloj estas ja legitaj dum la kunvenoj kaj speciale pro tio, ke la personoj, kiuj diris ion, povu korekti la sencon de iliaj diroj, se ili ne estas tiaj, kiaj ili esprimis. Kompreneble el notoj ne brilas la elokventeco de niaj oratoroj; sed la ĉefa afero estas, ke oni trovu la sencon de tio, kio estas dirita. La presado de stenografita raporto estus tre kosta kaj eble ne prezentus tiel gravan intereson; ĉar ofte oni parolas por paroli, kaj ne ĉiam interese estas raporti detale la diritajn vortojn. La grava demando estas en tio la financa, ĉar ĉiu kongresano ricevas la raportojn de la kongresoj, kaj se ili fariĝus tro kostaj, ne plu estus eble tiel dissendi ilin. Mi do respondis al tiu ĉi persono, ke la protokoloj estas nur objektivaj; sed ĉar el la diskutoj venas la lumo, mi petas vin pripensi tiun punkton por la venontaj kongresoj, kio multe faciligos la taskojn de la sekretarioj.

La prezidanto diras, ke stenografado en Esperanto estas ankoraŭ nun sufiĉe malfacila. La dirita persono havas ja krom la legado publika de la protokolo la garantion, ke ili estas faritaj laŭ notoj de du sekretariinoj, kiuj povas per siaj notoj kontroli unu la alian kaj doni bonajn tekstojn.

S-ro PRIVAT diras, ke esplorante la tutan kongresan semajnan laboron li sentas, ke regis plena harmonio. La n^o 13 nur al superstiĉuloj portas malbonan ŝancon. La protokolistino povas esti tute trankvila pri siaj protokoloj. Neniu dubas pri ŝia lerteco, kaj ĉiuj al ŝi estas tre dankaj pro la grava laboro, kiun ŝi plenumas dum niaj kunsidoj. Li dankas al ĉiuj kiuj multe laboris. Ni ŝuldas precipe al la prezidanto, kiu tiel majstre prezidis la laborkunsidojn, la plej sinceran dankon. Same al

S-ro PITLIK, la agema sekretario, al F-ino ŠUPICHOVA, la ĉiam sindona propagandistino kaj pionirino de nia movado. Brilis la suno de Esperanto, kiel la materia suno sed pli profunde brilis la suno de amokantita de l' hinda poeto. Ni ĉiuj disportos hejmen iom de ĝiaj radioj en niaj koroj.

S-ro ISBRÜCKER : Mi ne estas tre parolema. En nia Haga kongreso ni havis 400 esperantistojn. Mi do komprenas, ke la laboro por 2.500 estas multe pli granda, kaj ke ĉiu aranĝo iĝas pli malfacila. Al la XIVa kongreso, se mi povus ion konsili, kiel kongresorganizinto, tio estas, ke ili ne aranĝu unutagan ekskurson al la Norda Poluso !

S-ro KAMARYT esprimas sian ĝojon pri la laboroj de la kongreso, kaj la kongreso ĝenerale. Estis por ni agrablaj tagoj, estis neforgeseblaj momentoj, miraklo, ke ni, homoj de 42 nacioj, povis dum la semajno alparoli unu la alian uzante la saman lingvon. Mi dankas vin, ke vi venis multenombraj, kaj ke vi estis indulgemaj al ni. Mi dankas al la kongressestraro, al S-ino CENSE, kiu tiel lerte gvidis la protokolojn, malgraŭ la malmulta tempo inter la kunvenoj. Same mi dankas al U. E. A., al S-roj STETTLER, PRIVAT, JAKOB. Mi dankas al S-ino ZAMENHOF, pro honoro, kiun ŝi faris al ni, ĉeestante la kongreson. La verko de iu viro ne estas ĉiam sole la verko de li mem, sed ankaŭ ofte la merito de la kunvivanta edzino. S-ino ZAMENHOF havis sian parton en la laboro de nia kara mortinto. Ŝi estu daŭre amata kaj respektata de ni.

(La kongresanoj bruege aplaŭdas).

La kongreso estis vera revivigilo; ni iru nun al nova laboro kaj ĝisrevido en *Helsinki!*

La kongreso finiĝis per kantado de « La Espero ».



TABELO DE LA ENHAVO

	Paĝoj.
I. — PREPARAJ DOKUMENTOJ	5
1. Konstanta Komitato de la Kongresoj.	5
2. Loka Organiza Komitato.	5
3. Oficialaj Apogoj.	6
4. Komunikoj de la Loka Komitato.	8
5. Statistiko de la Kongresanoj	15
6. Raporto de la Prezidanto de la Lingva Komitato kaj Akademio.	16
7. Raporto de la Prezidanto de la Konstanta Komitato de la Kongresoj.	21
II. — OFICIALA PROTOKOLARO.	49
1. Kunsidoj de la Lingva Komitato.	49
2. Generalaj Kunsidoj de la Kongreso	63

4 3
 3 4 1/2 28
 3 4
 3 3

 13 15 28

11. 100

1. Fundamentaj dokumentoj pri la Oficiala Gazeto kaj la Centra Oficejo.	0 25
---	------

II. — Historia Parto.

III. — Bibliografio de Esperanto [013 × 12 ×].

1. Bibliografio de libroj redaktitaj en Esperanto aŭ rilataj al Esperanto. Unua parto (1887-1893)	3 »
Deka volumo 1913	2 »

Tiuj kajeroj enhavas bibliografiajn notetojn, presitajn sur unu flanko de la papero, kaj sekve detranĉeblajn kaj glueblajn sur slipoj, laŭ la internacia oficiala formato. Jen specimeno de tiuj notetoj :

GRABOWSKI (A.)	412-325 (023) × 12-3 × 651.3 × 12 ×
<p>1890. — Kondukanto internacia de l'Interparolado kun modeloj de leteroj. — Ellaboris A. Grabowski [Tiu-ĉi verko estas trarigardita de D^{ro} Esperanto]. — [Per germana lingvo.] Internationaler Fuhrer der Konversation mit Briefmustern. — Ausgearbeitet von A. Grabowski.</p> <p style="text-align: center;">[Literaturo de la lingvo Esperanto, N^o 33.]</p> <p>*Nürnberg, 1890. 1 vol. (22 × 14 1/2) [W. TüMMEL presis]. 45 + [3] pag. Prezo : [0 fr. 75].</p> <div style="text-align: center; font-size: 2em; margin: 10px 0;">○</div> <p>U. B. N^o 58. E. C. O. 1911; N^o 42.</p>	

IV. — Statistika Parto.

Esperantista Societaro [412 (058) (∞)].

1 ^a eldono, 30 junio 1906.	1 50
2 ^a eldono, 31 decembro 1906.	1 50
3 ^a eldono, 30 junio 1907.	1 50
4 ^a eldono, 31 decembro 1907.	1 50
5 ^a eldono (31 decembro 1908), enpresita en la Tutmonda Jarlibro Esperantista 1909.	2 50
6 ^a eldono (31 decembro 1909), enpresita en la Tutmonda Jarlibro Esperantista 1910.	3 »
Tutmonda Jarlibro Esperantista 1912.	2 50
Tutmonda Jarlibro Esperantista 1913-1914, kun aldono.	3 50

Tiu Jarlibro enhavas la fundamentajn dokumentojn pri niaj oficialaj institucioj, la liston de ĉiuj societoj kaj grupoj esperantistaj en la mondo, la adresojn de personoj, kiuj deziras korespondadi, la liston de la esp. gazetoj, komercistoj, geografiajn notojn pri urboj, k. t. p.